

El

人民中國報道

POPOLA  
CINIO

1962



# Orkestro de Junaj Pioniroj

Gelernantoj de la Dependanta Liceo de la Centra Muzika Instituto organizis orkestron, kiu ne nur ofte sin ekzercas kaj aranĝas prezentadon en la liceo por perfektigi sian arton, sed ankaŭ iras al fabrikoj kaj kamparo fari ludon por du semajnoj dum la somera libertempo ĉiujara por plikolorigi la vivon de siaj geonkloj batalantaj sur la industria kaj agrikultura frontoj. Kiam lernejoj de la Pekina Danc-lernejo ludis baleton, ĝi donis akompanan muzikon. La repertuaro de la orkestro konsistas el diversspecaj muzikaĵoj. Iliaj prezentadoj ricevis varmajn bonvenigojn, kaj oni intime nomas ĝin Orkestro de Junaj Pioniroj, ĉar la membroj de la orkestro ĉiuj estas junaj pioniroj.

*Fotoj de Huabao*



*Violonistino de la orkestro Ĝai Vejvej.*



*La Orkestro de Junaj Pioniroj en prezentado.*

*Ludo de brazbando.*



*Prezentado de la tria koncerto por piano de Kabalevskij.*



# Reformo de la Skribado de la Ĉina Lingvo

Hujucz

*Vicprezidanto de la Komitato por Reformado de  
la Ĉina Skriba Lingvo kaj Prezidanto de Ĉ. E. L.*

**L**A ĈINA IDEOGRAFIO havas historion de pli ol 3300 jaroj. Ĝi ludis gravan rolon en la disvolvigo de la ĉina kaj eĉ de la orientaziaj kulturoj. Tamen, en la moderna tempo, ĝi montriĝas pli kaj pli maloportuna por respondi al la bezonoj de la epoko. La ĉinaj ideografiaj, kiuj estas malfacile lerneblaj kaj maloportune uzeblaj, certgrade malhelpas al la disvastigo de legscio kaj la mekanikigo de skribado (ekzemple, en presarto, maŝinskribado, telegrafo ktp.). Dum la lastaj sepdek jaroj, multaj homoj pledis por reformado de la ĉina skriba lingvo, kaj la realiĝo de tiu ĉi celado komenciĝis nur lastatempe.

Ekzistas du opinioj pri la demando, kiamaniere oni devas reformi la ĉinan skribadon:

Unu estas simpligi la formon de ĉinaj ideografiaj kaj redukti maksimume la nombron de tiuj ĝenerale uzataj.

La alia estas substitui la nefonetikan ĉinan ideografion per sistemo de fonetika skribo.

Tiuj ĉi du opinioj ne estas reciproke ekskluzivaj, sed devas efektiviĝi paralele. Ĉar en mallonga tempo, la ĉina ideografio kun tiom longa tradicio ne povos esti tuj forĵetita, nek la fonetika skribo de hanlingvo povos evolui en maturan kaj ĝenerale uzeblan literaturan lingvon. Tial, la taskoj de nia skriba reformado estas: unuflanke la simpligo de la formoj de ideografiaj por fari ilin pli facile uzeblaj surbaze de ilia nuna uzebleco, kaj aliflanke ellabori sistemon de fonetika signado de la hana lingvo, disvastigi ĝin kaj disvolvi ĝin iom post iom de la pozicio de helpilo en lernigo de la ideografio en estontan ĝenerale uzatan skriban lingvon.

En 1956, la Ŝtata Konsilo de Ĉinio publikigis la "Projekton de Simpligo de Ĉinaj Ideografiaj", kiu simpligis 515 ofte uzatajn ideografiajn kun malsimpla strekaro, kaj 54 bazajn signojn. (plejparte tiuj de ideoj uzataj kiel elementoj por konstrui ĉinajn ideografiajn).

Fakte, la formoj de tiuj simpligoj estas plejparte jam longe aplikataj en la manskribado, nur ne rigardataj kiel oficiala skribmaniero. Nun, tiuj simpligitaj skribmanieroj akiris sian "laŭleĝecon".

En 1958, la Tutlanda Kongreso de Popolaj Reprezentantoj sankciis la "Projekton de Fonetika Signado de la Hana Lingvo", prezentitan de la Ŝtata Konsilo. Tiu ĉi projekto adoptis latinajn literojn kiel fonetikajn signojn, difinis ilian sonvaloron por signi hanlingvan sonaron, manieron de sonsignado kaj la signojn por montri "tonojn".\*

Sube estas la 26 literoj kaj en la parantezoj iliaj sonvaloroj (skribitaj en la internaciaj fonetikaj signoj):

a (a), b (p), c (ts'), d (t), e (ə), f (f), g (g), h (x),  
i (i), j (tɕ), k (k'), l (l), m (m), n (n), o (o), p (p'),  
q (tɕ'), r (əɾ kaj z), s (s), t (t'), u (u), v (v), w (w),  
x (ç), y (j), z (ts).

Krome, du el ili estas supersigneblaj: ê (ɛ) ü (y); kaj estas kvar kombinaĵoj el po du literoj: ch (tʂ'), ng (ŋ), sh (ʃ), zh (ʂ).

Nun la ĉina ideografio estas ankoraŭ la oficiala skriba formo de la lingvo, sed la fonetika alfabeto por signi la prononcon jam estas ĝenerale instruata en elementaj lernejoj kiel helpilo por lerni la skriban lingvon.

En la hana lingvo estas diversaj dialektoj, sed en efektiveco ili ne estas tiel diversaj kaj kompleksaj kiel oni erare kredis en la pasinteco. El la sescent kvindek milionoj da popolanoj en nia lando, pli ol 70% parolas nun la ĉinan ĝeneralan lingvon, kaj malpli ol 30% (ĉefe en la ses sudorientaj provincoj) parolas dialektojn. Sed tie ĉiuj kiuj ricevis elementan edukadon ankaŭ povas paroli la ĝeneralan lingvon. Kompreneble, ili ne ĝin parolas tiom korekte laŭ la normo, sed tio ne malhelpas la reciprokajn komprenigadon. Tiu kiun oni per la ĉina fonetika alfabeto skribas, estas la ĝenerala lingvo kun la pekina sonsistemo kiel la normo de prononcado. La fonetika skribado estas plej bona rimedo por disvastigi la ĉinan ĝeneralan lingvon. Post la decido pri la projekto de fonetika signado de la hana lingvo, oni uzas tiun novan helpilon en diversaj lokoj por disvastigi la ĝeneralan lingvon kaj akiris senprecedencan benefikon.

Dum la lastaj tri jaroj, la laboroj de reformado de la skriba lingvo spertis novan disvolvigon.

# Majesta Kanto de la “Sennmorta Birdo”

— Memore al S-ro Akita Ujaku —

EN LA ANTAŬLASTA TAGO de sia restado en Japanio, la ĉina delegitaro al la Oka Kongreso por Malpermeso de Atom- kaj Hidro-bomboj aranĝis adiaŭan vinkunvenon en Kongo-restoracio, Tokio. Mi diris ripetfoje al japanaj amikoj, ke ni estas optimistoj, ke ni, eĉ dum la adiaŭo, pensas pri pli multaj kaj pli agrablaj renkontiĝoj en la estonteco. Tiel same opiniis ankaŭ la amikoj. Ni same kredas pri la estonteco. Ni varme interbabilis pri amikeco, tostadis kun ardaĵoj, forte manpremis kaj fikse rigardis je la ridanta vizaĝo unu la alian. La vasta salono hele brilis de la senlime brila estonteco de la ĉina kaj japana popoloj. La kortuŝa varmega sceno profunde gravuriĝis en mia kapo. Kun tuŝita koro mi adiaŭis la amikojn, revenis kaj eksidis silente en angulo de la ripozĉambro en la teretaĝo. Iom post iom neniigis la efiko de alkoholaĵo, tamen la amikaj sentoj ankoraŭ ekscitadis mian koron. Mi pensadis pri amikoj amataj kaj estimataj, iliaj vizaĝoj intimaj kaj ridetantaj preterpasis unu post alia antaŭ miaj okuloj, kaj mi vokadis ankore unu post alia iliajn karajn nomojn. Subite mi elvoĉigis: “Sinjoro Akita”. Kompreneble, mi krietis per voĉo mallaŭta, neaŭdebla

por la aliaj. Mi vidis malgrasan maljunuleton kun grandaj okulvitroj ambaŭflanke de la alte elstaranta nazo. Arĝentaj haroj montriĝis el sub lia ĉapo, liaj vangoj enkaviĝis. Kun gaja rido sur lia sulkoplana malgrasa vizaĝo li paŝis al mi iom tremante kun la helpo de sia bastono. Jen estas sinjoro Akita Ujaku. Lia figuro estas tre klara ankoraŭ nun en mia kapo.

En aprilo de la pasinta jaro, Sinjoro Akita Ujaku partoprenis la adiaŭan vinkunvenon aranĝitan de la ĉina verkista delegitaro en restoracio Cubakijamaso, Tokio. Tiam li jam atingis la aĝon de 78 jaroj. Atinginte Tokion, ni tre deziris vidi lin, tamen ni ankaŭ timis lin ĝeni, ĉar oni diris, ke li estas en delikata sanstato. Pli poste, dum nia vojaĝo al Kanazaŭa kaj aliaj lokoj, ni ricevis eksteratente salutatan telegramon de sinjoro Akita. Reveninte al Tokio, ni tuj petis japanajn amikojn, ke ili aranĝu por ni eblecon viziti sinjoron Akita en lia hejmo. Mi estis atendanta respondon de la japanaj amikoj, sed ne supozis, ke sinjoro Akita povos ĉeesti nian adiaŭan vinkunvenon, kaj la respektata aĝulo venis tre frue al la restoracio Cubakijamaso. Kun ĝoje ridanta mieno li firme premis mian manon, kaj ne



1. La simpligitaj bazaj signoj difinitaj en la “Projekto de Simpligo de Ĉinaj Ideografiaĵoj” jam komencis esti aplikataj ĝenerale ankaŭ en la ideografiaĵoj kiuj entenas tiajn. Inkluzive tiujn la simpligitaj ĉinaj ideografiaĵoj nun nombriĝas 1914. Lastatempe post reordigo estas pretigita jam la Ĝenerala Listo de Simpligitaj Ĉinaj Ideografiaĵoj”, el kiu oni povas havi birdvidon de la tuta laboro de simpligado.

2. La malfacila akiro de legscio de la ĉina ideografio kuŝas parte en tio ke ĝi per si mem ne povas precize montri la prononcon. Dum la pasintaj jaroj, en la laboro de likvido de analfabeteco oni utiligis la fonetikan alfabeton en certaj regionoj, por signi la sonon de la ĉinaj ideografiaĵoj, indikante ĝin super la respektivaj ideografiaĵoj. La analfabetuloj unue lernas la fonetikan alfabeton, kaj poste dank’ al ĝi ili facile ellernas la ideografiaĵojn.

3. Renovigon ankaŭ okazigis en la edukado de blinduloj kaj surdmutuloj la “Sistemo de Fonetika

Signado de la Hana Lingvo”, laŭ kiu oni ellaboris novan Brajlon por fonetika alfabeto de la hana lingvo kaj novan sistemon de fingra alfabeto, kiujn oni nun uzas prove por poste povi decidiĝi kaj ilin disvastigi en mallonga tempo.

4. Krom la hannacio, en Ĉinio vivas ankoraŭ pli ol kvindek nacimalplimultoĵoj. Ili aŭ ne havas skriban lingvon, aŭ havas nur tian kiu ne respondas al la modernaj bezonoj de la epoko. Tial, la “Sistemo de Fonetika Signado de la Hana Lingvo” fariĝis la bazo kaj normo por ellaboro aŭ reformado de ilia skriba lingvo. Pli ol dek nacimalplimultoĵoj jam ellaboris por si projekton de nova skribo en latinaj literoj. Estas ne priskribebla la ĝojego de la nacimalplimultoĵoj kiuj unufoje ekhavis sian skriban lingvon.

\* Laŭ la normo de prononco ekzistas kvar “tonoj”, kiujn oni montras respektive per kvar signoj donitaj sur la vokaloj. Ekzemple: ā (unua tono), á (dua tono), ä (tria tono), kaj à (kvara tono).

lasante min elverŝi al li mian sentimenton por li akumulitan dum tridek jaroj, li senĉese parolis pri la amikeco inter la popoloj de Ĉinio kaj Japanio kaj lia persona sopiro al la nova Ĉinio. Tiel entuziasma li estis, ke li forgesigis aliajn pri lia malforta korpo. Li eĉ diris, ke li vizitos la novan Ĉinion en la estonteco, kiam li fartos pli bone. Kiel bona kaj grava novaĵo ĝi estis por ni. En la kulturaj rondoj de Ĉinio ja ne malmultaj estas liaj amikoj kaj sekvantoj, kaj la nomo Akita Ujaku ofte vekas en nia lando senton de estimo. Ankaŭ la vinkunveno en Cubakijamaso iris en varma amika atmosfero. Ĉe Cubakijamaso same kiel ĉe Kongo, mi profunde sentis la grandan signifon de la kor-al-kora amikeco. Mi tostis kun la amikoj unu post alia kaj foje kaj refoje malplenigis la pokalon pro amikeco. Mi ankaŭ starigis min antaŭ sinjoro Akita kaj tostis pro lia sano, pro liaj atingitaj sukcesoj, pro lia pli firma batalspirito en sia maljuneco, pro la prospero de la Esperanto-movado en niaj du landoj kaj pro la amikeco inter ni. Nun mi ankoraŭ konservas hejme tre valoran memoraĵon, foton de sinjoro Akita kun kamarado Liu Bajju kaj mi mem, faritan ĉe Cubakijamaso. La foto ne nur konservas la printempan sunbrilon ekster la vasta hela salono, sed ankaŭ la afablan kaj gaje ridantan mienon de sinjoro Akita. Tiutempe mi ja absolute ne povis pensi, ke nia unua intervido jam estos la lasta. Sed kiam sinjoro Akita manpremis kun mi adiaŭe je la fino de la kunveno kaj lia malgrandstatura kaj malgrasa figuro formalaperis en la homamaso, subite mi sentis, ke mi perdis ion valoregan. Mi ja perdis la okazon kore satbabili kun sinjoro Akita, kaj en la sekvanta mateno ni jam forlasis Tokion. En majo de la kuranta jaro, kiam mi ekaŭdis en Ŝanhajo pri lia forpaso, mi ankoraŭ ne volis kredi; sed poste kiam mi legis la artikolon de k-do Situ Hujmin "Senmorta Birdo Ĉiam Fluganta", mi ne povis ne dolore senti la perdon de la japanaj amikoj kaj de mi mem. Senmortaj estas liaj eminentaj verkoj, lia perfekta personeco kaj lia batalspirito de "Senmorta Birdo" ĉiam fluganta. Tamen mi neniam povos plu aŭdi liajn parolojn plenajn de amikeco; mi neniam plu havos okazon konfesi al li mian ĝojon, kiun mi havis, kiam mi akiris, antaŭ 34 jaroj ĉe stando de malnovaj libroj apud Sejno en Parizo, la esperantan tradukon de lia verko *Danco de Skeletoj*; kaj mi neniam havos okazon sciigi al li mian ekscitiĝon dum elesperantigo de liaj tri mallongaj dramoj (nomo:



*S-ro Akita Ujaku (la dekstra sidanto), la verkinto Bakin (la dekstra staranto) kaj alia ĉina verkisto Liu Bajju (la maldekstra staranto).*

*Nokto ĉe la Landlimo, Danco de Skeletoj kaj Fontano de Turborigardanto.* En liaj verkoj ĉiam estas espero kaj ĉiam brilas la lumo de la estonteco antaŭ la okuloj de la legantoj. Neniam elĉerpiĝos la bela fontano. Mi akiris el liaj verkoj, en mia aĝo de pli ol dudek jaroj, multajn instruojn; liaj optimismaj kaj entuziasmaj vortoj kaj batalspirito ĉiam min kuraĝigas. Estas ege bedaŭrinde, ke mi neniam plenumis mian deziron esprimi al li mian dankon. Tamen ekmemorante en la ripozĉambro de Kongo-restoracio pri la okazajo pasintjara, mi ja ne povis kunligi la memoron pri sinjoro Akita kun malĝojo.

La vivo de sinjoro Akita estas tiu de firma literatura batalanto. Li diris decideme ankoraŭ en sia aĝo de pli ol sepdek jaroj: "mi ĉiel klopodos batali kuraĝe. Plorado ne estas mia afero." Li diris krome: "Kiel ajn malfacile estas vivi, tamen mi ne povas morti tute vane." Ĉion ĉi li diris post kiam lia sola parencino, la juna nevino estis sin mortiginta pro malesperiĝo, kiam ŝi trovis sin trompita. Sinjoro Akita estis zorgema pri la junuloj, li iniciatis "Societon de Senmortaj Birdoj", laŭte alvokis al la japanaj junuloj, kuraĝigante ilin ke ili amu la vivon, serĉu la veron, persistu en batalo, ne forlasu sian devon kaj ne submetiĝu al malfaciloj. Kaj lia vivo sepdeknaŭjara estas brilega ekzemplo. Kiel multajn malfeliĉojn kaj malfacilojn li travivis, sed li ĉiam antaŭen marŝadis kuraĝe kaj optimiste kun levita kapo, kaj sur la vojo literatura kaj sur la vojo de homa vivo. Li mem estas bela "senmorta birdo", kiu ĉiam flugas sur la ĉielo, prikantante la vivon, la lumon kaj la venkon de la popolo. . . .

Kamaradoj de la delegitaro alsendis aŭtomobilon por min veturigi al la apartadomo de la hotelo princo.

*(Daŭrigo sur p. 251)*

# Vojaĝaj Notoj pri Budhismaj Monaĥejoj en Tibetanaj Distriktoj en la Nordokcidento

Ŝirob Ĝalco

prezidanto de la Ĉina Budhista Asocio

**E**N LA FRUA AŬTUNO de 1961, mi faris inspektan vojaĝon pri budhismo en la tibetanaj distriktoj en la Nordokcidento. Mi vizitis Sku-hbum-monaĥejon en Kinghaj-provinco, la monaĥejojn Gco-po kaj Bla-bran en Gansu-provinco kaj fine mi iris al mia hejmloko, Hjunhua-gubernio — la Aŭtonoma Gubernio de Sala-nacio en Kinghaj, kie mi revizitis la monaĥejon Sgohu-ris.


Sku-hbum-monaĥejo, kiu antaŭe portis la nomon Templo de Cent Mil Budhoj, estas la naskiĝloko de Mastro Zonhkapo, la fondinto de la Flava Sekto. Laŭ legendo, en la loko, kie falis sangogutoj dum detranĉo de la umbilika ŝnuro post lia naskiĝo en 1357, elkreskis poste santalarbo kun multaj budhaj figuroj kaj sorĉa skribaĵo sur la arbotrunko. Lia patrino konstruigis pagodon enfermantan ĝin internen. Kaj tiel devenis la nomo Templo de Cent Mil Budhoj. Ĝis nun la tibetanoj tieaj ankoraŭ ĝin tiel nomas.

Post kelkfoja rekonstruado kaj plivastigo, tiu ĉi monaĥejo fariĝis nun la plej granda monaĥejo en Kinghaj kun pompaj haloj kaj vicoj da bonzaj loĝdomoj kaj pompe brilas ĝiaj Granda kaj Malgranda Ortegolaj Haloj, kiel la plej alta studejo de la budhisma kulturo en Kinghaj, ĝi konsistas el kvar kolegioj de la budhisma filozofio, *tantrismo*,\* *kalakakro*\* kaj medicino. Ĉi tie estas multaj kulturaj kaj historiaj objektoj de la budhismo. Post la Liberiĝo, la monaĥejo estas sub la zorgema protektado de la popola registaro, kiu disponigis al ĝi monsumon de pli ol cent mil juanoj por ĝin ripari, tiel ke ĝi fariĝis pli majesta kaj pompa. Nun en la monaĥejo

ĉiuj religiaj aktivadoj estas kiel kutime gvidataj de la religiaj funkciuloj de la templo, la bonzoj libere faras preĝrecitadon kaj sinkulturadon, studas sutrojn aŭ eliras preĝi por la popolamaso. Tiuj venantaj por fari oferdonacon aŭ fariĝi bonzo estas kontentige akceptataj de la monaĥejo.

Kiam mi alvenis al la Sku-hbum-monaĥejo, ĝiaj bonzoj sin viciginte, bonvenigis min ekster la monaĥejo laŭ la budhisma ceremonio plej solena, kun portado de flava ombrelo kaj blovludo de hobojoj kaj konkegoj. Mi unue kultis al la Santalpagodo, fronte al kiu estis prezentata Millanterna Ofero kaj poste mi iris al la granda lekcihalo por fari donacon al la bonzaro kaj laŭ ilia peto mi surpodiigis kaj lekciis pri la vivo de Mastro Zonhkapo k. a. Tiun tagon ĉ. mil bonzoj kaj laikoj min aŭskultis. Pluraj el ili venis el malproksimaj paŝtaj regionoj, kaj kelkaj tibetanoj faris oferon en la halo, esprimante sian pian kredon al budhismo.

Dum mia restado en Kinghaj, la viva budho Hĝjam-dbjans de la Bla-bran-monaĥejo en la Tibetana Aŭtonoma subprovinco de suda Gansu invitis min por fari lecion tie. Akompanate de Ma Kingnian, vic-provincestro de Gansu, ni atingis la ĉefurbon de la Aŭtonoma Subprovinco, Gco-po, kie estis preskaŭ ne loĝata dezertejo antaŭ pli ol dek jaroj, sed nun aperis tie nova urbo kun miloj da loĝantoj. La stratoj estas larĝaj kaj rektaj. Multe da novaj etaĝdomoj, fabrikoj de laktajoj kaj ledoj, butikoj, bankoj, poŝtofacejoj, malsanulejoj kaj lernejoj, krom veturiloj kaj pasantoj surstrate cirkulantaj jam forpuŝis la malnovan aspekton, tiel ke mi jam ne povis retrovi ian postsignon de la malnova dezertejo.



La Granda Ortegola Halo de Sku-hbum-monaĥejo.

Foto de Hinhua

Angulo de la Malgranda Ortegola Halo de Sku-hbum-monaĥejo.

Foto de Hinhua



La duan tagon post mia alveno mi vizitis la monaĥejon Gco-po, kie mi faris lecion pri la Vivo de la Budho al pli ol mil aŭskultantoj el bonzoj kaj laikoj.

Kiam mi atingis la Bla-bran-monaĥejon, la viva budho Hgjam-dbjans kun la tuta bonzaro de la monaĥejo bonvenigis min per plej solena budhisma ceremonio, en la granda lekcihalo mi ascendis sur la lekcian sidejon por ricevi riverencon de la bonzoj, kaj tie okazis debato pri sutro sub la prezido de la eminenta dge-bŝis\*\*. La tieaj amasoj estas tre piaj. Kelkaj eĉ venis surĉevale kaj malproksime de kelkcent lioj. Ili atendadis la vertokaresado†, tenante Ĥatakojn‡ en la manoj. Tie mi ricevis riverencon du fojojn en ĉiu tago kaj venis al mi ĉiufoje centoj da kredantoj.

Bla-bran estas la plej granda monaĥejo kaj plej alta studejo de budhismo en la tibetana distrikto de Gansu, en ĝi estas starigitaj la jenaj kolegioj: Filozofia, Supera Tantra, Malsupera Tantra, Kalakakra, Kjerdora\* kaj Medicina. Multaj famaj budhismaj instruituloj estis ĉitie edukitaj. Nun en la monaĥejo estas starigitaj montrosalono de kulturaj kaj historiaj objektoj kaj la biblioteko. Krom ordinaraj religiaj

aktivadoj, tiu ĉi monaĥejo vaste malfermis la pordon de siaj kolegioj al junaj studentoj de budhismo.

Bla-bran-monaĥejo estas ĉirkaŭata de montoj, kun Dahia-rivero en la antaŭo, tre bela estas ĝia medio natura. Mi du fojojn studis ĉitie en miaj dekaj kaj dudekaj jaroj. Mia revizito al la malnova loko kaj vido de ĝia nova kaj prospera fizionomio treege ĝojigis min.

La Ŝtata Konsilo, sciante, ke mi vizitos la monaĥejon Sgohu-ris en mia naskiĝloko, donacis al mi kupran sonorilegon, pezantan du tunojn, faritan en la mezo de la 16-a jarcento, kaj oni jam alportis ĝin tien, kiam mi atingis la monaĥejon. Por loki la sonorilon oni konstruas pavilonon. La bonzoj de la monaĥejo tre dankas la registaron pro la donaco.

\* *Tantrismo*: sekto de budhismo. *Tantra* signifas magian frazon. *Kalakakra*, vorto el sanskrito signifanta "tempradon", unu el la budhismaj kultobjektoj. *Kjerdoro*, simila al *kalakakra*.

\*\* *Eminentulo en diskutado*.

† *La kredantoj kredas ke vertokareso fare de viva budho feliĉigas*.

‡ *Silkaĵo uzata kiel omaĝo de tibetanoj*.

(Daŭrigo de p. 249)

Kiam mi forlasis la ripozejon de la restoracio, multaj min salutis kun afablaj ridetantaj vizaĝoj, kaj mi sentis kvazaŭ mi ankoraŭ naĝus en oceano de amikeco. Estis strange, ke inter tiuj ridantaj vizaĝoj mi revidis tiun de la maljunulo. La memoro pri li ĉiam restas ĉe mi. La aŭtomobilo malrapide ruliĝis antaŭen tra avenuoj kaj stratetoj de la pompa mond-fama urbego Tokio. Dum la tuta vojo mi aŭdadis

la majestan kanton de la senmorta birdo, kiu vekis en mi sennombrajn belajn sentojn. Tiel pli kaj pli akumuligis la sentimentoj, ke ni varmiĝis tutkorpe kaj forte batadis mia koro. Mi ne volis reiri al la idilia, kvietata hotelo. Mi vere deziris kuri tra la tuta Tokio, trovi la multnombrajn ĵus adiaŭitajn japanajn amikojn kaj refoje diri al ĉiu el ili: "Ni firme tenu min, mano en mano kaj ŝultro ĉe ŝultro, por kune marŝu al la lumega estonteco kun levita kapo."

La 24-an de aŭgusto 1962, en Pekino

# La Magia Fluto de Lu Ĉunling



Lu Ĉunling sur la sceno.

Foto de Huabaŭ

**E**N LA KONCERTO Ŝanhaja Printempo la fama flutisto Lu Ĉunling ludis sian novan verkon *Galopante sur la Stepo*.

La flutisto portis helbluan uniformon. Akompanate de nacimuzika orkestro konsistanta el pli ol 40 personoj, li aŭdigis multe variajn sonojn el sia fluto. Liaj vastaj kaj sonoraj flutosonoj kvazaŭ vidigis la senliman stepon ĉe la piedo de la monto Jin-ŝan; kaj liaj helaj kaj vigle saltantaj sonoj vidigis al ni ankaŭ la junan rajdiston sur la ĉevalo galopanta. Lia muziko estas tiel belbrila kaj multkolora, ke ĝi prezentas al la aŭskultantoj belegan bildon de riĉa mongola stepo teksitan el oraj sunradioj, verda herbomaro, gregoj de bovoj kaj ŝafoj kaj unu post alia starantaj mongolaj tendoj, kaj ĝi estas ankaŭ tiel flua kaj ĝoja, kvazaŭ deklamo de poemo pri ĝojaj kantado kaj dancoj de ŝafistoj en la lumo de luno. Tuj kiam li finludis sian lastan muziknoton, ektondris aplaŭdo en la Muzika Halo.

En pli ol dek landoj de Azio kaj Eŭropo Lu Ĉunling faris prezentvojaĝojn. Li flutis ariojn per simpla ĉina fluto el bambuo, kiu tamen havas, kiel iuj muzikaj kritikistoj diris, magie mirindan artan forton por la aŭskultantoj, kaj pro tio oni kromnomis lin Magia Fluto.

La muzikaj *Galopante sur la Stepo* li verkis kun nedetenebla ekscitiĝo dum la revena veturo post prezentado en norda Eŭropo, kiam la aeroplano malalte ŝvebis super la poezie kaj bilde belega stepo de la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio. Tio estas lia kvina verko. Kaj la ceteraj, kiujn li verkis antaŭ kelkaj jaroj nome: *Pasinto kaj Nuntempo*, *Ĝojiga Informo*, *Laborkanto en la Granda Antaŭensalto*, *Sturmanto*, kiuj prikantis socialismon kaj la tri ruĝajn standardojn\*, ĉiuj ricevis altan takson de la muzikistaro kaj estas ofte ludataj de flutistoj en Ŝanhajo kaj aliaj lokoj. Ankaŭ sondisko estas farita el ili.

Antaŭe, tiu ĉi fama flutisto profesiis kiel ŝoforo kaj triciklisto. Dum lia infanaĝo lia familio loĝis en iu laborista kvartalo de Ŝanhajo. Ĉiuvespere, post la tuttaga laboro, la najbaroj ofte ludis erhuon\*\*, pibaon\*\* kaj blovis ŝengon\*\*, Hiaŭon\*\*, kaj fluton aŭdigante belan popolan muzikon de suda Ĉinio. Kia ĉarmo tio estis por la etulo — juna Lu Ĉunling! Ĉiujfoje li aŭskultadis absorbite, kaj en la mateno li jam senpacience atendis la alvenon de la vespero. Li ekamis precipe la ĉinan fluton. Iu ŝuisto instruis al li abocon de flutludo kaj ekde tiam Lu Ĉunling tiel entuziasme lernis la muzikilon, ke li eĉ ofte forgesis dormi kaj manĝi. Li flutis en la hejmo kaj flutis sur la strato. Li tute ensorĉiĝis en sia ludo. Kvankam iuj lin rimarkigis ke per flutludo oni ne povas gajni la vivopanon, tamen li ankoraŭ kunportadis la fluton en sia maniko kaj profitis ĉiun okazon ekfluti.

Kiom forte li deziris sin tute dediĉi al la muziko kaj lerni flutarton ĉe majstroj! Sed dum la mizeraj jaroj antaŭ la Liberiĝo, ĉu la gefiloj de la laboristoj kaj kamparanoj povis eniri la Palacon de Artoj? Kiam li lernis en liceo, la lernopago pliiĝis je unu juano. Ĝuste pro tiu unu juano, kiun li ne povis pagi, li devis ĉesigi sian lernadon. Li eklernis ĉe la patro, kiu estis ŝoforo, riparon de aŭto, poste ankaŭ veturigon kaj mem fariĝis ŝoforo post multaj klopodoj. Tamen senlaborecon ili ofte suferis. Kaj foje kaj foje kune kun la patro li devis lui triciklon kaj ili alterne ĝin pedalegi tagnokte. Li spertis ĉiujn suferojn de laboruloj en la malnova socio kaj en liaj flutosonoj plenis maĝojo kaj indigno. Kiam li veturigis burokraton aŭ kapitaliston al balo, hazardludejo aŭ bordelo, li ofte devis atendi antaŭ la pordo ĝis profunda nokto. Tiam el de la diboĉejo aŭdiĝis dekadenca muzikaĉo, dume li eltiris la bambuan



fluton, kaj sinapogante sur la triciklo, ekflutis belajn ariojn. Lia flutado ofte altiris al si amason da triciklistoj kaj jinrikŝistoj. Vere du malsamaj mondoj kun malsamaj muzikaĵoj.

En majo de 1949, kun ĝojo Lu Ĉunling bonvenigis la Liberigon de Ŝanhajo. Dank' al la rekomendo de la sindikato li eklaboris en la Popola Liberiga Armeo kiel ŝoforo, kaj baldaŭ la gvidantoj rimarkis lian talenton kaj instigis lin flutludi por la armeanoj. Li flutludis ankaŭ en fabrikoj kaj vilaĝoj kaj ĉie li estis varme akceptata. En 1952, kiam fondiĝis la Ŝanhaja Nacimuzika Ensemblo (tiam nomata Nacimuzika Grupo), li fariĝis ĝia membro. Tiel fine realiĝis lia deziro de multaj jaroj.

Lu Ĉunling konservas multajn skatolojn kaj faskojn da flutoj de diversaj nacioj en- kaj eksterlandaj. Inter ili estas flutoj longaj kaj mallongaj, bambuaj kaj lignaj, horizontale kaj vertikale ludataj, kun ses aŭ kvin truoj kc. Jen li ekprenis indonezian *serulinon*, aldoninte al ĝi la fragmitopecon kiel sonaliigilon kaj ekprezentas la bildon de tropikaj kokosarbaroj; jen per finna fluto arboŝela li flutis popol-arion de tiu malvarma lando de arbaroj; kaj jen ekpreninte la ĉeĥan flaĝoleton li flutis amkanton de paŝtistoj ĉe la Karpatoj; jen li tenante per unu mano la tritruan marseljan fluton *galubo* elflutis la valson de amikeco kiu impresis la aŭskultantojn kvazaŭ ili sintrovus inter la varmkora kaj bonhumora franca popolo apud Mediteraneo.

Ĉiujn tiujn flutojn Lu Ĉunling ricevis de fremdaj amikoj kiel donacojn dum siaj prezentvojaĝoj en

*Lu Ĉunling lekcias en la Ŝanhaja Konservatorio.*

*Foto de Huabaŭ*



*Lia familio: Avino, patrino, edzino kaj liaj kvar gefiloj.*  
*Foto de Huabaŭ*

eksterlandoj. Atinginte iun lokon, Lu Ĉunling ĉiel klopodis lerni popolajn ariojn kaj ludmanieron de loke uzataj flutoj. Kiam li rondvojaĝis enlande, li ĉie vizitis famajn majstrojn kaj popolajn artistojn por lerni la flutludon de diversaj skoloj. Posedo de firma fundamento kaj tradicio de muziko de suda Ĉinio kaj proprigo de la kremo de en- kaj eksterlandaj flutludaj skoloj estas ĝuste la kaŭzo kial dum lastaj jaroj lia arto en flutludo ĉiam pli perfektigis.

En la Ŝanhaja Nacimuzika Ensemblo Lu Ĉunling jam akceptis tri lernantojn. Antaŭ nelonge ili kune okazigis kvarpersonan Flutsolistan Koncerton de Lu Ĉunling kaj Liaj Lernantoj, kio fariĝis evento de muziko. En la ĉijara koncerto Ŝanhaja Printempo, lia plej juna lernanto Ju Sunfa ankaŭ ludis la *Ĝojigan informon*, verkon de la majstro kaj la arion de suda Ĉinio *Ĝojo*. Kvankam nur 16-jara, tamen li jam tiel flue ludis kaj redonis la ĝustan guston el la fluto de sia majstro. Lu Ĉunling ankaŭ lekcias en la Ŝanhaja Konservatorio, kaj alilokaj Nacimuzikaj Ensembloj de tempo al tempo sendis junulojn al li por ricevi lian instruon. Li traktis la lernantojn kaj intime kaj severe, kun senlima entuziasmo li instruas sian tutan arton al la juna generacio.

\* T. e. la Ĝenerala linio, la antaŭensaltego kaj la pola komunumo.

\*\* Ĉinaj muzikiloj: erhuo estas dukorda muzikilo ludata per arĉo; pibao, plukata instrumento, iom simila al gitaro; ŝengo, ia buŝharmoniko kun tubetaro provizita per anĉoj kaj ŝiaŭo, ĉina flaĝoleteto.

# Sinjoro Hua Vej

**S**E nia genealogia tabelo estas fojon kaj refojon pliampleksigita, fine li povas esti kalkulata kiel mia parenco. Mi nomas lin "sinjoro Hua Vej". Sed li konsideras tian titolon ne tre konvena.

"Aj, kio!" li diris. "Kial nepre necesas la vorto 'sinjoro'? Vi devas nomi min 'frato Vej', aŭ 'Vejĉjo'."

Pritraktinte tiun ĉi aferon, li tuj metis sian ĉapelon sur la kapon.

"Ni daŭrigu nian konversacion alitage, ĉu bone? Mi delonge deziras havi ĝissatan interparolon kun vi, sed, ve, tempo ĉiam mankas. Hodiaŭ direktoro Liŭ faris projekton pri la postlabora agado de guberniestroj. Li insiste postulis de mi konsilojn kaj petis min korekti ĝin por li. Kaj je la tria horo mi devos ĉeesti kunvenon."

Nun li ekskuis la kapon kaj amare ekridis, kun mieno de senrimedeco. Li klarigis, ke penojn li ne timas — dum la Kontraŭjapana Rezistmilito ĉiu devas iom peni — sed sufiĉan tempon oni ja devas disponi!

"Krome, komitatano Vang sendis al mi tri telegramojn, invitante min nepre fari vojaĝon al Hankoŭ; ĉi tie fondiĝis la provinca Ĉefa Asocio de la Kulturaj Rondo por Rezisto kontraŭ la Malamiko, kaj ĉiuj laboroj por la rezistmilito devas esti gvidataj. Kiel mi povus min okupi samtempe pri ĉio ĉi tio, mia ĉielo!"

Kaj, rapideme preminte al mi la manon, li suriris sian personan jinrikŝon.

Li ĉiam havis sian ledan paperujon sub la brako, kaj neniam disiĝis de la dika kaj brile nigra promenbastono. Sur la ringa fingro de la maldekstra mano li portis sian ringon de edziĝo. Kiam li tenis

---

\* La aŭtoro estas unu el la famaj verkistoj de Ĉinio. Li naskiĝis en la jaro 1906 en Nankino kaj komencis sian verkistan karieron en 1928. Liaj publikigitaj verkoj konsistas el "Solulo" kaj aliaj pli ol dek novelaroj kaj kvar longaj romanoj. Li ankaŭ estas aŭtoro de la plej ŝatataj infanliteraturaĵoj, kiaj "La Granda kaj Malgranda Lin", "Rakonto pri Luo Venĵing", "Griza Lupego", "La Sekreto de la Trezora Lagenario" k. a. La novelo "Sinjoro Hua Vej" estas verkita en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito. En tiu ĉi verko, la aŭtoro reliefe priskribis la abomenan figuron de la gvidantoj de la kulturaj rondoj servantaj al la Kuomintangareakciularo kaj faris ĝian heroon tipa ekzemplero vaste konata.

en la mano cigaron, li iom kurbigis tiun fingron kaj lasis la etfingron alte sin levi supren, formante per tio figuron de orkida floro.

En tiu ĉi urbo, laŭkutime, oni tiras la jinrikŝojn ne kure, sed per firmaj paŝoj, kvazaŭ promenante post la manĝo. Sed persona rikŝo estas escepto: tint tint tant tant, kure ĝi impetas al la antaŭo. La publikaj rikŝoj devis tuj sin turni maldekstren, la puŝcaretoj senprokraste cedis al ĝi la vojon, la ŝultroportistoj kun ŝarĝoj sur siaj portvektaj rapidis flanken, la pasantoj tuj retiris sin en la vendejojn ĉe ambaŭ flankoj de la strato.

La piedsonorilo tintadas, la ŝtalaj radioj de la radoj briladas. La persona rikŝo, antaŭ ol oni povis ĝin vidi klare, kuris jam tre malproksimen, rapida kiel fulmo.

Kaj, laŭ statistiko de kelkaj anoj de la supera tavolo de la laborantoj por la rezistmilito, el la personaj rikŝoj tiu de sinjoro Hua Vej kuras plej rapide.

La tempo tre gravas por li. Li diris:

"Mi ja volonte nuligus la sistemon de nokta dormo! Krome mi dezirus, ke la tago konsistu el pli ol dudek kvar horoj. Ja tro multaj estas la laboroj por la rezistmilito!"

Tuj sekve, li elpoŝigis sian horloĝon, ĝin ekrigardis, kaj tuj streĉiĝis la abundaj muskoloj de lia vizaĝo. Li kuntiris la brovojn, forte kunpremis la lipojn, kvazaŭ li penus konverĝigi ĉiujn energiojn sur la vizaĝon. Li tuj iris for, por ĉeesti kunvenon de la Asocio por Helpo al Militrifugiintoj.

Kiel kutime, la kunvenantoj ĉiuj ĉeestis kaj sidis tie lin atendante. Kiam li atingis la enirejon de la kunvenejo, ĉe la eljinrikŝiĝo li utiligis laŭkutime la okazon piede ekpremi la sonorilon: tint!

La kamaradoj rigardis unu al alia. Nu, sinjoro Hua Vej alvenis. Kelkaj faris longan spiron. Sed iuj, kun longigita vizaĝo, fiksis sian rigardon al la enirejo. Unu eĉ pugnigis la manojn kaj malfermegis la okulojn, kvazaŭ li estus preta por duelo.

Sinjoro Hua Vej mienis majeste kaj eniris per trankvilaj paŝoj. Ŝajnis, ke lia antaŭe montrita rapidemo pro multa okupateco estas forsolvita de lia propra majesta sintenado. Li haltis momenton ĉe la enirejo, por ke oni povu lin vidi klare, kvazaŭ celante vekti en la kamaradoj konfidon, doni al la kamaradoj garantion: ili estu trankvilaj antaŭ ĉia ajn malfacilo. Li eĉ balancis la kapon. Liaj okuloj sin direktis al



*Lignogravuraĵo de Janhan*

neniu, sed leviĝis al la plafono. Li estis salutanta al la tuta kolektivo.

En la kunveno regis silento. La kunveno tuj komenciĝos. Iu tie foliumis paperojn, kun susuro.

Sinjoro Hua Vej ĝentile sidiĝis en malmulte atentata angulo, tre malproksima de la sidloko por la prezidanto. Li ne tre volis esti prezidanto.

“Mi ne povas esti prezidanto.” Li gestis per la mano kun cigaro en ĝi. “La direkcio de la Laborista Asocio por Rezistmilitaj Laboroj okazigos hodiaŭ kunvenon de sia konstanta komitato. Ankaŭ la kunveno de la Societo por Studo pri Popularaj Literaturo kaj Arto okazos hodiaŭ. Kaj mi devos iri al la Laborgrupo por Vunditaj Soldatoj, iom poste. Vi scias, ke por mi ne estas sufiĉa tempo, kaj mi povas partopreni ĉi tie la diskutadon nur dum dek minutoj. Mi ne povas esti prezidanto. Mi volus proponi por tio kamaradon Liŭ.”

Kiam li finis sian parolon, rideto ekbrilis ĉe liaj lipkomisuroj, kaj li delikate klakis kelkfoje per la manplatoj.

Dum la raportado de la prezidanto, sinjoro Hua Vej senĉese frotadis alumetojn por bruligi sian cigaron. Li metis la horloĝon antaŭ si, kaj ĝin rigardis de tempo al tempo, kvazaŭ ion kalkulante.

“Mi havas proponon!” li kriis. “La tempo estas por ni tre kara. Mi esperas, ke la raporto de la prezidanto estos laŭeble konciza; mi esperas, ke la prezidanto finos sian raporton en du minutoj.”

Post du minutoj da frotado de alumetoj, li subite ekstaris kaj mansvingis kontraŭ la paroladanta prezidanto.

“Sufiĉas, sufiĉas! Mi jam bone komprenis, kvankam la prezidanto ankoraŭ ne finis sian raporton. Ĉar mi devos ĉeesti alian kunvenon, permesu nun ke mi iom parolu pri miaj opinioj.”

Li paŭzis momenton, enspiris du buŝojn da cigarfumo kaj ĵetis ĉirkaŭrigardon al la kunvenantoj.

“Malmultaj estas miaj opinioj, kiuj konsistas nur el du punktoj,” li eklekis la lipojn. “La unua, nome, neni laboranto devas esti mallaborema, sed kontraŭe, ĉiuj devas labori intense. Pri tio ne necesas multe paroli, ĉar vi ĉiuj estas diligentaj junuloj, fervoraj al viaj laboroj. Mi tre dankas vin. Sed restas ankoraŭ unu punkto, kiun vi ne devas forgesi eĉ por momento; jen estas la dua punkto, kiun mi volas diri.”

Li fumis denove du fojojn, sed ŝprucis el la buŝo nur varma aero. Do li frotis ankoraŭ unu alumeton.

“La dua punkto, nome, la junaj laborantoj devas rekoni unu gvidan centron<sup>1</sup>. Nur sub la gvidado de tiu gvida centro vi povas disvolvi la laborojn por la rezistmilito. La junuloj estas diligentaj, fervoraj, sed, pro nesufiĉeco de kompreno, pro nesufiĉeco de laborsperto, ili facile falas en erarojn. Se mankus super ili gvida centro, ili ofte fuŝus la laborojn ne rebonigeble.”

Ĵetinte rigardon al la mienoj de la ĉeestantoj, li ekstreĉetis la vizaĝajn muskolojn, por montri ian rideton. Li daŭrigis:

“Ĉar vi ĉiuj estas junaj kamaradoj, mi diris tute sincere, senceremonie. Vi ĉiuj volas vin dediĉi al laboroj por la rezistmilito, do ne estas necese paroli ceremonie. Mi kredas, ke vi, junaj kamaradoj, certe akceptos miajn opiniojn. Mi tre dankas vin. Nu, pardonu, mi devas forlasi la kunvenon nun.”

Li surkapigis la ĉapelon, prenis la ledan pape-rujon sub sian brakon, kapbalancis kun okuloj direktitaj al la plafono kaj komencis elpaŝi kun ventro elstaranta.

<sup>1</sup> Celante plifortigi sian faŝisman regadon, la reakciuloj de Kuomintang substrekis, ke ilia reakcia reĝimo estas la gvida centro, al kiu ĉiuj devas submetiĝi absolute.

Ĉe la enirejo de la kunvenejo, li tamen ion ekrememoris. Li tiris flanken la kamaradon kiu prezidis, kaj flustris al li:

“En via laboro, ĉu estas ia malfacilo?” Li demandis.

“Mi ĵus menciis pri tio en mia raporto, ni. . . .”

Sinjoro Hua Vej etendis la montran fingron kaj rekte tuŝis per ĝi la bruston de la prezidanto, dirante:

“Nu, nu, nu, mi scias, mi scias. Mi ne disponas liberan tempon por tion preparoli. Estonte, vi povos iri al mia hejmo por konsiliĝi kun mi pri ĉio, kion vi pensos rilate al viaj laborplanoj.”

La longhara junulo, kiu sidis apud la prezidanto kaj ilin rigardadis kun atento, nun ne plu povis sin deteni de intermeto:

“Merkrede ni vizitis sinjoron Hua tri fojojn, sed sinjoro Hua ne estis hejme. . . .”

Tiu sinjoro Hua ĵetis al li malvarman rigardon kaj diris tra la nazo: “Nu, mi estis okupata de alia afero.” Kaj li daŭrigis sian flustradon al la prezidanto:

“Se mi ne estos hejme, vi povos paroli kun miss<sup>2</sup> Huang, kiu scias miajn opiniojn kaj povos ilin diri al vi.”

Miss Huang estas lia edzino. Kiam li parolas antaŭ aliaj pri ŝi, li kutimas tiel ŝin nomi.

Nur post tiu averto, li vere foriris. Nun li alvenis al la kunvenejo de la Societo por Studo pri Popularaj Literaturo kaj Arto. Li trovis, ke la kunveno estas iranta kaj ke estas parolanta unu el la ĉeestantoj. Li sidiĝis, bruligis sian cigaron kaj malkontente klakigis trifoje la manplatojn.

“Prezidanto!” li kriis. “Ĉar hodiaŭ mi devos partopreni ankoraŭ unu kunvenon, mi ne povos ĉeesti ĉi tiun ĝis la fino. Mi havas kelkajn opiniojn, kiujn mi volus prezenti nun.”

Kaj li elmetis du punktojn: Unue, la ĉeestantoj, li diris, ĉiuj estas kulturlaborantoj de la loko. La kulturlaborantoj devas intensigi siajn laborojn, kiuj havas grandan gravecon. Due, la kulturlaborantoj devas rekoni unu gvidan centron, ili devas kunligiĝi kaj unuiĝi sub la gvidado de la gvida centro de la Ĉefa Asocio de la Kulturaj Rondo por Rezisto kontraŭ la Malamiko.

Kvaronon antaŭ la sesa horo, li aperis en la kunvena ĉambro de tiu Asocio.

Nun rido kovris lian vizaĝon, kaj li kapbalancis por saluti ĉiujn.

“Pardonegon, pardonegon, ke mi malfruas tri kvaronojn.”

La prezidanto respondis al li per rideto. Sinjoro Hua Vej ridante ekmontris la langon, kvazaŭ li estus ion fuŝinta kaj timus pro tio riproĉon. Ĉirkaŭrigardinte la situacion, li elektis sidlokon apud iu kun eta liphararo kaj tie sidiĝis.

Kun ege sekretema kaj grava mieno, li demandis la lipharulon per mallaŭtigita voĉo:

“Ĉu vi ebriiĝis hieraŭ nokte?”

“Ankoraŭ ne, sed mi sentis ioman kapturiniĝon. Kaj vi?”

“Mi — mi ne devis gluttrinki tiujn tri glasojn,” li diris serioze. “Precipe la vinon de Fenjang mi ne povas gluttrinki. Direktoro Liŭ devigis min eltrinki. . . . Ha, mi ekkuŝis tuj kiam mi atingis la hejmon. Miss Huang diris, ke ŝi iros reguligi la kontojn kun direktoro Liŭ kaj demandi lin, kial li min ebriigis. Jen!”

Tion dirinte, li rapide malfermis sian ledan paperujon kaj elprenis paperon. Li skribis sur ĝi kelkajn vortojn kaj ĝin pasigis al la prezidanto.

“Bonvolu iom atendi.” La prezidanto interrompis la parolanton. “Sinjoro Hua Vej devas foriri por alia afero. Li havas kelkajn opiniojn kaj petas nun parolon.”

Sinjoro Hua Vej ekstaris, balancinte la kapon.

“Prezidanto!” Li iomete sin klinis. “Sinjoroj!” Li ree iomete sin klinis. “Unue mi petas de vi pardonon, ke mi iom malfruis kaj devas forlasi la kunvenon plifruue. . . .”

Kaj sekvis liaj opinioj. Li deklaris, ke la konstanta komitato de la Ĉefa Asocio de la Kulturaj Rondo por Rezisto kontraŭ la Malamiko estas la gvida institucio por ĉiuj laboroj nacisavaj kaj devas ludi ĉiumomente sian rolon de gvida centro.

“La popolamaso estas diverskonsista, kaj multaj estas niaj laboroj. Se ni ne sukcesus ludi nian gvidan rolon, estus tre tre danĝere! Fakte, la laboroj en diversaj kampoj ĉi tie ne povas ne havi gvidan centron. La ŝarĝoj antaŭ ni ja estas tre pezaj, sed, spite ĉian malfacilon kaj penon, ni devas ilin preni sur niajn ŝultrojn.”

Ripetfoje klariginte la gravecon de la rolo de la gvida centro, li metis sur la kapon sian ĉapelon kaj foriris por festeno. Ĉiutage li estis tiel okupata. Li devis viziti direktoron Liŭ por kontakto, li devis iri al la lernejoj por fari paroladojn, li devis iri al la diversaj organizaĵoj por partopreni kunvenojn. Krom tio, ĉiutage aŭ aliaj invitis lin al manĝo, aŭ li invitis aliajn.

<sup>2</sup> Angla vorto signifanta: fraŭlino.

Sinjorino Hua, ĉiam kiam ŝi renkontis min, plendis por sia edzo:

“Ve, li mortas de penoj! Tiom multaj estas liaj laboroj, ke li eĉ ne trovas tempon por manĝi.”

“Ĉu li ne povas sin okupi pri malpli da aferoj kaj sin dediĉi ekskluzive al nur unu laboro?” mi demandis.

“Kiel tio eblas? Multaj laboroj ja bezonas lian gvidadon!”

Sed foje sinjoro Hua Vej tute surpriziĝis, ke en la virinaj rondoj oni organizis Milittempan Asocion por Protektado al la Infanoj kaj tion tamen ne sciigis al li.

Li komencis serĉi informojn kaj esplori la aferon. Li klopodis kaj sukcesis venigi unu el la respondeculinoj de la Asocio.

“Mi scias, ke vi jam elektis vian komitaton. Mi pensas, ke oni povos pligrandigi la membraron de la komitato per kelke da personoj, sendotaj de nia Ĉefa Asocio de la Kulturaj Rondoj por Rezisto kontraŭ la Malamiko.”

Kiam li vidis, ke la aŭskultantino hezitas, li longigis sian vizaĝon.

“La problemo konsistas en la jeno: Ĉu vi, la komitatanoj, vere kapablas gvidi tiun laboron? Ĉu

vi povas garantii al mi, ke en via Asocio ne troviĝas naciperfiduloj, nek malbonuloj<sup>3</sup>? Ĉu vi povas garantii, ke en via laboro ne okazos eraroj nek sabotaĵoj? Ĉu vi povas tion garantii? Ĉu vi povas? Se jes, mi petas vin skribi vian garantion sur paperon kaj ĝin doni al la konstanta komitato de la estraro de nia Asocio de la Kulturaj Rondoj. Poste, se eventuale aperos io nenormala en via laboro, vi estos respondeca pri ĝi.”

Kaj li daŭrigis, klarigante, ke tio ne estas opinio lia, kaj ke li estas nur plenumanto. Nun li montris per la montra fingro la bruston de la aŭskultantino, demandante:

“Se vi ne povus fari kion mi ĵus diris, ĉu via Asocio ne fariĝus do organizo kontraŭleĝa<sup>4</sup>?”

Tia intertraktado okazis du fojojn, kaj sinjoro Hua Vej fariĝis membro de la komitato de la Milittempa Asocio por Protektado al la Infanoj. Post

<sup>3</sup> En la okuloj de la reakciuloj de Kuomintango, la progresemluloj estis “malbonuloj”. Noto de la trad.

<sup>4</sup> La organizoj kiuj, spite la faŝismajn leĝojn kaj dekretojn de la reakciuloj de Kuomintango, faris progresemlajn agadojn, estis konsiderataj organizoj kontraŭleĝaj. Noto de la trad.

## Gi Ĝiguang kaj Ĝaŭ Kuangĵen:

# La Ĉinaj Novjaraj Salutkartoj

EN la malnova Ĉinio oni prenis kiel Novjaran Tagon la unuan de la unua monato laŭ la luna kalendaro (t. e. la nuna Printempa Festo en februaro), kiu estis la plej grava festo en la tuta jaro. Dum la festo, krom kulti prapatrojn kaj diojn kaj ĝui per la tuta koro la solenon en ĝojo, oni reciproke gratulis ĉe renkonto de parencoj kaj amikoj. Kaj al la ne vidalvide renkonteblaj oni sendas salutan slipon por la nova jaro. Tio estis la embrio de la nuna novjara salutkartoj. La nuntempa kutimo sendi salutkarton por la Novjaro estas evoluinta ankaŭ de tiu moro.

La supre menciita novjara salutslipo ĝenerale estis rektangula ruĝa slipo kun skribitaj aŭ presi-

taj aŭ presitaj gratulaj vortoj kaj la nomo de la gratulanto, oni ĝin metis en ruĝan koverton ornamitan per oraj punktoj, desegnaĵoj aŭ vortoj bondeziraj kaj gratulaj.

Pri la kaŭzo kial oni devis uzi la ruĝan koloron por la novjara salutslipo kaj la koverto, ĉe la popolo iris la jena legendo: “Jaro” origine estis hommanĝanta monstro, kiu en ĉiu Novjara Tago eliris por mortigi homojn. Ĉar ĝi plej timis ruĝan koloron, tial en tiu tago oni ĉie pendigis ruĝan tukon por ĝin forpeli. En la sekvanta tago ĉiuj restis vivaj kaj gratulis pro tio unu alian ĉe renkontiĝo, ke oni jam pasigis la “jaron”. Poste la kutimo pendigi ruĝan tukon estis iom post iom anstataŭita de la ruĝaj novjara salutslipo kaj koverto.

Depost la dua jardeko de la 20-a jarcento, ekuziĝis en nia lando vizitkartoj, kaj oni uzis ilin ankaŭ por saluti aliajn homojn ĉe la Novjaro. Ili diferencis tiam de la ordinara vizitkarto nur per



tio, kiam la komitato kunvenas, sinjoro Hua Vej iras tien, kun sia leda paperujo sub la brako, por resti ĉirkaŭ kvin minutojn, kaj, parolinte unu aŭ du opiniojn, li surpaŝas sian personan rikŝon.

Itutage, li invitis min vespermanĝi, dirante, ke oni portis al li pecon da fumajita porkaĵo el lia naskiĝloko.

Kiam mi eniris lian hejmon, li estis flamanta per kolero kontraŭ du personoj, kiuj ŝajnis studentoj kaj ambaŭ portis sur la brusto insignon de la Ĉefa Asocio de la Kulturaj Rondoĵoj por Rezisto kontraŭ la Malamiko.

“Kial vi ne iris hieraŭ? Kial vi ne iris?” Li hurlis. “Mi diris, ke vi irigu kun vi kelkajn aliajn. Sed kiam mi komencis mian paroladon sur la estrado, mi ektrovis, ke eĉ vi mem ne ĉeestas! Vere mi ne komprenas, kion vi faris!”

“Hieraŭ, mi partoprenis la kunsidon pri japanaj problemoj.”

Sinjoro Hua Vej subite saltleviĝis.

“Kio? Kio? Kunsido pri japanaj problemoj? Kial mi ne sciis? Kial vi ne informis min?”

“La okazigon de la kunsido decidis tiutage la kunveno de nia sekcio. Mi venis viziti vian moŝton, sed vi denove ne estis hejme. . . .”

“Ho, vi agis sekrete!” Li kolere malfermegis siajn okulojn. “Diru al mi la veron: kia estas la konsisto de tiu kunveno? Diru al mi la veron!”

Ŝajnis, ke ankaŭ la aŭskultanto koleriĝis. “Kia konsisto? Ĉiuj partoprenantoj apartenas al la ĉina nacio! Tion decidis la kunveno de la sekcio; kiel ĝi povas esti nomata ago sekreta? . . . Via sinjora moŝto ne partoprenis la kunvenon; se vi ĝin ĉeestis, vi ne restis ĝis ĝia finiĝo; mi venis vin viziti, sed vin ne trovis. . . . Ni ja ne povas ĉesigi la laboron de la sekcio!”

“Al la diabloj!” Sinjoro Hua Vej kunpremis la dentojn kaj liaj lipoj tremis. “Vin gardu, vi, hm, vi, vi! . . .” Li falis sur la sofon kaj dolore tordis la buŝon. “La diabloj prenu ĉi tiujn, ĉi tiujn. . . . vin junulojn! . . .”

Kvin minutojn poste, li levis la kapon kaj timeme rigardis ĉirkaŭen. La du gastoj estis jam for. Farinte longan sopiron, li alparolis min:

“Ve, jen, jen rigardu! Kion fari kun la nuntempaj junuloj, la nuntempaj junuloj!”

Tiun nokton li freneze trinkis multe da vino, raŭke insultante tiujn junulojn. Li rompita tetason. Miss Huang lin apogkondukis al la lito kaj lin kuŝigis. Subite li ektemis kaj diris:

“Morgaŭ je la deka estos kunveno. . . .”

tio ke ili estis en ruĝo, dum la lasta estis blanka.

Dank' al la disvolviĝo de presarto kaj kombino kun metiarto, la nuntempa novjara salutkarto estas jam ne nur simbolo de gratulo, sed ankaŭ arta memoraĵo.

Laŭ presa tekniko, la novjarkartoj estas presitaj kuprakliŝe, zinkotipie, ksilografie, ofsede, lakoplate, punktitaj ore aŭ arĝente, ornamitaj per veluraj eltondajoj aŭ kristalo k.t.p. Ili estas diversaj ankaŭ en formo: iuj falditaj, aliaj konkavaj; kaj iuj plataj kaj aliaj konveksaj k.t.p. Kaj la bildoj, koloroj kaj enhavoj estas multe variaj. Ekzemple la novjarkartoj presitaj en la lastaj jaroj kun papertranĉaĵo aŭ ĉinstila pentraĵo, la novjarkartoj en formo de legomarkilo kaj diversaj metiartaĵoj, ĉiuj estas riĉaj je artismo kaj nuntempa spirito.

Pro la menciitaj karakterizaj trajtoj, kiujn havas la novjaraj

salutkartoj, kolektado de ili fariĝas ŝatokupo por multaj homoj. Ekzemple la fama granda pentristo Ĵen Bonian (1840-1895) de King-dinastio kolektis 19,000

novjarkartojn el 38 landoj, inter kiuj troviĝis multaj kuriozaj artaĵoj kaj raraj materialoj de kulturo kaj historio.



# Ĉe Geedziĝa Festo de Taj-oj

**K**UNE kun kelkaj kamaradoj mi venis al Ginghong de Hiŝuangbanna. Iutage, dum nia manĝo, iu taj-a junulo donis al ni invitkarton el smeralde verda arbofolio, sur kiu la jeno estas bele skribita en la taj-a lingvo:

“La dekkvina de februaro estas tago bonaŭgura. Floras la “ĉan-pa”-floroj, inter kiuj flirtadas papilioj. En la pura bambudomo mi respektate atendas la gastojn el Pekino por tosto ĉe la geedziĝa festo de mia filo.


Kang Lang-ŝuaj

Invitite de Kang Lang-ŝuaj, la taj-nacia poeto, por ĉeesti la geedziĝan feston de lia filo, ni kun senlima plezuro ekiris ĝustatempe. Ni iris laŭlonge de la bordo de Lancang-rivero, vadis trans Liŝa-rivero, kies fluo estas ĝistalie profunda kaj atingis Mansa-vilaĝon, kiu situas apud la rivero kun montoj ĉirkaŭe. Kang Lang-ŝuaj jam atendis starante sur la balkono de sia bambudomo por nin bonvenigi. Konforme al la moro de taj-oj, ni demetis la ŝuojn kaj supreniris la bambudomon kaj prezentis al li niajn gratulojn. Lia edzino regalis nin per pelvpleno da sukerkano. Manĝinte la sukerkanojn, ni sidiĝis ĉe la festotablo laŭ fervora peto de la mastro. Tiam,

la sidlokoj ĉirkaŭ la rondaj bambuaj tabletoj jam estis plenokupitaj de gastoj. Kiel dezirate de la mastro, ni dislokis nin ĉe kelkaj tabloj. Kaj baldaŭ poste, la parencoj kaj amikoj de la novedzo — aro da fraŭlinoj faris toston al la gastoj. Se vi ne povus trinki vinon kaj ne akceptus la trinkon, du el la fraŭlinoj perforte tenus viajn manojn dum iu tria verŝus la vinon en vian buŝon tason post taso.

Post la manĝo, Kang Lang-ŝuaj modeste diris al la gastoj: “Pardonon, niaj honoraj gastoj. La manĝaĵo kaj vino de mia familio ne estas bongustaj kaj vi certe ne trinkis sufiĉe kaj manĝis ĝissate. Bonvolu, do, iri al la familio de la novedzino por trinki kaj manĝi plu!” La gastoj unuanime diris: “*Inli, inli, ĝinjingla!*” (Dankon, dankon, jam satmanĝis). La mastro petis maljunulon el la gastoj ke li invitu kiel lia reprezentanto la aliajn gastojn por akompani lian filon al la domo de la novedzino. Samtempe, li donacis botelon da vino kaj paron da areko al la vastekonata *zanha* (kantisto) el la gastoj petante ke li iru kanti por la novedzo. Kiam ĉiokondiĝis, la junuloj komencis bati elefantpiedan tamburon kaj tamtamon kaj ludi *tingĉin*-ojn (speco de kordinstrumento), kaj kantante kaj dancante la grupo

iris al la vilaĝo kie loĝis la novedzino. Atinginte la vilaĝon, ĉiuj estis bonvenigataj de la gastoj ĉe la novedzino kun ĝojkrioj “*Ŝuj! Ŝuj! Ŝuj!*” Ni venis al la bambudomo de la novedzino kaj lasis la novedzon ĝin supreniri la unua. Sekvis laŭvice lia patrino onklo, la novedza reprezentanto, la *zanha* kaj aliaj gastoj. Estis tapiŝo en la salono de la novedzina domo, meze de la salono troviĝis du rondaj tabloj, sur kiuj estis unu telero da bananoj kaj unu telero da sukerkanoj. Ĉe unu




Ilustraĵo de Jang Jongking

ablo sidis la novedza reprezentanto kaj la *zanha* kompanante la novedzon, la alia tablo estis rezervata por la novedzino kaj la reprezentanto de ŝia familio. Ĉio estis preta por okazigi la geedzigan ceremonion. Sed en tiu momento la kunlinoj de la novedzino kaj ŝiaj parencoj kaŝis la novedzinon. Post momenta atendado, la *zanha* de la novedzo kantis: "Laŭdire, nia novedzino estas la plej lerta teksistino el la tuta vilaĝo. La ŝtofo de ŝi eksita estas pli mola ol la pizangfolio, kaj la floro de ŝi brodita allogas abelojn por nesti ĉe ĝi. Ni vidis la plej ĉarman kaj aroman *fentuan*-floron, kaj ni vidis la buntan pavoplumon. Ĉu nia novedzino estas la *fentuan*-floro aŭ la pavoplumo? Tuj ŝin perigu antaŭ nin!" La *zanha* de la novedzino respondis senprokraste: "Pro tio, ke sonas tro laŭte de la kanto kaj la muziko de niaj gastoj, la timema pavo jam timigite flugis for!" La novedza reprezentanto tute komprenis, ke la *zanha* ŝercis intence, sed ŝi do petadis per afablaj vortoj, kaj nur post iom da prokrasto oni fine envenigis la novedzinon. Vidante la novedzinon la novedza *zanha* tuj kantis: "Nia bela fraŭlino, la fianĉo tiel sopiris al vi dum la tago, ke li domaĝis, ke li ne havas flugilon; kaj li tiel sopiris al vi en la nokto, ke li bedaŭris, ke tro longa la nokto estas. Hodiaŭ li vidas vin, kaj ne plu sentas la aromon de la *fentuan*-floron, ne lin plu ĉarmas la pavoplumilo!" Lian kanton tuj sekvis tondraj ĝojkrioj.

Komenciĝis la tradicia geedziĝa ceremonio. La maljunulo, kiu reprezentis la patron de la novedzo, alvokis la paron de novaj geedzoj por ke ĉiu el ili tance flanke genufleksu kaj metu sian manon sur la manojn kaj sukerkanojn. Li sekve kantis antikvan geedzigan gratulon, kaj fine diris: "Bondeziron al vi, ke via kunvivo estu tiel dolĉa kiel sukerkano! ke viaj infanoj estu tiom multnombraj kiom la bananoj!" Tio denove kaŭzis bruan ridon ĉe la gastoj. Post kiam la novaj geedzoj respektive regalis la ĉeestantojn per manoj kaj sukerkanoj, la gastoj prenis diverscolorajn kotonfadenojn, ilin ligis sur la manojn de la novedzo kaj novedzino, kaj entuziasme ilin gratulis. Iu maljunulo kun blankaj haroj ligante

fadenojn tiel gratulis: "La floroj mallevas siajn kapojn kiam la avidaj papilioj preterflugas; nanbambuoj kapklinas kiam la laboremaj abeloj ilin preterflugas. Bondeziron al vi, ke vi vivu kiel la diligentaj abeloj!" Kaj ligante fadenojn iu fraŭlino benis: "Al vi, feliĉaj homoj, ni deziras, ke via amo estu tiel pura kiel la akvo de Lancang-rivero, ke via feliĉo estu ĉiamverda kiel la *bej*-folioj!" Fine iu maljunulo ŝerce diris: "Mi estas la lasta homo beni vin ambaŭ. La belaj floroj estas deprenitaj; la dolĉa sukero, elversita; kaj de la ruĝa nubo surĉiela ĝis la plumoj surteraj ĉio estas eldirita. Per kio do mi vin benu?" Post paŭzo, ŝi subite diris: "Mi deziras, ke vi fariĝu paro da katoj en la estonta vivo!" Ĉiuj ridegis pro la ŝerco. Iu junulo duonebria stariĝis kaj demandis: "Por ke la katoj kaptu la musojn en via domo?" Ankoraŭfoje ridis la gastoj. "Pri kio vi ridas?" diris la maljunulo kvazaŭ en kolero "Kato povas dormi apud varma fajrujo, kaj manĝi fiŝon kaj viandon ĉiutage. Ĉu tio ne estas bona!" Kaj ĉiuj ne povis sin deteni de refoja ridego. La *zanha*-oj de la novaj geedzoj ludis la *micin* (speco de muzikilo) kaj laŭtvoĉe kantkonkuris. La gepatroj de la novedzino invitis ĉiujn gastojn al la tabloj por la geedziĝa festeno. Manĝante ili aŭskultadis la kantojn kaj muzikon ĝis la tria horo post la noktomezo kiam ili finis la feston en ĝojo.



(Daŭrigo de p. 263)

Tio memorigis min pri la jena epizodo: Iu ĵurnalisto el okcidenta lando iam prezentis al li demandon:

"Kiel la lasta imperiestro de King-dinastio, via pasinta vivo estis la plej alta, plej feliĉa kaj plej luksa, kaj nun vi restas ĉi tie, ĉu ĉi tiu tempo ne estas la plej doloriga kaj malfeliĉa parto de via vivo?"

"Mia antaŭa vivo de 'imperiestro'," respondis Puji je la miro de la demandinto, "estis la plej malpura, plej hontinda kaj plej abomeninda. Nur ho-

diaŭ, ĉi tie, en la Administracio pri Militkrimuloj mi komencis mian veran feliĉan vivon!"

Tiu okcidenta ĵurnalisto neniel povis kompreni lin kaj foriris elreviĝe. Jen antaŭ mi sidas Puji. Ĉu lia persono mem ne estas viveca klarigo pri la respondo?

Dum la adiaŭo, Puji varme akompanis min eksteren kaj balancadis sian kapon salute. El ĉi tiu vizito, mi ekkonsciis pri tio, ke en nia socio flagras iaj fajreroj, la fajreroj de la venko de socialismo. En nia lando, ĉiuj, kiuj deziras kontribui sian forton al socialismo, havas antaŭ si vere larĝan vojon.



## MILITKRIMULO

## IMPERIESTRO

Intervjuo kun Ajsin Ĝjoro Puji

**F**ORPISIS jam 53 jaroj ekde la tempo kiam Ajsin Ĝjoro Puji, la lasta imperiestro de King-dinastio, surtroniĝis en la aĝo de tri jaroj. Ĉiuj anekdotoj kaj epizodoj pri ĉi tiu imperiestro estas ŝajne tute forgesitaj, krom la diro: "Ne ploru, ne ploru, jam tuj finiĝos, jam tuj finiĝos," per kiu lia patro, la princ-regento, kvietigis lin de plorado pro timo dum la surtroniĝa ceremonio, kaj kiu restis preskaŭ aŭguro pri la baldaŭa renversiĝo de la dinastio.

Je la antaŭvespero de la 18-a de Septembro 1959, Puji, punliberigita de la Popola Registaro per speciala amnestio, revenis al Pekino kaj komencis sian novan vivon en la maljunaĝo. Li estis vidita en la Botanika Ĝardeno; li aperis en la manifestacio kontraŭ la "Sekureca Traktato" inter Japanio kaj Usono; iuj diris, ke li denove fariĝis novedzo kaj starigis sian novan hejmon. . . . Ĉio ĉi atestas pri ŝanĝoj en la posta duono de lia vivo. Kiel li estis vekita el la sonĝo de imperiestro dum 40 jaroj? Kun multaj demandoj mi iris lin intervjui.

## NOVA EDZIĜO KAJ MALNOVAJ EDZIĜOJ

Mi renkontiĝis kun Puji sub granda arbo en la korto de la sidejo de la Komitato por Studado pri Kultura kaj Historia Materialoj, suborganizo de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En tiu komitato li nun laboras. En blanka ĉemizo el kalikoto, pantalono el nigre blua striita serĝo kaj surportanta ŝuojn el kotonŝtofo, la 56-jara Puji kun iom da blankaj haroj, kaj miopaj okulvitroj sur la malgrasa kaj longa vizaĝo aspektis kvankam iomete maljuna, tamen spirite sufiĉe viva. Komence li estis iom sinĝena, poste nia konversacio iom post iom vigliĝis. Laŭ lia parolo kaj konduto, laŭ liaj fortaj gestoj per la grandaj fingroj, . . . . . mi konstatis ke li jam fariĝis Puji alia ol la antaŭa.

La loĝejo de Puji estas en la okcidenta domo de la korto. Tio estas lia unua loĝejo en Pekino post lia nova edziĝo. Estas tre pure kaj bonorde en la domo, kaj la muroj estas plene kovritaj per gratulaj skribaĵoj, kvankam pasis jam pli ol unu monato post la edziĝo.

Kun feliĉa mieno, Puji puŝ-malfermis la pordon al la interna ĉambro, dirante, "Bonvenon, jen mia

dormĉambro." Ankaŭ ĉi tie ĉio estas en bona ordo, la nova ruĝsilka litkovrilo brile kuŝas sur la lito. . . . Puji ekscite ekparolis pri sia nova vivo.

La novedzino estas nomita Li Ŝuhian, laboranta en hospitalo en Ĉaŭjang-distrikto de Pekino. Interkoninte por kelka tempo, ili geedziĝis ĉijare je la antaŭvespero de la Unua de Majo. Multaj parencoj kaj kolegoj ĉeestis la geedziĝan ceremonion, dum kiu Puji diris kun emocio:

"Nun mi estas laboranto pri kulturo kaj historio, kiu mem perlaboras la ĉiutagan panon. Mi sentas grandan ĝojon pro tio, ke ni povas starigi feliĉan novan hejmon."

Rememorante tion, Puji restas ankoraŭ same emocia. Li diris: "Dum la pasinteco, mi kelkfoje edziĝis kun tuta solenaĵo de imperiestra edziĝo ricevante imperiestrinon kaj kromimperiestrinon. . . . sed sen vera familia feliĉo. Ĉar la antaŭaj edziĝoj estis nur plenumo de la feŭdisma sistemo, vere teruraj!"

Kiam la unuan fojon li elektis sian imperiestrinon, li estis 17-jara. Inter sennombraj fotoj de fraŭlinoj, el kiuj li povis laŭplaĉe elekti, li faris cirklon per krajono sur tiun de fraŭlino nomata Ven Hiu. Sed la imperiestra patrino ne konsentis, ĉar tiu fraŭlino apartenis al familio nenobela kaj malriĉa. Vole nevole, li faris la duan cirklon, ĉifoje sur la foton de Van Ĵong, kiu fariĝis imperiestrino, kaj Ven Hiu kromimperiestrino. La rezulto estis tute tragedia, unu foriris viva kaj la alia mortis en ĉagreno kaj malĝojo.

La dua fojo de lia edziĝo okazis en la tempo kiam li "surtroniĝis" en la marioneta lando "Manĉuguo". Ĉifoje li elektis Li Jukin kiel sian reĝinon, ankaŭ kiu lin forlasis poste. . . . .

## TRI ATESTILOJ KAJ TRI HEJMOJ

Nun li portis el la novgeedza ĉambro tekton el nigra led. "Mi havas ne nur unu hejmon ĉilokan, sed tute tri," li diris signifoplene kaj montrante la tekton, daŭrigis: "Mia nova vivo komenciĝis ĉi tie."

Jen li eltiris tri paper-pecojn kun variaj formatoj. Estas unu "Informilo pri Speciala Amnestio", unu "Atestilo de Elektoraĵta Civitano" kaj unu "Atestilo por Ĉeesto" de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco. Li komencis rakonti pri sia "dua hejmo"—la Botanika Ĝardeno, kie li faris fizikan laboron.

Tio ja estas afero neforgesebla. En la jaro 1960 Puĵi estis sendita por labori en la Botanika Ĝardeno de la Botanika Instituto de la Ĉina Akademio de Sciencoj. Tiam estis frua printempo. Puĵi laboris en ĝia varmejo inter la laboristoj, kun kiuj li jam bone interkonatiĝis post kelkaj tagoj. Ĉiun tagon ili kune flegis la plantojn kaj florojn, akvumis, sterkis, semis . . . . en la Botanika Ĝardeno kie estis kulturataj kelkaj miloj da specoj de vegetaĵoj, kiuj multe interesis lin kaj li ekamis tiujn simplajn laborojn kaj aktive partoprenis en ekstermado de la muŝpupoj kaj aliaj insektaĉoj.

Dum li laboris en la Botanika Ĝardeno li unuafoje en sia vivo iris partopreni manifestacion, tiun kontraŭ la "Sekureca Traktato" inter Usono kaj Japanio. Kaj en tiu tempo li ricevis la "Atestilon de Elektoraĵta Civitano". Li ankoraŭ memoris la daton de ricevo: la 26-a de novembro.

Menciante pri la Botanika Ĝardeno, Puĵi diris kun sopiro, "Ankaŭ tie estas mia hejmo". Jam unu jaron li forlasis ĝin, li tamen ofte reiris tien por viziti la laboristojn, kun kiuj li antaŭe kune laboris. Antaŭ nelonge li ĵus iris denove al tiu "hejmo" kun sia nova edzino.

### "MIA TRIA HEJMO"

Parolante pri la lernado kaj ideologia reformiĝo, li nature memoris pri sia "tria hejmo".

Li aludis la Administracion pri Militkrimuloj en Fuŝun. Li efektive amikiĝis kun la laborantoj de tiu institucio, kun kiuj li ĝis nun ankoraŭ korespondadas. Li ofte parolis kun siaj kunuloj pri la memorindaj tagoj, kiujn li pasigis tie, kaj kiel li paŝon post paŝo ekkonis sian pasintecon. Estas ankoraŭ freŝa la memoro: kun kia sento de timo kaj maltrankvilo li atendis punon, kiam li enloĝiĝis tie.

Kun kompleta malesperiĝo kaj necerteco pri la estonteco li surpaŝis la vagonaron veturonta de Habarovsko, Sovetunio al Fuŝun.

"Nun vi jam revenis al via patrolando. Ni venas por transakcepti vin laŭ la ordono de Ĉefministro Ĝou." Tio estis la unua frazo, kiun diris al li la laborantoj de la publika sekureco en la vagonaro. Tiuj afablaj vortoj forigis lian imagon pri "atendata pugnobato kaj enkateno". Kaj tiam li ekloĝis en la "hejmo" en Fuŝun kaj komencis iom post iom surpaŝi la vojon de reformiĝo ideologia kaj renoviĝo.

De timemo kaj maltrankvilo ĝis la elpaŝo antaŭ la internacian tribunalon kiel atestanto vidalvide

kontraŭ japanaj militkrimuloj estis vojo zigzaga kun sennombraj luktoj en sia penso. Neniu alia krom la koncernito mem povus imagi la ĝojon kaj senton de senpezeco de tiu, kiu subite povis deprenis de si la ĉiam pezantan mil-ĝinan ŝarĝon. En ĉi tiu "hejmo" Puĵi sentis veran varmon por la unua fojo en sia vivo.

En la mateno de la 10-a de marto 1956, Puĵi estis sciigita ke li iru al la oficejo kune kun Puĝie, liaj tria kaj kvina bofratoj kaj tri nevoj. Tie li vidis, ekster la atendo, sian sepan onklon Dajtaŭ kaj siajn trian kaj kvinan fratinojn, kiujn li ne vidis jam 12 jarojn. Intervidinte sin, ili eklarmis ne povante ekparoli, kvankam ja multon ili havis por diri. Post longa tempo Dajtaŭ klarigis:

"Antaŭ nelonge, mi vidis Prezidanton Maŭ en la Tutlanda Kongreso de Popolaj Rezentantoj. Li diris al mi, ke vi estas tie ĉi kaj demandis, ĉu mi volas vidi vin. . . . ." Tiam iu el ili ne povis sin deteni de esploro. Estas ordinara afero, ke onklo vizitas sian nevon. Sed por Puĵi, tio ne estis tiel simpla. Dum la pasintaj tempoj kiam li vivis la vivon de "imperiestro", la pordoj de la palaco estis tute fermitaj por ordinara rilatiĝo inter la parencoj. Okaze de festoj kaj Novjaroj, kiam la onkloj kaj gefratoj vizitis lin, ili devis riverenci antaŭ li surgenue. . . . Nur hodiaŭ en la nova socio ili ekriatas inter si kiel veraj parencoj kun sento de samaj sango kaj karno.



*Puĵi en la Pekina Botanika Ĝardeno.*

*Foto de Huang Hiangkun*



Puji kaj lia nova edzino. Foto de Huang Hiangkun

Kiam Puji rakontis pri ĉi tiu epizodo, li rimarkis: “En ĉi tiu ‘hejmo’ mi vere renaskiĝis reformita. Tion mi ne povos forgesi dum mia tuta vivo.”

Liaj parencoj ankaŭ ricevis profundan impreson dum la vizito. Liaj fratinoj diris kortuŝite: “Ĉio estas bona ĉi tie, ĝi estas kvazaŭ lernejo, ni fariĝis tute trankvilaj.”

## ANTAŬ LA ĈIELPACA PORDEGO

Al la demando, kio plej profunde lin impresis post la alveno al Pekino, Puji respondis post momenta pripenso: “La Ĉielpaca Pordego”.

La unuan fojon li staris antaŭ la Ĉielpaca Pordego je la 10-a de decembro 1959, kien li venis kun sia kvina fratino tuj post elvagoniĝo. Ĉi tiu konstruaĵo estas atestanto de la historio de la ĉina popolo, kaj kun ĝi ligiĝis ankaŭ liaj personaj ĝojoj kaj malĝojoj de la unua duono de lia vivo. Por 15 jaroj li estis internigita en la “palaco” post ĝi, ricevis feŭdisman kaj imperiismo-adoran edukadon, ludis neenviindan rolon en la farso de restarigo de la imperio, kaj surpaŝis la vojon de krimo. . . . Nur kiam la unua ruĝa flago fiere ekflirtis en la aero, la Ĉielpaca Pordego denove spiris libere kun levita kapo. Sekve de tio ankaŭ Puji ekhavis sian novan vivon. Li ĉeestis la revuadojn de paradoj okaze de la Unua de Majo kaj la Unua de Oktobro. Li mem marŝis tie inter la manifestaciaj vicoj kontraŭ la “Sekureca Traktato” inter Japanio kaj Usono, kaj li ekiris de ĉi tie por komenci observovojaĝojn al di-

versaj lokoj tra la vasta patrio. La ŝanĝiĝo de la Ĉielpaca Pordego fariĝis ankaŭ la limŝtono inter la novo kaj malnovo de lia vivo. Por memoro de sia renaskiĝo li eĉ fotigis sin antaŭ la pordego.

Puji vizitis multajn lokojn, kaj tiu, kiu plej impresis lin estis Ĉangĉun. Ĉar kio povas fari pli profundan impreson ol ŝanĝiĝo de la loko revizitata, kies pasintecon oni bone konas!

Ĉangĉun estis la “ĉefurbo”, nomata Hinging, de la marioneta “Manĉuguo”, kies monarko li estis. Nun post pli ol dek jaroj ĝi jam radikale ŝanĝiĝis. La malnovaj sidejoj de tiuj krimfaraj marionetaj Konsilantaro de Ŝtataferoj kaj ok ministerioj nun fariĝis hospitalo, lernejo, scienca instituto ktp. La palaco, kie Puji “surtroniĝis” kaj loĝis, nun estas resanigejo por la laboranta popolo. Malaperis la statuo de Kodama, ĉefo de la japana invadarmeo. La tiel nomata Kodama-parko nun taŭge alinomiĝas “Triumfo”. Ĉio ĉi donis al Puji ekscitiĝon kaj ĝojan kontentiĝon. Rememorante sian vojaĝon li diris:

“Tio estis por mi granda instruo kun plej profunda impresio. Antaŭ la laboristoj de la Nord-oriento mi sentis honton kvazaŭ ŝtelisto kondukita renkonte al la priŝtelito. La venko de la kamparanoj de la popolkomunumoj super la naturaj katastrofoj multe min tuŝis. Mi admiras ilian sentiman spiriton por konkeri la malfacilaĵojn. Kaj mi sentas fieron kiel ĉino. Naturaj katastrofoj dum tri sinsekvaj jaroj signifis en la pasinteco nenion alian ol dezertan teron en vasteco, plenan de senhelpaj malsatantoj, tiel ke multaj homoj devas vendi siajn gefilojn kaj eĉ uzi homajn ostojn anstataŭ fajrolignon. La granda malsatego en la jaroj de Guanghju-erao falĉis sennombrajn vivojn, sed tiam la kortego kaj altranguloj de la dinastio ankoraŭ vivis en lukso kaj diboĉo. Unu manĝo de la imperiestra patrino Ĉihi konsistis el pli ol cent pladoj, malgraŭ la malsatego de la popolo. Nun, kvankam okazis katastrofoj kiuj estas la plej gravaj en la periodo de la pasintaj kelkdek jaroj, tamen tute alia estas la sorto de la popolo. La Komunista Partio kaj la Popola Registaro aplikis diversajn kontraŭrimedojn por faciligi la vivon de la popolo. Kaj la malfacilaĵoj estas konkeritaj per unuigita klopodo de la tuta lando.”

## LARĜA VOJO

Puji ĉiam rigardas al sia estonteco kun ĝojo kaj espero. Nun li ĵus finverkis sian aŭtobiografion *La Antaŭa Duono de Mia Vivo*, kiu konsistas el 500 mil vortoj. La manuskripto jam estas en kompostado.

Li estas kontenta pri sia nuna laboro:

“Kiel ĝoja kaj fiera mi estas fariĝinte guto en la vasta maro de la ĉina popolo kaj kontribuante mian forton al ĝi.

(Daŭrigo sur p. 260)

**E**N LA URBO SUĜOŬ sin trovas multaj pitoreskaj stratetoj, longaj, mallarĝaj kaj serpentumantaj, kies pavimaj ŝtonetoj ovosimilaj lavite de noktaj rosoj aŭ ekpluvoj, estas glataj kaj brilaj. Apude ofte kuŝas rivereto kiu estas same longa, mallarĝa kaj serpentumanta. La akvosurfaco estas moviĝema; kiam ekblovas venteto, ĝi tuj milde ondetas kvazaŭ senbrue flirtanta verda silkrubando. Super la rivereto malgrandaj pontoj intervidas unu alian nur de kelkdek paŝoj. Jen estas ĝiba ŝtona arkponto, jen eleganta ponteto el ŝtonaj platoj, estas ankaŭ pontetoj lerte konstruitaj el brikoj aŭ el ligno kun lakitaj balustradoj. Ĝuste kiel la poeto el Tang-dinastio, Du Ŝunho pri-kantis:

*Veninte al Suĝoŭ vi vidas,  
Ke 1' domoj fluetojn najbaras,  
Malnovaj palacoj prezidas,  
Pontetoj multnombre distaras.*


Tamen, la poeto ne-  
glektis la alian karak-  
terizaĵon: ĉe la piedo  
de pontoj ĝenerale sin  
trovas tetrinkejo aŭ  
vendejo de bola akvo  
kaj teo. Kiam ektagi-  
ĝas, la tetrinkejo jam  
estas plenigita de  
klientoj. Tenante dik-  
ventran tekruĉeton en  
siaj manoj maljunuloj  
babiladas, ŝercas kaj  
ridas por pasigi la  
matenojn. Tio donas  
bruon kaj viklecon al  
la antikvaj kaj kvietaj  
stratetoj en Suĝoŭ.

Nia silkteksejo lokiĝas ĝuste apud tia ŝtonpavi-  
mita strateto tipe suĝoŭa. La maljunaj laboristoj de  
la fabriko ŝatas ĝui teon en la tetrinkejo kiu situas  
apud la okcidenta fino de la strateto ĉe la ŝtona  
arkponto. La elpendaĵo de la butikoj estas tiel mal-  
nova ke ĝi jam nigriĝis de fulgo kaj la skribaĵo estas  
malfacile legebla. Sed tio ne gravas — ĉu ĉe la  
strateto vivas iu kiu ne scias la tetrinkejon “Si Haj  
Ĉun” (Printempo inter la Kvar Maroj)? Ĉi tie la  
akvo estas sufiĉe boligita, la teo tre bonodora, kaj  
krome la kelneroj tre afablaj. Pro tio la tetrinkejo  
estas sufiĉe prospera. Ĉiutage oni servas en du pe-  
riodoj, nome la matena kaj tagmeza. La matena  
komenciĝas de la kvina kaj daŭras ĝis la naŭa, la  
plejparto de la gastoj tiam estas laboristoj de la meza  
labordeĵoro; la tagmeza, fakte posttagmeza, daŭras de  
la dua ĝis la kvina ptm., kaj la plejparto de la gastoj  
estas laboristoj kiuj jam finis sian laboron de la frua  
laborvico. Ĉiuj klientoj estas malnovaj. En la trin-  
kejo troviĝas sep aŭ ok kvadrataj tabletoj, la sidlokoj  
de ĉiuj klientoj estas fiksaĵ, kvazaŭ ili estus farintaj

**Fongĝang:**

## ĈE PONTO DE RIVERETO

*Ilustraĵo de Vu Venĵuan*



interkonsenton inter si. Oni diras ke sidi ĉiam sur  
la sama loko estas kutimo de tetrinkantoj.

La projektisto, majstro Hua Gujvu, kiu antaŭe  
estis laboristo por reprodukti desegnaĵojn de teksaĵoj,  
kutimas tie trinki teon en mateno. Li ĉiam prenas  
la sidlokon ĉe la fenestro. Kiam la teo estas infuzita,  
li laŭkutime malfermas la fenestron, sub kiu serpen-  
tumas la mallarĝa rivereto. Ĉe la horizonto de la  
orienta ekstremo de la rivereto ardas la belega ma-  
tenruĝo kun tonoj de ruĝo, purpuro, flavo kaj oranĝo,  
ankaŭ la blua akvo de la rivereto estas kovrita de  
maldika tavolo da ruĝa koloro. La pendantaj salik-  
branĉoj trans la rivereto ekbrilas kvazaŭ orumitaj  
kaj balanciĝas en la venteto. Kelkaj alaŭdoj kun  
verdaj flugiloj viglepe pepadas saltante inter la or-  
koloraj branĉoj. La ŝtona arkponto, levinte sian ĝiban  
dorson kaj sin vestinte per kolora vesto de maten-  
ruĝo, mienas vivplezure. Sur ĝi iu maljunulo sin  
ekzercas en mildmova *Tajĝiĉuan* (speco de ĉina korp-  
ekzerco) . . . . . Majstro Hua Gujvu profunde en-  
spiris la freŝan aeron kaj ektrinkis la bonodoran teon.

Li reve direktis sian rigardon ekster la fenestron. Ŝajnas ke li estas denove ravita de la kvieta kaj bela pejzaĝo de la frumateno ĉe la rivereto! Ĉi tie, li sentas plenan senĝenecon en la koro kaj estas plene libera en la animo, tiel ke li sentas sian sinon senlime vasta. Lia imago jam ŝvebas kvazaŭ birdo kun etenditaj flugiloj, kaj lia penso galopadas kvazaŭ ĉevalo. Ĉiu vidaĵo kaj ĉiu objekto en la ĉirkaŭo ofte elvokas ĉe li ideon por ia nova desegnaĵo kaj helpas lin en projektado aŭ kreado de tia por silkoteksaĵo. Oni diras ke la silkaĵo *Juanjangĉoŭ* de li projektita kaj tre ŝatata de la konsumantoj en kaj ekster nia lando, estis kreita sub la inspiro de la bela pejzaĝo de la rivereto, plene duŝita de matenruĝo.

Iufoje, sidante ĉe la kvadrata tableto apud la fenestro kaj trinkante teon mi ludis kun li ĉinan ŝakon. Mi kaptis okazon por ŝakigi lian marŝalon per mia ĉevalo kaj kriis kontente: "ŝakon kun elimino de ĉaro!" Post momento, li ankoraŭ ne movis sian ŝakdisketon kaj mi pli kontente kredis ke li jam falis en embarason kaj vane cerbumas por liberigi sin el la situacio. Mi kapbalancante diris ankoraŭfoje: "ŝakon kun elimino de ĉaro!" Sed li donis nenian respondon. Eklevinte mian kapon, mi trovis ke lia rigardo direktiĝas ne al la ŝaktabulo sed eksteren de la fenestro. En malbona humoro mi diris: "He! kion vi rigardas? Jen ŝakas via marŝalo!" Nur tiam li returnis sian kapon kaj diris ridetante: "Vidu, kia belo!" Mi lasis la ŝakdisketojn kaj rigardis en la direkto de li montrita. Jen el sub la arkaĵo de la ponto elŝoviĝis boato. Sur la pruo sidis vilaĝanino en helblua substofita ĵaketo kaj iom mallonga pantalone el nigra ŝtofo, sub kiu sin montris paro da kruroj en ŝtrumpoj rozkoloraj. Sur la kapo estis blua kap-

tuko kiu estis ruĝe kaj blanke striita ĉe la randoj kaj ĉarme alfiksita kun ŝiaj du anguloj ruĝe broditaj kvazaŭ du papilioj ĝuste ĉe la flankoj de la hartubero malantaŭ la kapo. Sur la hartubero estis ornamita vico da perlosimilaj jasmenfloroj. Eble la "papilioj" estus suĉantaj nektaron el la floroj? La junulino sidis tiel senzorge kaj trankvile kun rideto. Sur la poŭpo staris forta junulo, energie manipulanta la remilon. La boato glitis el sub la ponto kaj antaŭen plu laŭ la bordo tra en la kurteno el pendantaj salikbranĉoj. La fleksiĝemaj, flirtantaj ekstremaĵoj de salikbranĉoj trempiĝantaj en la akvo de la rivereto, milde karesis la pruan de la boato, la belan kaptukon kaj ĵaketon de la junulino, kaj la grandajn manojn de la remanta junulo ĉe la poŭpo.

Mi diris malatente kaj ridetante: "Kio mirinda? Tio estas membroj de vilaĝa popolkomunumo, kiuj venas viziti siajn parencojn en la urbo. Ĉu vi ne vidas la korbon kun ovoj apud la piedoj de la knabino?"

"Jes, estas vizito al parencoj!" diris majstro Hua Gujvu. "Tamen, rigardu ŝian veston, rigardu la desegnaĵon sur ĝi. . . . !"

Efektive, estis bela desegnaĵo sur ŝia vesto. Ĉar la oblikvaj sunradioj ĵetis belan ombron de la milde flirtantaj salikbranĉoj sur la helkoloran ĵaketon. Estas en moviĝo la boato, la salikbranĉoj kaj la ombro: belege montriĝis la desegnaĵo sur la vesto.

Nur tiam mi ekkomprenis lin kaj rimarkis admire: "Ĉiam pri la samo sin okupas via koro!"

Kaj ni daŭrigis la ŝakludon. Kompreneble majstro Hua Gujvu ne povis elsavi sian marŝalon sub la premo de mia ĉevalo kaj perdis la partion. Tamen,

## Popolaj Rakontoj

Ilustraĵoj de Ĝang Guangju

### Fidela Amo

Longe, longe antaŭe enamiĝis knabino Tamanzi kaj junulo Talĉalajlu, sed kiuj loĝis aparte sur la du bordoj de rivero kaj ne povis renkontiĝi unu kun la alia, ĉar tie ne estis ponto super la rivero. Poste, la Riverdio estis kortuŝita de ilia sincera amo kaj sorĉe transformis en belan ponton por ke ili povu renkonti unu la alian. Sed la monavida onklino de Tamanzi volis ŝin edzinigi al la kapulo kaj faris insidon kontraŭ la vivo de Talĉalajlu, send-

ante murdiston kaj lin mortigis per venena sago. Pro la malfeliĉo kaj sia fideleco al la amato, la knabino sin mortigis. Post la morto, la geamantoj fariĝis du

belaj birdoj, kiuj kantadis ĉiam kune.

(Laŭ tibeta popolarakonto)

### Svato

Iam antaŭe, vivis mjaŭ-nacia junulino nomata Ŝimej. Ŝi sciis brodi florojn kiuj aspektis pli belaj ol la veraj; kaj ŝia vizaĝo estis pli ĉarma ol la luno, tiel ke la lasta paliĝas, kiam ŝi turnis al ĝi la vizaĝon. Dekoj da junuloj ŝin svatis, sed al neniu ŝi donis sian manon. Kia homo do povis konkeri ŝian koron? Juna kamparano Longvang ŝin vizitis. Tiam du svatantoj jam estis ĉe ŝi. La unua diris: "Mi estas riĉa; mi vin vestos per silkaĵoj, se vi edziniĝos al mi!" la dua diris: "Mi havas bienon; neniam



kiel dirite, post tri monatoj lia nova desegnaĵo nomata *Cujvenĝin* akiris grandan sukceson. Tiu desegnaĵo estas jene: sur helverda silkteksaĵo montriĝas en malforta tono salikbranĉoj inter kiuj ĉarmas persikfloroj. Klaraj estas la inter si variantaj koloroj kaj plaĉa estas la aranĝo de nuancoj, tiel ke ĝi impresas per mildeco, eleganteco. *Cujvenĝin* estis klasigita inter la unuagradajn specojn en la Tutlanda Konkurso de Novaj Specoj de Silkaĵoj.

Tiutempe li tenis en siaj manoj dikventran tekruĉeton, silente apogante sin sur la fenestrobreto. Ĉu li estis gustumanta la teon aŭ pensanta pri nova desegnaĵo? Ĉu li estis admiranta la matenan pejzaĝon kolorigitan de la matenruĝo aŭ lasanta sian imagon-birdon flugi en senlima vasteco?

Subite en la salono eksplodis ekrido. Sen rigardo mi povis scii ke tio okazis ĉar alvenis majstro Ĝoŭ Ĉaŭlung al sia kutima sidloko por trinki teon post sia ekzercado de *Tajĝiĉuan*. Lia apero tuj vigligis la tutan tesalonon.

Inter la klientoj li estas la plej maljuna, estante pli ol sesdek-jara, sed havas tre fortikan korpon. Ĉiutage en frua mateno, li antaŭ ĉio sin ekzercis en *Tajĝiĉuan* sur la ŝtona arkponto, kaj nur post kiam ŝvitgutetoj aperas sur lia nazpinto kaj lia tuta korpo iĝas varmega, li envenas por trinki teon. Li havas alian kutimon ol majstro Hua Gujvu, kiu tetrinkas tute silente; trinkante teon li amas babiladi. Li estas homo gaja, ŝercema kaj scianta multe da anekdotoj kaj senfine rakonti. Eĉ majstro Hua Gujvu ofte estas absorbita de liaj vivecaj rakontoj.

Iufoje la maljunulo demandis majstron Hua Gujvu: "Vi estas fakulo pri desegnado. Ĉu vi iam atentis pri la desegnaĵo sur la frunto de silkraŭpo?"

Majstro Hua iom hezitis kaj fine diris: "Ĉu vi parolas pri la kvar nigraj punktoj sur ĝia frunto?" Li laŭdis dirante: "Trafe! Vi bone observis! Tamen, ĉu vi scias ilian devenon?" La projektisto ne plu povis respondi. Tiam majstro Ĝoŭ Ĉaŭlung ekrakontis pri la deveno de la kvar nigraj punktoj: Antaŭ multaj kaj multaj jaroj, homoj volis kulturi la teron, sed ne estis sufiĉe fortaj por tiri la plugilon; homoj volis teksu silkaĵojn por fari veston sed ne havis silkon. Sciiginte pri tio, la silkraŭpo, la pordgardisto de la Suvereno de la Ĉielo, intencis malsupreniri al la mondo por helpi ilin, kaj li persvadis la maljunan bovon, la tirbeston de la Suvereno de la Ĉielo, malsupreniri por helpi homojn plugi la teron. La maljuna bovo estis timema kaj ne kuraĝis ŝtele malsupreniri al la mondo. Tiam la silkraŭpo diris: "Ne timu, sed kuŝiĝu sur mian kapon, kaj mi kunportos vin malsupren. La tutan respondecon mi prenos sur min." Tiel, la silkraŭpo kunportis la maljunan bovon al la mondo. La kvar nigraj punktoj sur ĝia frunto estas la piedsignoj de la maljuna bovo.

La rakonto ravis la tutan tesalonon, inkluzive la veteranajn laboristojn, kiuj pasigis la plejparton de sia vivo super silkteksilo.

Sed iu, kiu sidis ĉe angulo de la salono kaj estis kritikema, subite demandis: "La bovo estas granda kaj fortika, dum la silkraŭpo estas tre malgranda, kiel la lasta povus kunporti la unuan al la mondo?"

Majstro Ĝoŭ Ĉaŭlung laŭte ekridis: "Vi scias nur unu flankon, sed ne la alian. Kiam la silkraŭpo ĵus alvenis al la mondo, ĝi estis kelkdekoble pli granda ol la maljuna bovo. La silko de ĝi elvomita estis pli dika ol kablo, per kiu oni tute ne povis teksu. Por servi la homojn, ĝi sin malgrandigis kaj malgrandigis,

mankos al vi manĝaĵo, se vi fariĝos mia edzino!" Kaj Longvang diris: "Mi havas nek monon

nek bienon, sed mi povoscias terkulturadon!" Li surgrimpis la monton, kaj per unu mano sin kroĉante al trunko de arbo, li sukcesis elplugi terakampon per la alia mano sur kruta montdekklivo. Ekamegis lin la junulino, kaj ili fariĝis feliĉaj geedzoj.

(Laŭ mjaŭa popolrakonto)

## Longhara Junulino

De la mezo de montkrutaĵo pendas akvofalo, kiu fluas ĝis la kampoj, kvazaŭ fasko da blankaj malsupren pendantaj haroj de virino. Ĝin oni nomas Blankhara Fluo.

Estas legendo pri ĝi. Antaŭe, ĉiloke, ne estis akvo, kaj oni devis vektporti akvon de loko fora je

sep lioj. Estis longhara junulino, kies haroj estis brile nigraj kaj treege longaj. Iutage, ŝi trovis



ĝis ĝi fine fariĝis tiel malgranda kiel nun ĝi estas. La ŝtofo teksita el ĝia silko estis tiel mola kaj malpeza ke oni neniel povis trovi pli taŭgan materialon por la sama celo!"

"Ĉu vere?" iu gasto serioze demandis.

"Kompreneble tio estas mito!" majstro Hua Gujvu intermetis.

Sed la maljunulo Ĝoŭ diris serioze: "Kvankam mito, tamen la karaktero de la silkraŭpo estas vere tre nobla. Pensu, ke ĝi volonte mortas nur post kiam ĝi elvomis la tutan silkon el sia ventro."

Kiel interesa rakonto!

Aŭskultante la rakonton de majstro Ĝoŭ, mi ofte forgesas trinki teon.

Do tute ne mirinde, ke la tablo, ĉe kiu sidas majstro Ĝoŭ, ĉiam estas la centro de babilado en la tetrinkejo.

Nun, la maljunulo serioze kaj fervore konsilis onklinon Ĉangbaŭ, la kelnerino de la tetrinkejo, ekzerci sin ĉiutage en *Tajĝicuan*. Ŝi havas pli ol kvardek jarojn kaj estas tiel dika ke ŝia kolo estas preskaŭ ne videbla, malgraŭ tio, ŝi ŝatas sin beligi. La finaĵo de la mallonge tondita hararo iom levas sin malantaŭ la kapo, kaj sur la harpinglo ŝi ĉiam alfiksas florojn. Portante kupran kruĉegon, malfacile spirante ŝi enverŝis ĵus boligitan akvon en la tekruĉeton por la gastoj kaj ĉagrene plendadis: "Se mi ĉiam ankoraŭ tiel plidikiĝos, mi eĉ ne povos porti min piede."

La mankoeltrovema viro ĉe la solonangulo diris: "Ne nur tio, minacos cetere apopleksio."

Onklino Ĉangbaŭ estis tiel timigita, ke ekstremitis al ŝi la mano portanta la kupran kruĉegon.

"Ne tiom certe atakos apopleksio", diris majstro Ĝoŭ, "tamen, mi konsilas vin ekzerciĝi en *Tajĝicuan*. Ĉar ĝi tre bone efikas al la sano. Dank' al tio maldikulo plidikiĝos kaj dikulo malplidikiĝos. Onklino Ĉangbaŭ, disĉipliĝu al mi!"

Onklino Ĉangbaŭ ekkriis per sia tinte klara voĉo: "Ho ĉielo, ekzerco de *Tajĝicuan*! Ĝi ŝajnas al mi ke oni faras desegnaĵon en la aero, ian nerekonblan skribajon de talismano el la manoj de fantomo. Kiel malbele!"

Ĉiuj tetrinkantoj ekridis pro ŝia parolo.

La maljunulo neniom malkuraĝiĝis, nek malpliĝis lia fervoro kaj li daŭrigis: "Kial malbele, ĉu vi ne vidas ke mi ekzerciĝas ĉiutage?"

"Vi estas viro, dum mi estas virino!"

"Kial diferencigo por la virino? Ĉu viro kaj virino ne estas egalaj!"

Ĉiuj denove ekridis laŭte.

Certe la malgranda tetrinkejo ĉe la ponto estas mondo zorgolibera kaj interesa por maljunuloj!

Tamen, hazarde aperis en la tetrinkejo ankaŭ junaj gastoj, havantaj malpli ol tridek jarojn. Ili apartenas al la juna generacio de la teksejo. En la komenco mi iom miris pri tio, ke ankaŭ la ĝejunuloj interesiĝas pri tetrinkado. Post iom da observo mi trovis ke ili ja venas por peti instruojn kaj lerni el la sperto de produktado de la maljunaj majstroj, aŭ por peti konsilojn kiam ili renkontas malfacilaĵojn en teknika renovigo. Ili scias ke la maljunaj majstroj




aperturon de fonto sur la krutaĵo ŝtopitan per rafano, sed la Montodio malpermesis al ŝi malkaŝi la sekreton, alie, li dronigos ŝin per torento, kio multe ĉagrenis ŝin, tiel ke ŝiaj haroj blankiĝis. Fine ŝi tamen decidis sin oferi por ke la loĝantoj havu akvon, kaj montris al ili la fonton. Kaj la loĝantoj ankaŭ savis ŝin, transmetante ŝiajn blankajn harojn sur la kapon de ŝtona homfiguro.

(Laŭ dung-nacia popolrakonto)

## Rompita Bovlo

Antaŭ multaj multaj jaroj vivis reĝo Madali, kiu regis la landon Kokande. Iutage rompiĝis lia plej valora trezora bovlo. Li ordonis al fajencistoj, ke ili riparu ĝin

kaj se la tasko ne estos plenumita en limigita tempo, ili estos pendiĝitaj. La farinto de la bovlo



mortis jam antaŭ longe kaj perdiĝis ankaŭ lia tekniko. Tial ili vole novole devis peti konsilon de la centjaraĝa fajencisto Usman. La maljunulo promesis ilin helpi, sed post tio oni jam ne plu povis lin trovi. La limdato jam venis! La kruela reĝo ordonis starigi pendigilon, kaj ĝuste kiam la fajencistoj estis pendigotaj, la maljuna Usman alvenis kun trezora bovlo tiel perfekta kiel la originala, kaj savis la fajencistojn. Kiel li sukcesis ripari ĝin? Ne, la bovlo ne estis riparita, sed refarita dank' al liaj multjara penado kaj diligentado, kiel li prave diris: "Nenia sekreto estas en tio, nur ĉar mi amis mian laboron ekde mia infanaĝo. . . ."

(Laŭ uzbeka popolrakonto)

estas plej liberaj dum tetrinkado, tial ankaŭ ili venas por trinki teon kune kaj dum babilado, ili multe lernas kion ili ne povas en la laborejo. Tamen ili ne tiom facile kutimiĝas en la medio ĉi tiea. La gejunuloj ne kutimis preni tekruĉeton kaj tenante ĝin en la mano ili kvazaŭ sentas ĝeniĝon. Iu juna teksistino de la silkaĵo *Ginjuduan*, kiu eble la unuan fojon trinkis teon el dikventra kruĉeto, tro forte suĉis el ĝia buŝo, ke la teo entiriĝis sufoke ĝis la trakeo, kiu reŝprucigis ĝin, preskaŭ sur la vizaĝon de la majstro. Ŝi ruĝiĝis ĝis la oreloj kaj ne plu kuraĝis preni la tekruĉeton. Aliaj junuloj estis tiel absorbitaj de la parolo de la majstroj ke ili ofte forgesis trinki. Kiam onklino Ĉangbaŭ venis aldoni varman akvon por ili kaj trovis ke la kruĉetoj restas plenaj, ŝi ekgrumblis: "Tian bone infuzitan kaj bonodoran teon vi ne trinkas, do kian alian vi deziras?"

Ho, mia dika onklino, ne malĝojiĝu! Ili ja ne opinias vian akvon ne sufiĉe boligita nek vian teon

**Vang Ke:**

## Stranga Fruktoĝardeno

**S**UR LA MONTODEKLIVO okcidente de la golfo Bo-haj troviĝas vere stranga fruktoĝardeno. Stranga, ne pro tio, ke ĝi havas multajn eksterordinarajn fruktarbojn, ĉar en ĝi kreskas nur ordinaraj pom-, pir- kaj vinber-arboj, sed ĉar ili estas plantitaj speciale por konsumado fare de plantmalsanoj kaj generado de fruktarbaj fiinsektoj. En la ordinaraj ĝardenoj, oni ĉiamaniere klopodas ekstermi la plantmalsanojn kaj insektojn malutilajn por la arboj, sed ĉi-tie oni laŭcele enportas diversajn fiinsektojn de malproksime kaj ilin metas sur la arbojn. Ĝuste pro tio, ke ĉi-tiu ĝardeno estas la paradizo de fiinsektoj kaj plantmalsanoj, ĝi estas anoncata kiel danĝera izolregiono.

Iun somermezan tagon, mi faris viziton al ĉi-tiu Eksperimenta Ĝardeno de Plantprotektado, dependa de la Fruktarba Instituto de la Ĉina Akademio de Agrikulturo. Jen estas kelkaj el ĝiaj eksperimentaj aktivadoj.


### Pararboj

Sur du paralele sin etendantaj bedoj, dek ses metrojn longaj kaj kvar metrojn larĝaj, kreskas paro post paro da pomarboj. El ĉiu paro, unu arbo estas dika kaj la alia maldika. Tio ĉi estas la eksperimentejo de perradika virusodisvastigado. La arboj pli dikaj estas sanaj, kaj la maldikaj estas malsanaj je la t.n. fruktomakuliĝo de pomarboj. Oni diras ke la viruso de la fruktomakuliĝa malsano parazitigas en la arbo-ĉeloj, kaj la malsana pomarbo estas apenaŭ kuracebla. Post la fondiĝo de la ĝardeno en 1955, la specialistoj trovis, ke la semoj kaj poleno de la malsanaj arboj ne portas en si mem la viruson, sed ĝiaj radikoj havas povon ĝin disvastigi.

La parigitaj Ralls-pomarboj estis plantitaj nur lastjare. Dum plantado, oni firme kunligis la radikojn de la paroj per pajla ŝnuro kaj ĉirkaŭkonstruis mureton el ŝtonoj, tiel, ke la radikoj ne sin etendu eksteren. Ĉi tiuj

ne bonodora, fakte ili venas al la tetrinkejo ne por la teo!

Mi amas ĉi tieajn gruzopavimitajn stratetojn kaj verdajn riveretojn, longajn, mallarĝajn kaj serpentumantajn, kaj mi amas ankaŭ la diversformajn belegajn pontetojn super la rivereto; sed mi pli amas iri al la tetrinkejo apud la ponteto por trinki kruĉeton da bonodora teo!



pararboj estas uzataj por observi, kiamaniere la viruso de fruktomakuliĝa malsano estas komunikita pere de la radikoj.

### Arboj en Konkurso

Ĉe la fundo de valetoj kreskas groteskaj pomarboj. Iliaj fruktoj estas flavaj, verdaj kaj helverdaruĝetaj; kelkaj el ili estas rondaj kaj glataj, tre belaj kaj allogaj, dum aliaj estas kovritaj de oleaj makuloj. Sin prezentas pli ol dek specoj da diversformaj pomoj sur la arboj.

Ĉi-tie estas la eksperimenta kampo por kontroli la rezistan povon de diversaj pomarboj kontraŭ la fruktomakuliĝa malsano. La dek sep pomarboj 21-jaraj de la eksperimentejo, kreskis tute fortikaj, neniam malsaniĝis. Sed en 1955, oni komencis fari al ili eksperimentojn per malsanigo. Iom poste, sur ĉiu el la arboj estis greftitaj 10 ĝis 16 varioj por observi, kiuj el ili estas fortaj en rezisto kontraŭ tiu malsano kaj kiuj estas facile infekteblaj je ĝi.



Ni proksimiĝis al unu el la arboj kaj vidis, ke 13 pomaj varioj estas greftitaj. La unua estas *blanka pipino* greftita jam 4 jarojn. Ĝiaj folioj estas volvitaj kaj la fruktaĉoj malmolaj kvazaŭ insektotubero, kiu baldaŭ kreviĝos. Evidente, ĝi estas malforta turniranto, kiu havas kapablon ne sufiĉan por rezisti la malsanon. Sed en ĝia najbareco, la vario *dolĉa jonatano* havas sanajn foliojn kaj branĉojn, kaj ĝiaj fruktoj estas bele ruĝaj. Ĝi montriĝis tre distinginda dum la du jaroj depost la greftiĝo. Sur alia najbara arbo estas greftitaj pli ol dek varioj, el kiuj la belkolora *ora bongusta* jam trapasis ses jarojn de provado kaj havis nenian simpton de malsano.

### Teruraj Konsumantoj

Transirinte klaran rivereton, ni venis al alia stranga loko. Tie, la

pirarboj ŝajnas tre bone kreskantaj, sed alproksimiĝinte al ili, oni tuj vidis, ke sub la arboj troviĝas multe da falintaj folioj kaj velkintaj piroj. Funebra sceno! Tio nin impresis, kvazaŭ okazus ĉi-tie katastrofo de brulego. Mi prenis unu velkintan piraĉon, kaj kun peno ĝin rompis. El la interno aperis jujuberuĝa krizalido kun du flugiletoj. Tio estas *granda kormanĝanto de piroj*<sup>1</sup>. Kiam vi levas vian kapon, vi ekvidas, ke sur la arboj, estas pli multe da velkintaj nigraj piroj. Ili estas apenaŭ ligitaj al la branĉo nur per blankaj silkoj ĉe la pirtenileto. La silko estas sekreciita de la insektolarvo por protekti sian neston kontraŭ ventblovo.

La granda manĝanto de pirkoroj estas la plej ĉefa malutila insekto de niaj pirarboj. Por pli bone studi kaj observi la vivmanieron kaj kutimon de la

insektoj el diversaj regionoj, esplori la kaŭzojn kial ili multe aperas en unuj jaroj kaj malmulte en aliaj, kaj fari prognozon kaj kuracon de la malsano, ĉi-tiu eksperimenta ĝardeno jam havigis al si en junio pli ol 8,000 de insektoj difektitajn fruktojn el Ĉangli-gubernio, fama produkto de fruktoj en Hebej-provinco, kaj transloĝigis la insektojn sur la arbojn.

En ĉi-tiu stranga ĝardeno troviĝas, krome, miloj da anspirarboj, roz-vinberujoj, sur kiuj oni nun faras eksperimentojn pri la malsanoj de pira cikatro<sup>2</sup>, blanka putriĝo de vinberujoj<sup>3</sup> kaj antrakso de vinberujoj<sup>4</sup>.

- 1 *Eurhodopa pirivorella* Mats.
- 2 *Venturia pirina*.
- 3 *Coniothyrium diplodiella*.
- 4 *Glomerella cingulata*.


### Honfan:

## Familio de Pentrofarboj

Pri fama ĉina familio kun longa historio de farboproduktado por ĉinstilaj pentraĵoj

EN ĈINIO estas multaj antikvaj pentraĵoj de pli ol mil jaroj, kies koloroj restas ĝis hodiaŭ ankoraŭ sufiĉe freŝaj kaj belaj, kvankam neniuj speciala metodo estis aplikita por ilin konservi. Oni atribuas tion al la produkta tekniko de la farboj. Kaj Giang Si Hju Tang en Suĝoŭ, Giangsu-provinco, estas nun la plej konata produkto de ĉinaj pentrofarboj kun historio de pli ol tricent jaroj.

Feŭdaj dinastioj de antikva Ĉinio starigis sisteme por si instituton de pentristoj kaj por ĝi ankaŭ produktojn de pentrofarboj. La privataj pentristoj tiam devis uzi memproduktitajn pentrokolorigilojn. La fondinto de Giang Si Hju Tang estis unu



Farboj por ĉinstilaj pentraĵoj produktitaj de Giang Si Hju Tang.


el tiaj pentristoj. Ĉar lia tekniko de farboproduktado estis elstara, kaj la aliaj pentristoj preferis uzi

liajn kolorigilojn, tiel lia familio fariĝis iom post iom tiu de profesiaj farboproduktantoj.

La krudmaterialoj uzataj por produkti ĉinajn pentrofarbojn estas tre diversaj, ekzemple: ŝtonbluo kaj ŝtonverdo el mineralo, florbluo kaj garcini-flavo (speco de flavo el hinda arbo garcinio) el vegetaĵoj kaj ankaŭ iuj aliaj el animaloj. Tiuj kolorigiloj estas uzataj kun akvo sed ne miksitaj kun oleo, kaj ili tute ne estas paliĝemaj kiel ordinaraj akvaj farboj ofte estas.

Laboras nun en Giang Si Hju Tang du maljunaj kvalifikitaj laboristoj, kiuj havas sperton de 40 jaroj en fabrikado de kolorigiloj. Ili estas instruantaj novajn metilernantojn pri sia laborsperto kaj la preskaŭ perdintan teknikon por vastigi la produktadon de ĉinaj pentraj farboj. Plie, ili kreas ankaŭ novajn specojn de farboj kaj kontinue plibonigas la produktan procedon. Ekzemple, la "taso de orstuko", kies produkta procedo estas treege komplika, estas unu el la specialaj teknikoj en fabrikado de ĉinaj pentrofarboj konservataj de Giang Su Hju Tang. En la interno de tia taso estas surkovrita tavolo da "orstuko", farbo el pulvorigita oro kun konvena proporcio da gluo. La pentristoj ne bezonas mem miksi ĝin kun akvo, li devas nur defroteti ĝin per peniko iom malsekigita. La farbo florbluo estis fabrikita el enportita indigo de post kiam la imperiistoj entrudis sin en Ĉinion. Tiel perdiĝis la tekniko fabriki ĝin el indiĝena indigo. Sed nun, oni jam retrovis metodon por tio post la brokado fare de imperiistoj kontraŭ nia lando. Krome, oni nove produktas farbon de ĉielbluo, kiu povas konservi sian originalan koloron en varmeĉo de 250°C.

En pasinteco oni produktis farbojn tute per manlaboro. Sed nun, Giang Si Hju Tang jam eniras en stadion de permaŝina produkto. Dek du muelmaŝinoj nun anstataŭas pezan manlaboron por produkti bonkvalitajn farbojn bezonatajn de ĉinstilaj pentristoj.



*Laboristoj, majstroj kaj respondeculoj kune pristudas la kvaliton de farbo.*

*Iu kliento aĉetas farbon en la farboproduktejo.*



Zuo Haj:

# Mirinda Kaverno Nove Malkovrita

*Sur la paĝo 141 de N-ro 74 de EPC ni donis mallongan informon pri "Nova Vidindaĵo en Gujlin". Eble iuj legantoj deziras sciigi pli detale pri tiu belega Kaverno de Ludijan kaj legos kun intereso la jenan artikolon.*

— La Red.

Fotoj de Hinhua

**K**IUJ vizitis urbon Gujlin, ĉiuj scias ke troviĝas tie la Kaverno Kihingjan, la plej distingiĝa kalka kaverno en tiu regiono de karstoj en Ĉinio, kies famo transiras la landlimojn. Sed neniu ja konjektis ke en Gujlin estas ankoraŭ alia kaverno, la kaverno Ludijan, Fragmita Ŝalmo kiu estas eĉ pli granda kaj pli bela ol ĝi.


De la norda antaŭurbo de Gujlin ni marŝis ne longan distancon okcidenten kaj atingis la bordon de Jang-rivero. Ĉi tie troviĝas monteto aspekte neniom eksterordinara. Ĉe la talio de la monteto estas kaverna aperturo, ĉe kies flankoj kreskas fragmitoj. La fragmita ŝalmo estas ŝatata muzikilo de tieaj loĝantoj kaj de tio la kaverno ricevis sian nomon.

Je la unua rigardo, la enirejo de la kaverno estas malalta kaj mallarĝa, ŝajne tute banala. Sed tuj kiam ni eniris la kavernon, tute alian impreson ni jam ricevis. Antaŭ ni montriĝis mirinda felando plenplena de stalaktitoj ruĝaj, verdaj, flavaj, blankaj kaj de aliaj koloroj. La kaverno dividiĝas en du partoj, kiujn oni povus nomi Antaŭa Kaverno kaj Posta Kaverno. La Antaŭa Kaverno konsistas el serio da profundaj kaj grandaj grotoj interligitaj de galerio kun formo de huffero; dume la Posta Kaverno estas profunda kaj vasta grotego. Kie la du partoj ligiĝas, troviĝas laĝeto, kiu dividas la kavernon en du partojn.

La stalaktitoj de Ludijan ĉarmas per siaj eksterordinare elegantaj formoj kvazaŭ brilaj koloroj kaj floroj aŭ brokatoj: la ruĝaj kvazaŭ koralo, la flavaj kvazaŭ sukceso, la verdaj kvazaŭ smeraldo kaj blankaj kvazaŭ jado. La tuta kaverno formiĝis kvazaŭ el amasigitaj gemoj, perloj, koraloj, eburajoj, silkajoj kaj vere similas al la palaco de feinoj.

Ne malproksime de la enirejo impone staras alta teraso ĉirkaŭita de kuriozaj elŝoviĝintaj rokpintaĵoj sur la fundo de pale ruĝa kaj oranĝkolora rokmuro, kvazaŭ vespera ruĝo de subiranta suno prilumus la ondantajn montpintojn kaj maldensajn arbojn. En la fronto estas serio da lakte blankaj ŝtonskulptaĵoj formantaj kvazaŭ altanon el blanka marmoro, sur kiu staras majesta kaj belega statuo de feino en silka vestaĵo, kies longa jupo pendas ĝis la planko kaj rubandoj flirtas en la aero. Ŝiaj okuloj radias brile kvazaŭ ion ŝi atendas kun sopiro. Malantaŭe de la feino pendiĝas brokataj kurtenoj kaj antaŭe — du palacaj lanternoj. Sin trovante antaŭ tiel belaj kaj ĉarmaj felandaj spektaklo kaj figuro, ĉiuj rigardantoj senescepte estas ekstaze ravitaj.

Antaŭenirante laŭ la galerio ni pasis jen tra ŝtona pordeto, jen serpentumanta vojeto, jen trovis nin en stalaktita montgorĝo inter altaj krutaĵoj kaj vidis jen pompajn ŝtonajn kolonojn ĉielapogantajn, jen arojn da stalagmitoj leviĝantaj de sur ebenaĵo, jen



ŝtonajn ĉambrojn kun perla pordkurteno, jen milojn da pendadoj el la ĉielo, jen drakojn ludantajn en akvo, jen diojn en kunveno, jen simiojn petolantajn, kaj multajn figurojn tie ĉitie, kiaj tiuj de leono, rinocero, ĉevalo, testudo, tamburo, liuto kaj tiel plu. Ĉiuj estas vive versimilaj.



En la Antaŭa Kaverno proksime al la lageto estas vasta placo, ĉirkaŭ kiu staras multaj ŝtonaj kolonoj, kies diversaj partoj havas malsaman diametron, tre similaj al ajure gravuritaj eburajoj. Estas ankaŭ kolonoj, sur kies supraĵo estas almetita kvazaŭ florvazo kun disflorantaj floroj. Amplekse la placo povas enteni ĉirkaŭ du aŭ tri mil homojn. La fronto de la placo iel similas al salono aŭ scenejo kaj la placo kvazaŭ ĝia parteroj. En la mezo de la placo kruciĝas dekoj da ŝtonaj kamplimaj eĝoj tiel ke la placo ankaŭ similas al rizkamparo.

Sur la muroj ĉirkaŭ la placo kaj ambaŭflanke de la galerio troviĝas kelkloke antikvaj surskribaĵoj ankoraŭ klare legeblaj. Ni trovis inter ili surskribaĵojn el la dinastioj Tang (618-907 p.K.) kaj Song (960-1279 p.K.). Laŭ la surskribaĵoj oni povas scii ke la kaverno allogis al si multajn vizitantojn jam en la fino de la 8-a jarcento kaj komenco de la 9-a jarcento p.K. Inter la surskribaĵoj el la dinastioj Juan (1279-1368 p.K.), Ming (1368-1644 p.K.) kaj King (1644-1911 p.K.) estas ne nur tiuj pri ekskurso, sed ankaŭ multaj notoj pri tiamaj okazintaĵoj kaj eventoj kaj tiaj surskribaĵoj koncentriĝis en la granda groto de la Posta Kaverno. Laŭ tiuj skribaĵoj oni povas scii ke dum longaj tempoj post la dinastio Juan kaj



la fino de Ming-dinastio tiu ĉi kaverno fariĝis rifuĝejo por la lokaj loĝantoj. Ili ŝtopis la enirejon per ŝtonoj kaj fremduloj neniel povis trovi vojon al ĝi. Tiel, dum centoj da jaroj la kaverno dronis en nekonekteco kaj nur en 1959 estis remalkovrita.

Dum mallongaj du-tri horoj ni rondiris tra la tuta Kaverno, interparolante kaj rigardante. Ĉio tie estis por ni mirinda, kurioza, okule ne finkaptebla. Pra-historioj, mitoj, legendoj kaj sciencaj mirindaĵoj ĉiuj emerĝiĝis el mia memoro, kaj mirkrioj kaj rimarkigoj de tempo al tempo eliĝis el niaj buŝoj, eĉ post kiam ni malsupreniris de la monto forlasinte la Kavernon. Por mi la sperto estis vere kvazaŭ belega sonĝo kaj mi neniam forgesos la sorĉan pejzaĝon de tiu felando.



## Senŝeligo de Ostroj


**Ĉ**IUJARE en marto — la monato por ostro-senŝeligo, kiam marostroj estas rikoltitaj, nia vilaĝo ekvigliĝas de streĉaj laboroj. En ĉiu loĝdomo troviĝas kvadrata tablo kun malaltaj piedoj, ĉirkaŭ kiu sidas kvar aŭ kvin personoj, aparte ĉe ĉiu flanko. La plejparto de la ostro-senŝeligantoj estas virinoj. Babilante kaj ridante ili amasigas monteton da ostroj meze de la tablo, per pinta kaj akra ostro-tranĉilo en la mano, ekspikas en la ostro-trueton inter ambaŭ ŝeloj, la ostro krake malfermiĝas, ili eligas la molan korpon en pelvon, kaj kiam tiu ĉi pleniĝas, ili verŝas ĝian enhavon en barelon.

Tuj post alveno de la ostrorikolta sezono, ĉiuj loĝantoj de la ostro-vilaĝoj estas tre okupataj. La viroj forveturas al la maro por kolektado de ostroj, kaj la

virinoj ilin senŝeligas hejme. Ne malofte okazas, ke se filino edziniĝinta kun viro en alia vilaĝo, vizitas siajn gepatrojn, transpaŝinte la sojlon de la gepatra domo kaj formetinte flanken sian pakon kunportatan, ŝi tuj eksprenas tranĉilon kaj komencas senŝeligi ostrojn. La virinoj laboras interbabilante pri sia vivstato, pri siaj travivaĵoj kaj doloroj en la koro ktp., jen sulkiĝas la brovojn, jen ĉagrene ĝemas, skuas la kapon.... Ho, kiom da homaj suferoj amasiĝis sur la malgranda tablo, kaj kiom da homa juneco tie velkis kaj perdiĝis!...

Mi pasigis mian oran infanaĝon apud la ostrotablo. Mi memoras, kiam mi estis kvar- aŭ kvinjara, ĉiuvespere kiam komenciĝis la senŝeligo de ostroj, miaj avino, patrino kaj la pliaĝaj bofratinoj sidis vid-al-vide ĉe la kvar flan-

koj de la tablo, kaj mi min sidigis apoge al mia avino, por rigardi ilian senŝeligadon. Dank' al la varmo de la fajrujo mi varmigiĝis miajn manetojn dolorajn pro frosto; sed mi vidis, ke la manoj de mia avino okupataj per senŝeligo de ostroj estas volvitaj per ĉifonoj sur la fingropintoj, kaj ke la koloro de ŝiaj mandorsoj antaŭe nigre ruĝaj pro malvarmego jam nigriĝis. Ja de tio dependas la nutraĵoj kaj vestaĵoj de la tuta familio, kaj la mono por pagi la imposton kaj lupagon pro la ostrokaptado! Post longa rigardado, mi ofte eksentis dormemon, kaj tiam la avino komencis rakontadon de siaj belaj historioj.... Dum la rakontado profundaj sulkoj montriĝadis ĉe la buŝanguloj de mia avino, kaj foje kaj foje ŝi demetis flanken la ostrotranĉilon, por inciti per stango la fajrujon timante,



ke mi malsaniĝos de frosto. Ŝi ankaŭ povis kanti versojn el polkantoj:

*La ostrokolektantoj, ho, mi-  
zerularo,  
en frosto vagas mare jaron  
plu post jaro;  
la ostrotranĉantinoj vivas en  
doloro,  
la akraj ostroŝeloj pikas al  
la koro.*

Sed nun jam komplete aliformiĝis nia vilaĝo ostro-produkta. Mi jam fariĝis junulino. Pasintjare la popola komunumo faris novan paŝon por eduki aron da novaj teknikistoj, kaj ĝia partikomitato sendis min studi en la Lernejo de Maraj Produktoj. Ĉiufoje, kiam mi revenis hejmen dum liber-tempo, mi ankaŭ volis senescepte okupi unu sidlokon ĉe la kvadrata ostrotablo. Sed, nur post

longa petado, mi povis transpreni la sidlokon de la avino. Mi ekprenis la akran pintan tranĉilon, enpikis rekte en la ostro-trueton kaj la ostro kun krako malfermiĝas. Ho, kiel familiara estis tiu sono de mia naskiĝvilaĝo por miaj oreloj! Sed en tiu sono ŝanĝiĝis ĉio en la vilaĝo.

Jen, super la ostrotablo jam brilis elektrolampo, kiun lumigis la nove konstruita Ĉaŭlaj-elektrejo; kaj megafono disaŭdigis agrablan muzikon el la radiostacio de la komunumo. Krome la viroj kolektis ostrojn sur boatoj trenataj per motora velŝipo, kaj cetere, la komunumo starigis en Ŝavej ostrobredejon kun areo de kelkdek mil muoj. . . .

Distranĉante ostrojn, ni interbabilis pri la ĉijara riĉa rikolto de marostroj, pri la ĵus konstruita nutraĵo-fabriko. Kaj la pliaĝa

bofratino priparolis interalie, ke post kelkaj tagoj ŝi jam aliĝos al la supera klaso de la postlabora elementa lernejo, oni faros eniran ekzamenon al la aspirantoj. Ĉe la ostrotablo foje-refoje sonoris ĝojaj ridoj kaj belaj kantoj. Fine, mi ankoraŭfoje petis al mia avino rakonton interesan. Ŝi diris ke ĉio, kion ŝi volas rakonti, estas jam priparolita de aliaj. Sed, ŝia diro estis nur ĝentilaĵo, kaj post paŭzo ŝia rakontado denove komenciĝis. Sub la hela lampolumo, mi rimarkis, ke ŝiaj arĝentaj haroj kontrastas kun la ruĝa sana vizaĝo, ke ŝiaj okuloj vive brilas. Ŝi fariĝas pli sana. Kion ŝi ŝatas rakonti estas la historieto de la "Eta Ĉiel-regno", ofte ripetita en la pasinteco, tamen mi scias, ke tio kion ŝi rakontas estas ĝuste la nova vivo en mia vilaĝo, sed ne plu revaĵo pri malproksima estonteco.

**Hinhua:**

## LA ĈASISTA VIVO DE OVENKEOJ

**L**A esplorgrupo sendita de la Instituto pri Nacioj de la Ĉina Akademio de Sciencoj akiris dum sia esplorado de la socia historio de naciaj malplimulto en la Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio en la lastaj jaroj, multajn altvalorajn materialojn. La sekvanta estas skizo pri la vivmanieroj de la ĉasista popolo ovenkea kiu loĝas en la densejo kaj profundo de la Granda Hing-an-montaro apud Argun-rivero. Antaŭ la Liberiĝo tiuj ĉi ĉasistaj popolanoj ankoraŭ restis en la fina periodo de la historia etapo de primitiva socio.

### En "Ulileng"

La ovenkeoj nomas sian primitivan familian organizon "ulileng", kies originala signifo estas "filoj kaj nepoj", "kunloĝantoj", "ulileng" do estas organizo de homoj havantaj sangon rilaton.

Ĉe la ĉasista popolo, kvankam sistemo de privata posedo aperis jam antaŭ la Liberiĝo, tamen homoj ankoraŭ observas la antikvan moron kaj kutimon, kaj rigardas solidarecon kaj interhelpon kiel sian propran devon. Kiam iu el ili malhavis grenon aŭ alian viv-necesaĵon, li povas preni ilin de alia familio. Tre ofte okazas reciproka prunto de objektoj, kaj ĝenerale oni pagas nenion pro tio, kelkfoje eĉ ne necesas peti konsenton de la posedantoj. La pordo de la

tenejo de vestoj kaj manĝaĵoj konstruita de la ĉasistaj popolanoj en la arbaro neniam estas ŝlosita. Oni povas libere pruntepreni la de si bezonatan objekton, kiun oni nur redonas laŭ la kvanto jam uzita.

La ovenkeoj rigardas la homojn tute egalaj, kaj ĉiuj opinias ke subteni la vivon de gevidvoj, orfoj kaj soluloj estas ĉies devo nerifuzebla, kaj ili lasas nenion resti senhejma. Ĉiufoje dum distribuado de la bestaj viando kaj feloj, oni kutime donas pli grandan porcion al la homoj sen laborkapablo kaj sen helpo de parencoj. Ili montras bonajn virtojn de cedemo kaj helpemo en la disdivido de ĉasitaĵoj. Bonaj ĉasistoj kelkfoje ricevas malpli ol la aliaj. Ili ne nur ne malkontentiĝas, sed male, ili sentas honoron kaj fieron pro tio.

La ĉasistoj rilatas al la vivrimedoj por nenio alia ol kontentigi sian propran bezonon de konsumo. Ili rigardas ŝtelon kaj rabon kiel tre malhonorajn agojn. Tiun ĉi moralon ili ricevas ekde la infaneco. Sekve, interbatalo inter ili por privata profito preskaŭ ne estas.

La publika opinio ĉi tie havas grandan influon. La ĉasistaj popolanoj memkonscie observas la antikvan regularon nesribitan. Antaŭ kelkaj jaroj okazis, en iu malgranda familio, kruela traktado

kontraŭ adoptita filo. La kulpa adoptanta patro tuj estis riproĉita de membroj de la klano.

## Kara "Suogeĝaŭ"

La norda cervo estas unu el la ĉefaj produktaj rimedoj en ĉasado por la ovenkeoj. Origine ĝi estis sovaĝa besto en la nordo de nia lando. Kaptite de la ĉasistoj, la cervo estas nutrata per musko kaj fariĝas malsovaĝa. La ovenkeoj nomas ĝin "Suogeĝaŭ".

La norda cervo estas milda besto, ĝi sin nutranta per fungoj kaj muskacoj, kaj pasigas la nokton subĉiele bezonante nenian ŝirmon, do besto facile bredebla. Ĝia vivo ĝenerale daŭras dekkvin ĝis dudek jarojn. La forta cervo povas porti pezon de kvardek kilogramoj, kaj ĉiutage veturigi pli ol dudek kilometrojn en vintro, kaj dek-kelkajn kilometrojn en somero. La cervino gravediĝas unu fojon en ĉiu jaro kaj naskas ĉiufoje ĝenerale unu idon, sed iufoje du.

Kiam la ovenkeoj ĉasas, ili uzas cervojn por transporti la vivnecajn ilojn, kaj kelkfoje ankaŭ porti infanojn kaj maljunulojn kiam ili transloĝiĝas. La ĉasistoj tre amas la cervojn. La virinoj kiuj ilin bredas havas speciale profundan inklinon por la bestoj. Kaj ĉiu cervo havas sian propran belan nomon.

## Skioj kaj Boato el Betul-ŝelo

En vintro, la ĉas-regiono de la Granda Hing-an-montaro estas kovrita de dika neĝtavolo. La ovenkeoj, portantaj skiojn, rapide glitas tien kaj reen inter la montoj, ĉasante sovaĝajn bestojn. Laŭ antikva legendo de tiu loko, la ovenkeoj elpensis la skiojn. La ĉasistoj faras skiojn el malpeza sed firma pinligno, ilin kovras per felo de alko. Per skioj ili povas veturi okdek kilometrojn ĉiutage. Ĉar la bestoj ne povas kuri rapide sur la neĝo, ili estas facile kapteblaj de la ĉasistoj glitkurantaj.

Post ĉasado ovenkeoj ofte fiŝas en Argun-rivero. Ili faras skeleton el ligno kaj kovras ĝin per betulŝeloj kun kudritaj per maldika radiko de ruĝa pino. La juntojn oni ŝmiras per betul-ŝela oleo miksitita kun rezino. La boato estas naŭ metrojn longa, kaj ĝiaj ambaŭ ekstremoj estas mallarĝaj kaj pintaj kaj supren levitaj. La ovenkeoj kaptas fiŝojn sur tia boato. La plej granda fiŝo pezas kelkdek kilogramojn, kaj la ordinaraj pezas po du aŭ tri kilogramojn kaj ili estas en granda kvanto ĉiujare, dum la varmaj tagoj en majo kaj junio alnaĝas aroj de skvametaj fiŝoj kaj ĝelo-fiŝoj.\* La

ĉasistoj povas multe kapti ilin nur per forkoj. Ili sin nutras per fiŝo kiel ĉefa manĝaĵo, kaj faras veston, tabakujon kaj sakojn el la fiŝohaŭto.

## La Antikva Arto

Dum sia longa periodo de laboranta vivo la ovenkeoj kreis sian propran literaturon kaj arton kun aparta stilo. Utiligante la betul-ŝelon, kaj fungojn sur betulo kiel materialon, ili eltondas kaj gravuras diversajn figurojn de birdoj kaj bestoj, ekz. alko, cervo, boaco, anaso, ktp. Ili estas bonaj ludiloj por infanoj. Sur la iloj kaj ujoj, oni gravuras diversajn desegnaĵojn de floroj, arboj, montoj, ŝtonaj krutaĵoj ktp. La ovenkeaj virinoj ankaŭ ŝatas brodi la felajn gantojn kaj sakojn per diversaj desegnaĵoj.

En la literaturo tradicie rakontata de la ĉaspolanoj, generacion post generacio estas mitoj pri la deveno de la homaro kaj venko kontraŭ demono, kaj rakontoj pri la ĉasista vivo en la epoko, kiam oni uzis sagon kaj paf-arkon. Tiuj ĉi rakontoj temas nur pri la rilato inter homo kaj naturo, kaj la batalo inter bono kaj malbono. En la rakontoj ne troviĝas postsigno de subpremado kaj ekspluatado de homo al homo. Tio reflektas ankaŭ la karakterizojn de la historia stadio de socio (la lasta periodo de la primitiva socio) en kiu ili vivas.

La kantemaj kaj dancemaj ovenkeoj heredigis al siaj posteuloj belajn kaj kortuŝajn popolkantojn. Iu maljuna ĉasisto verkis kanton por beni la novajn geedzojn:

*Obeu min vi ĉeestantoj  
de 1' hodiaŭa danckunveno,  
ke 1' novgeedzoj vivu ĉiam  
feliĉe en eterna beno.  
Aŭskultu min, vi novgeedzoj:  
Laboru ŝvite, helpon faru  
al orfoj, vidvoj kaj vidvinoj  
senlaborpovaj; solidaru!*

\* el familio de karpoj

Cervaro en la provinco Gilin.

Foto de Hinhua



# MIA PATRIO

Vortoj de Kjaŭ Ju  
Trad. Laŭlum  
Muziko de Liu Ĝi

Moderato intimamente




1. Lar- ĝas la ri- ver', on- das la to- rent'; Per riz- a- rom' par-  
2. Ĉar- ma l' kna- bin- ar' kva- zaŭ mar' de flor' kaj l' ju- nu- la- ro  
3. Ĉi- u mont', ri- ver' bri- las en bel' lar- ĝas la vo- joj



fu- mas la vent' Hej- me ĉi- am mi ĉe l' bor- do de l' ri- ver'  
kun he- ro- a kor', por jam e- ka- per' de E- den' sur Ter'  
de li- ber'; Por a- mik' de l' kor' dol- ĉa vin- lik- vor'




Ĝu- as la ŝi- pistajn kan- tojn kaj la be- lon de l' ci- gne blan-ka vel'.  
Ve- kis la mon- tojn el dor- mo kaj la for- mon ŝan- ĝis de la ri- ver.  
sed por la lupsin- jo- roj pre- tas ĉas- pa- fi- laj ku- gloj kaj pul- vor'.



(Soprano)

Ho, su- per- ba la pa- tri', ka- ra hej- ma  
Ho, he- ro- a la pa- tri', ka- ra hej- ma  
Ho, for- te- ga la pa- tri', ka- ra hej- ma


(Kontralto)



(Tenoro)

Ho, su- per- ba la pa- tri', ka- ra hej- ma  
Ho, he- ro- a la pa- tri', ka- ra hej- ma  
Ho, for- te- ga la pa- tri', ka- ra hej- ma

(Baso)





*rit.*

<p>land' de mi ; land' de mi ; land' de mi ;</p>	<p>Sur la vas- ta Sur la an- ti- kva Sur la sun- bri- la</p>	<p>hej- ma ter', hej- ma ter', hej- ma ter'.</p>
<p>land' de mi ; land' de mi ; land' de mi ;</p>	<p><i>p</i> Ho, Ho, Ho, <i>p</i></p>	<p>sur la ter', sur la ter', sur la ter',</p>

<p><i>1.2. a tempo</i> <i>ff</i></p> <p>çi- e ple- ne flo- ras pri- ma- ver', çi- e ju- na for- to en pros- per'.</p>	<p><i>ff</i><sup>3.</sup></p> <p>çi- e flo- ras pa- co en pros- per'.</p>
<p><i>ff</i></p> <p>çi- e ple- ne flo- ras pri- ma- ver', çi- e ju- na for- to en pros- per'.</p>	<p><i>ff</i></p> <p>çi- e flo- ras pa- co en pros- per'</p>
<p><i>ff</i></p>	<p><i>ff</i></p>



La dorlotata konkubino de la bienulo Hejdajang pavas per siaj luksaj vestoj kaj arĝentaj ornamaĵoj.



Adojo kolere rigardas al la provokantaj lakeoj de la bienulo.



Manluo kaj Adojo dancas kun brodaj-rubando apud rivera bambuaro.



## “Manluo

— Kolora filmo de

**A**NTAŬ tre, tre longa tempo, en la tradicia festo “Flordancoj” okazanta ĉe la mjaŭa popolo apud la rivero Kingŝuj en Gujĝoŭ-provinco bela kaj diligenta Manluo enamiĝis al la brava ĉasisto Adojo. Iliaj parencoj kaj amikoj ĉiuj per ĝojaj dancoj benas la feliĉan junan paron. Sed la loka despoto-bienulo Hejdajang surpriziĝis de la majesta beleco de Manluo kaj kaŝe intencis ŝin akiri. Kiam la patrino kaj amikinoj de Manluo pretigis por ŝi la novedzinan doton kaj Manluo revis pri sia baldaŭ komencota feliĉa vivo, la lakeoj de Hejdajang pikvundis la patrinon kaj forrabis Manluon. Indignigite de la krimago, Adojo kaj la vilaĝanoj enatakis la fortikigitan loĝejon de la bienulo kaj elsavis Manluon. La maliculo tamen ne volante tion toleri, postkuris ilin ĝis la rivero kaj per venena sago pafmortigis la brave batalantan Adojon. Forte afliktite Manluo levis la venenan sagon kaj returnante sin, pikmortigis Hejdajang. Tiumomente, la malamiko jam sieĝis ŝin, tiel ke ŝi trovis neniun alian eliron ol salti de la kruta monto en la riveron. Laŭlegende, la floro “manluo” estas reenkorpiĝo de la paro, kiu mortis pro amo. La filmo “Manluo-floro” estas surekranigo de la kvarakta dancodramo kreita sur la bazo de tiu legendo.

Kvankam simpla estas la rakonto, tamen dank’ al la lerta aplikado de la esprimrimedoj de la dancodramo kaj kinoarto kaj prezento de la vivo kaj moroj de mjaŭoj per iliaj popolaj dancoj, la filmo estas karakterizita certgrade per nacia stilo. La dancodramo komenciĝas per tre alloga sceno de la “Flor-dancoj” de mjaŭoj, ĉirkaŭ kiu elvolviĝas kolorriĉa bildo pri popolaj moroj plena de naciaj karakterizaĵoj, kaj kiu samtempe liveras tre konvenan fonon por surscenejigi la personojn, prezenti iliajn karakterojn kaj interrilatojn kaj malvolvi la kontraŭdirojn, kaj tiel ĉio sin montris reliefe koncentri-

# floro ”

dancodramo —

gita, rafinita kaj konforma al la karaktero de la dancodramo.

En tiu sceno oni vidas serion da multkoloraj popoldancoj, unu post la alia, ekzemple: la *Danco de Vintrinko* de mjaŭaj maljunuloj ĝoje festantaj riĉan rikolton, *Cajgetang* dancata de la mjaŭaj knabinoj partoprenante en la flordancoj, kaj la *Danco de Luŝeng-konkurado\** de mjaŭaj junuloj ktp. ĉiuj estas dancoj forte folklorecaj.

Estas interese aranĝita la sursceniĝo de la juna ĉasisto Adojo kaj lia amatino Manluo. En la vigla danco de sagpafa konkuro Adojo dekomence sin distingis per aparta lerteco en sagopafado kaj kantado el inter la bravaj kaj varmkoraj mjaŭaj ĉasistoj. Li gajnis la ruĝan floron en la konkurso kaj ankaŭ la amon de Manluo. Ĉe la apero de Manluo la filma reĝisoro intence kontrastigis la fuŝan kaj mallertan dancon de la favorata konkubino de la bienulo kun la "Hiaŭtong-danco" de Manluo, kaj sukcese reliefigis la virgan purecon de knabino.

Estas multaj aliaj belaj dancoj, kiuj neforgeseble ravas la rigardantojn. Ekzemple, la duhoma danco dum la interkonfeso de enamiĝo de la gejunuloj ĉe rivereto, kiu esprimas plene la poezian senton ĉe ilia unua renkontiĝo, karakterizata per ioma hontemo kaj sinĝeno kaj la ardan interverŝon de la koroj post la interdonaco de bunta rubando kaj punktita birdplumo, la *Danco de Brodita Jup*o antaŭ edziniĝo de Manluo, la tuj post ĝi sekvanta alia lirika dancosolo kaj la kolorriĉa *Ĉasista Danco* en la fina parto de la filmo, ĉiuj estas tre ravaj. Unuvorte, tiu ĉi filmo de dancodramo impresas tre profunde, kaj ĉiuj sentas ion akiri en sia koro, post la rigardo.

\* Luŝeng: speco de blovmuzikilo.



*Kvankam kaptita de la bienulo Manluo rifuzis lian allogon per silkaj kaj arĝentaj ornamajoj, kaj prenas la plumon donacitan de la amato.*



*Persekutate de lakeoj de la bienuloj Manluo kaj Adojo retiriĝis sur krutan rokon.*





LA ĈINA ŜAKO

**D**E la 18-a jarcento la malfermado de partio per lukto inter kanonoj estas iom post iom anstataŭita de nova sistemo de malfermado, kies ĉefa karakterizaĵo kuŝas en tio, ke la flanko kiu movas duavice, unue sekurigas sian mezan P-n per la du Ĉe-oj por poste komenci ofensivon en oportuna okazo. Post pli ol ducentjara evoluado la sistemo de malfermado per "lukto inter kanonoj kaj ĉevaloj" estas nun aplikata de ŝakistoj en proksimume 80 el cent kazoj de ŝakmaĉo.


Ĉi-sube ni prezentas la partion, en kiu la ĉampiono de la tria tutlanda ŝakturniro Jang Guanlin venkis la unuan movanton Ĝou Ŝougie per siaj ĉevaloj kontraŭ lia meza kanono.

Tip: Ĉevalo-ekrano kontraŭ Meza Kanono

Ĉerivera Kanono kontraŭ Ĉerivera Kanono

En primara konkurso de la Dua Tutlanda Ĉampioneca Ŝakturniro, okazinta en okt. 1957, Vu-Han, inter Ĝou Ŝougie (la nigra, kiu movis unue) kaj Jang Guanlin (la ruĝa, kiu venkis)

1. K c8—c5 Ĉe h8—g7. 2. Ĉe a8—c7 Ĉe h2—g3. La ruĝaj Ĉe-oj gardstaras antaŭe en simetriaj pozicioj formante kvazaŭ ekranon, tial ili estas nomataj "Ĉevalo-ekrano".
3. Ĉa a9—a8 Ĉa h9—h8. 4. P c3—d3 S f7—e7. Ambaŭ flankoj movas sian P (S) por ebligi al sia obstrukcata Ĉe iron al la "riverbordo".



5. K c2—d2 K g—e2. Ambaŭ flankoj postenigas po unu K sur la "riverbordon", estigante t.n. ĉeriverajn K. La intenco de la nigra estas altiri kaj interŝanĝe elimini la ruĝan S e7 per P c7—d7 por liberigi la vojon al sia Ĉe c7 kaj movi sian K d2 al la dekstra alo kaj tiel pliigi la atakforton. Kaj tiu de la ruĝa estas devigi la rivalan Ĉa a8 retiri sin al a9 per Ĉe g7—e8.

6. Ĉa a8—f8 K e2—e1! La ruĝa kalkulis, ke la nigra, kiu movis P c3 al d3, certe intencas movi sian maldekstran Ĉe-n al c3, por ke ĝi poste atingu la riverbordon, kaj nun ne volos movi Ĉe a2—c1 por bari la atakon de la ruĝa K al la Ĉa, ĝi do povos nur levi sian El-n al la rando, kio influos malfavore al la interprotektado de la El-oj. Kaj poste efektive rezultigis el tio ĉiuj krizoj.

7. El a3—c1 Ĉe g7—e6. 8. Ĉe a2—c3 S e7—d7. Ĉar en la posta movo la nigra irigus Ĉe

Funebro kaj Kondolenco

pro Morto de  
K-do Ĝang Ŝiongfej

Ege nin surprizis la informo pri la subita forpaso de k-do Ĝang Ŝiongfej, pro apopleksio je la 0.50 de la 12-a de septembro. Li estis fervora esp-isto kaj fakulo pri ĉina ŝako, fama recenzisto pri ŝakludo sur ĉinaj ĵurnaloj. Nur dank' al li ni sukcesis aperigi sur nia gazeto la rubrikon "La Ĉina Ŝako". Por ĝi li verkis tutan serion da interesaj artikoloj, kaj ili vekis grandan intereson ĉe la legantoj. Nun subita morto lin forrabis en lia 50-jaraĝo, eĉ ne permesante al li vidi sian lastan artikolon presita.

Profunde funebras ni pro la perdo de la eminenta membro de ĈEL kaj intima kunlaboranto de nia gazeto. Samtempe ni sincere kondolencas al liaj familianoj.

La Redakcio de EPC

c3—d4 por devigi intersanĝon de la ruĝa Ĉe e6, kaj post tio la ruĝaj Ĉa h8 kaj K g8 estus mal-liberigitaj de la nigra Ĉa f8, tial la ruĝa antaŭenmovas la S e7 por forpeli la nigran Ĉa-n (sen tio la Ĉe estas obstrukcata kaj ne povas ataki la Ĉa-n).

9. Ĉa f8—f6 S d7:c7. 10. Ĉa f6:e6 S c7:c7. 11. P c5—d5, kiel nun montras la bildo:

(La movo apartenas al la ruĝa.) S f3—e3! La antaŭeniro de la nigra P en la mezo celas elimini la seneliran K el per elpaŝo de la ĉeranda P c1. Sed la ruĝa ĉe la okazo disvolvas mirindan kombinaĵon el profunde pripensitaj kaj malproksime antaŭzorgantaj paŝoj.

12. Ĉa e6—g6 S e3:d3. 13. Ĉa g6:g3 Mi h7—g5. 14. Ĉa g3:d3 K e1—e7! **La ruĝa intence**

**oferis sian dekstran Ĉe por movi sian ĉeriveran K-n 1 al la maldekstra flanko pro ataki la izolitan dekstran El-n. Tio estas apliko de la strategia penso ataki per supera forto la malfortan punkton de la malamiko.**

15. K c5:f5 + Es h6—g5. 16. Ĉe c3—b5. Se la nigra maldekstra El ne estus ĉe la rando, ĝi povus facile kaj regule iri al c5 por subteni la dekstran El-n interprotektante unu la alian. Sed nun la nigra povas nur retiri la Ĉe-n por protekti la atakatan El-n. Sed postenigo de Ĉe en la centron de la palaco estas riskplena paŝo, ĉar ĝi malhelpas la movon de la Es-oj.

16. ...K g8—a8. 17. P d5—e5 S c7—b7! La antaŭenpaŝo de la nigra P 5 celas kapti la ruĝajn K-n kaj S-n per Ĉa d3—d7. Kaj la

antaŭeniro de la ruĝa S 7 ŝajnas farinta nenion kontraŭ la duobla kapto intencita de la nigra, sed fakte ĝi havas en si mirindan kalkulon: Se efektive la nigra movos 18. Ĉa d3—d7, tiam S b7—b6! La posta movo estos elimino de la ĉefunda nigra Es per la S kaj pro la baro de la palaco centra Ĉe matos la nigra G. Tial nun restas al la nigra sola eliro fortiri la Ĉe-n, tiel: 19. ...K e7—a7 +. 20. Ĉa d7:a7 S b6:a6 kaj akiros la Ĉa-n, tiam la ruĝo kompreneble venkos.

18. Ĉa a1—a3 Ĉa h8—h6. 19. Ĉe b5—c7 Ĉa h6:a6 +. 20. G a5—b5 Ĉa a6—b6 +! La nigra rekonas sian venkitekcon. Ĉar 21. G b5—c5 K a8—c8 +; tiam kie ajn fortiriĝu la nigra Ĉe, la ruĝa matigos la rivalon per duobla K, movante K e7—c7.

## Sepplata Ludo

La sepplata ludo estas unu el la popularaj infanludoj en Ĉinio. Ĝi estas simpla kaj saĝiga. Simpla, ĉar por tiu ĉi ludo oni bezonas nur malgrandan kvadratan kartonpecon. Saĝiga, ĉar la ludo akriĝas la atenton de la ludantaj infanoj pri la formoj de objektoj kaj vivestaĵoj kaj tiel koniĝas al






fig. 2.


fig. 1




Sciuro




Homo






Ludo de tabloteniso




Sovaĝansero


ili nian mondon. Prenu kartonpecon, ĝin distranĉu en sep pecojn laŭ fig. 1, kaj provu formi literojn, objektojn, bestojn ktp. laŭ la donitaj ekzemploj en fig. 2. Oni tuj povas vidi, ke per la sep simplaj platetoj oni povas formi tre multajn figurojn. Kaj uzante plurajn kompletojn da tiaj platetoj oni ricevas eĉ pli komplikajn bildojn. Se troviĝas pluraj ludantoj, oni ankaŭ povas aranĝi konkurson.



Hundo



Kuirpoteto



Aeroplano

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Granda Ŝak-turniro de Junuloj en Pekino

De julio ĝis aŭgusto ĉijare okazis en Pekino la plej granda ŝak-turniro de junuloj. En tiu tempo ili konkursis en la ĉina ŝako, internacia ŝako kaj la tradicia ŝako "Veĵĉi-o", havanta plej longan historion ludata per blankaj kaj nigraj ŝakpecoj sur kvadrata tabelo kun 361 interkruĉigoj.

Partoprenis entute 800 gejunuloj 6- ĝis 25-jaraĝaj. Inter ili troviĝas laboristoj, oficistoj, armeanoj, studentoj kaj gelernejanoj.

La venkinto por la tradicia "Veĵĉi-o" estas 8-jara knabo Nie Ĉipo. Li venkis en ĉiuj naŭ ludoj kun la geknaboj.

En la konkurso de internacia ŝako, venkis 13-jara Ĉang Hong-gien, lernanto de elementa lernejo.

Sensacia estas la venko de 14-jara Ting Sucong, gimnazia lernantino. Ŝi konkursis en 11 ludoj kaj venkis ĉiufoje.

## Mil-jaraj Arboj

En la ĉirkaŭaĵo de la fama pitoreska Okcidenta Lago en

Hangĝou, Ĝegiang-provinco oni trovis pli ol 120 arbojn, el kiuj multaj jam vivas pli ol 1000 jarojn, kaj la plej junaj, pli ol 500 jarojn.

El la miljaraj arboj estas citinda la kamforarbo en la korto de iu templo ĉe Okcidenta Lago. Ĝia alteco atingis 18 metrojn kaj ĝia trunko dikas je 236 cm, ĉe la malsupra parto.



## En Vintra Arbaro

Dum kuras ni per skioj  
En iu ajn direkt'  
Montriĝas al ni ĉio  
En ia belaspekt'.

Arĝentaj neĝeretoj  
Briletas de la sun',  
Kaj blankaj betuletoj  
Senvestaj staras nun.

Ho, skivetur'—rapida kur',  
Flamiĝas la vizaĝo.  
Betularbar'—ne estas bar',  
Ni skias kun kuraĝo.

Renkonte flugas neĝeretoj,  
Similaj al arĝent',  
Dum vintro estas pretaj  
konkuri ni kun vent'.

Duope ni skiadas,  
Meditas en silent'.  
Amike Vi rigardas,  
Revante pri amsent'.

Blankiĝas niaj haroj  
De forta frosto nun  
Sed via amo, kara,  
Varmigas, kiel sun'.

Ni ĉiam kune iros  
Dum vivo sur la ter'.  
Miraklojn ni ne miros  
Ni marŝos sen danĝer'.

Ja multe da belajoj  
Post ĉiu vojkruciĝ'  
Ni vidos dum vojaĝo;  
Ni kuru sen laciĝ'.

Ho, skivetur'—rapida kur',  
Flamiĝas la vizaĝo.  
Betularbar'—ne estas bar'—  
Ni skias kun kuraĝo.

Renkonte flugas neĝeretoj  
Similaj al arĝent',  
Dum vintro estas pretaj  
Konkuri ni kun vent'.

(Kanto) O. Fadeeva

Elrusigis B. Najdin, Krasnodaro.

KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KURANTAJ AFEROJ \* KUR

## Progreso de Ĉina Kirurgio por Novnaskitoj

La Pekina Infana Hospitalo, la plej granda en sia speco en Ĉinio, sukcese traktis pli ol 800 infanojn naskitajn kun organoj difektitaj de post ĝia fondiĝo en 1955, t. e. 80% el la difektitaj infanoj estas savitaj.

## Laboristo-verkistoj

Laŭ lasttempa statistiko nun en la filioj de la Ĉina Verkista Unuiĝo en diversaj urboj kaj provincoj troviĝas 400 membroj de laboristo-verkistoj. Multe da sukcesaj noveloj, dramoj, scenaroj, poemoj estas verkitaj de tiuj amatoraj verkistoj. En 1949, tuj post la Liberiĝo, 80% el la laboristoj estis analfabetoj. Sed dank' al la kresko de postlabora edukado, de abc-kurso ĝis kolegia nivelo en la fabrikoj ne nur plejparto de la laboristoj forskuis la analfabetecon sed elmontriĝas inter ili ankaŭ tiuj literaturaj talentoj.

## Pliaj 3 Volumoj de la Jonglo- Enciklopedio Retrovitaj

Ni jam plurfoje informis pri la kolektado kaj represo de la fama Jonglo-Enciklopedio, kompilita en la 15-a jarcento. Nun pliaj 3 perditaj volumoj estas retrovitaj

en Guangdong-provinco. Iu civitano Ĉong Jihong ilin donacis al la Provinca Komisiono de Muzeoj kaj Arkeologiaj Materialoj. Kaj pro tio la civitano estas premiita per honora dokumento.

## Plua Studo en Universitatoj

Ĉijare 800 diplomitaj studentoj estas akceptitaj por plua studo kaj scienca esplorado en universitatoj kaj kolegioj. Tio estas konsiderata kiel efika rimedo por

eduki estontajn sciencajn esplorantojn kaj profesorojn.

La studentoj estas elektitaj per severaj ekzamenoj el 4,000 novaj diplomitoj, instruistoj, teknikistoj kaj asistantoj de sciencaj esploroj.

Inter la profesoroj, kiuj gvidas la studon kaj sciencajn esplorojn de la diplomitaj studentoj, troviĝas multaj famaj sciencistoj, ekzemple la fama filologo, s-ro Ĉen Vangdaŭ, eminenta matematikisto Su Puĉing k. a.

\*\*\*\*\*

## Sovaĝansera Gardanto

En Gjukju oni ofte vidas blankajn sovaĝajn anserojn, kiuj ŝatas tranokti apud akvo. Por sin gardi de la atako de ĉasistoj, ili ofte elektas unu el si kiel noktan gardanton kaj tio estas la tiel nomata sovaĝansera gardanto. Kiam la gardanto ekaŭdas homan bruon, ĝi tuj ekblekas por ke la aliaj vekigu kaj forflugu.

Bone konante ilian kutimon, la ĉasistoj intence maltrankviligas la sovaĝanseran gardanton per torĉoj kaj la lasta, pensante ke alvenas ĉasistoj, tuj alarmas al la dormantoj. Sed tiam la ĉasistoj tuj estingas la torĉojn. Surprizite la sovaĝaj anseroj flugas momenton en la aero tamen trovante neniun ĉasiston, ili denove ekripozas. Sed ĝuste en ĉi-tiu momento, la ĉasistoj ree bruligas la torĉojn. La gardanto do denove ekalarmas kaj ĝiaj kunuloj ree ekflugas en surprizo. Kaj ankaŭ la ĉasistoj tuj estingas siajn torĉojn kiel antaŭe. Post kelkfoja ripeto de tio, la dormantaj anseroj ekpensas, ke la gardanto nur ruze petolas kun ili, tiel ke ili ne povas bone dormi, kaj pune ekpikas ĝin pro ĝia mensogado. Punite, la gardanto jam ne plu kuraĝas alarmi, eĉ se ĝi ree ekvidas torĉlumojn.

Tiam la ĉasistoj povas facile alproksimiĝi al la anseroj kaj ilin kapti.

# Pri la Ortografio de Propraj Nomoj

Lasttempe nin atingis el Ĉeĥoslovakio du artikoloj pri tiu ĉi temo. Unu de J. V. Dolinský kaj la alia de JUDr. Josef Fousek. Iliaj opinioj estas pli malpli samaj kaj iusence reciproke kompletigaj. Tial ĉi tie ni aperigas la plenan tekston de k-do J. V. Dolinský kaj la ĉefajn punktojn de k-do Josef Fousek. Ĉu per tiu ĉi diskuto oni povus atingi idealan solvon pri tiu ĉi problemo, ni atendas.

— La Red.

## I. Rimarkoj de J. V. Dolinský

Kun grandaj atento kaj intereso mi legis en la ĉi-jara 4-a numero de "El Popola Ĉinio" la artikolon de s-ano Docento Viktor Gruško. La problemo, kiun la verkinto klopodas solvi, estas jam propre solvita kaj praktikata. Nia plej elstara Esperanta revuo, la "Nuntempa Bulgario", jam praktikas la sole eblan manieron ĉe la transskribado de fremdaj — komprenu: ne-Esperantaj — nomoj personaj. Sed eĉ tiu ĉi maniero ne estas tute kontentiga. Plena kaj perfekta solvo, pri kia revis Zamenhof (Lingvo Internacia, 1904, pĝ 216) restas por ĉiam nur "pia deziro" de ni esperantistoj.

Sen ŝanĝo de Esperanto mem — kaj tio povas okazi neniam! — la fonetika transskribado de fremdaj personaj nomoj estas ne-ebla. Al Esperanto mankas sonoj (vokaloj kaj konsonantoj), kiajn la nacilingvoj posedas. Mi mencienu nur **la molajn konsonantojn, ĝemelajn al la malmolaj d l n t konsonantoj**, sufiĉe oftaj en la slavaj, hungara kaj aliaj lingvoj! Ni provu ekzemple transskribi fonetike en Esperanton la nomon de juna kaj talenta slovaka verkistino: **Elena Dedinská — Ľalujniaková** — per literoj kaj zeŭgmoj, kiuj staras je nia dispono. Jen: Eljena Djedjinskaa-Ljaljuljujjakovaa! **Mi dubas, ĉu la sonojn, molajn konsonantojn, kiujn en Esperanto oni devas skribi per zeŭgmoj: dj lj nj tj — ĉiuj esperantistoj korekte prononcas?! Tiaj sonoj mankas en la germana**

kaj versimile en ĉiuj ĝermanaj lingvoj, en la franca — escepte nj=gn —, rumana kaj certe multaj aliaj, ja ankaŭ en Esperanto. Kaj kiel transskribi **la hungarajn vokalojn: é ö ó ü ũ kaj la rumanajn: ă â î?! Kiel transskribi fonetike tiujn ĉi hungaran kaj ĉeĥan personnomojn: Ūrmösházi, Křišťánek? Ĉu: Irmeŝhaazi kaj Krjiŝtjaanek aŭ Krŝiŝtjaanek? ... Se samideano — nescipovanta la korektan prononcon — legos ilin: Urmoshazi kaj Kristanek, li ne legos ilin pli malĝuste ol la transskribitajn formojn. Korekta transskribo do estas ne-ebla, ĉar **al Esperanto mankas kaj adekvataj literoj kaj adekvataj sonoj al la respektivaj literoj kaj sonoj nacilingvaj**. Kaj favore al Esperanto oni povas atendi eĉ ne ŝanĝon de alfabeto de popoloj, skribantaj per latinaj literoj aŭ ideografiaĵoj, tiom malpli de la ceteraj popoloj, ke ili ŝanĝu kaj malriĉigu la sonaron de sia lingvo!**

Kaj cetere, ĉu estas tiel ekstreme grave, ke oni sciu **korekte**

elparoli la nomon de sia korespondanto? Ĉe tiuj raraj renkontiĝoj, kiuj povas okazi inter du korespondantoj — la renkontintoj devas ja reciproke korekti la eventuale ambaŭflankan misan prononcon de la nomoj.

Mi ne samopinias kun s-ano Gruško: ke se oni scipovas 6-7 okcidentajn lingvojn — la scipovo de Esperanto fariĝas superflua, ne bezona! Ho ne. Almenaŭ ne por ĉiu homo. **Esperanto estas ja interkompreniga lingvo ne de 6-7 diverslingvanoj, sed tiu de ĉiuj ne samlingve parolantaj homoj!**

Probable s-ano Gruško ne konas la kazon de D-ro Fischer (Fiŝer), bukureŝtano. Li estis ĉeestanto, observanto, kiel sveda vojaĝanto ne povis interkompreniĝi kun deĵoranta kelnero, scipovanta kvin lingvojn — **rumanan, serban, turkan, bulgaran kaj rusan**. La Svedo mem scipovis kvar lingvojn: **la gepatran, norvegan, danan kaj finnan**. Tiam miksiĝis en la aferon ankaŭ D-ro Fischer kun kono de sep nacilingvoj kaj alparolis la Svedon ger-

## Grava Atentigo

Estas petataj ĉiuj niaj legantoj, kunlaborantoj kaj korespondantoj bone distingi niajn du malsamajn adresojn: **"P. O. Kesto 77, Pekino"** kaj **"P. O. Kesto 313, Pekino"**. La dua adreso akceptas nur mendadon kaj abonadon de niaj eldonajoj (inkluzive EPĈ). Por ĉio alia (inkluzive interŝanĝon de niaj eldonajoj) oni skribu kaj sendu al la unua adreso por eviti prokrastiĝon.

ĈINA ESPERANTO-LIGO  
EL POPOLA ĈINIO



mane, france, angle, itale, hungare, hispane kaj greke. La rezulto estis — nulo! **La tri homoj, parolantaj entute 16 lingvojn naciajn, ne povis interkompreniĝi.** La situacion solvis la jam banala Esperanta frazo demanda, eldirita de D-ro Fischer — tiutempe ankoraŭ ne esperantisto: “**Ĉu vi parolas Esperante?**” kaj Angla-Esperanta ŝlosilo. D-ro Fischer depost tiu ĉi okazintaĵo fariĝis fervora esperantisto. Ne sufiĉas do 6-7 okcidentaj lingvoj por povi elimini Esperanton el la lernindeco de internacia lingvo. **Esperanton en vere internacia interkompreniĝado povas anstataŭi nur kono de — ĉiuj kulturlingvoj.**

Se ni esperantistoj pretendas, ke oni skribu al ni sian nomon laŭ Esperanta fonetiko, por ke ni povu ĝin korekte prononci, tiukaze ankaŭ ni devas esti almenaŭ tiom komplezaj, ke ĉiun nomon,

kiun ne-esperantisto ne povas korekte elparoli, ni skribos al li laŭ lia nacilingva fonetiko: al Hungaro hungare, al Germano germane, al Rumano rumane, al Polo pole, ktp. ktp. **Aŭ ĉu lingvan egalrajtecon oni povas postuli nur por esperantistoj?!**

J. V. Dolinský, komponisto,  
portanto de distingigo  
“pro elstara laboro”

## 2. Opinio de Josef Fousek

Oni diras, ke sur nia terglobo vivas ĉirkaŭ 2000 da diversaj lingvoj, eĉ ne kalkulante dialektojn kaj slangojn.

Eble eĉ la lingvistoj ne scias, kiom da diversaj alfabetoj kaj skribmanieroj ekzistas sur la mondo. . . .

S-ro Gruško proponas ĈIAM kaj ĈIE en Esperanta teksto SKRIBI LA PROPRAJN NO-

MOJN FONETIKE, sed kiam tiu propra nomo estas skribita (presita) unuan fojon, oni NEPRE SKRIBU (PRESU) APUDE PARENTEZE la saman nomon NACILINGVE, sed tion oni faru nur por la UNUA fojo, kiam la nomo aperas en la teksto.

Laŭ mia mala opinio oni respektu kaj preferu unualoke la **originalan** skribmanieron kaj dualoke la esperantan elparoladon de la propra nomo. Ekzemple: Shakespeare (Ŝejkspír), Chopin (Ŝopén), Dvořák (Dvoršak), k. a.

La esperantan elparoladon mi donus nur la **unu**an fojon, sed kiam la leganto jam konas ĝin, mi **ĉiam** skribus la originalan skribmanieron, do: Shakespeare, Chopin, Dvořák, ktp.

1-an de septembro 1962  
JUDro Josef Fousek, eksadvokato,  
Přelouč, ĈSSR.

# Esperanto Marŝas

## E-kurso por Profesoroj en la Ĉina Popola Universitato

Por eduki Esp-instruistojn lasttempe en la Ĉina Popola Universitato de Pekino stariĝis Esperanto-kurso por geprofesoroj de la han-lingva fakultato. La kurso komenciĝis en septembro. En ĉiu semajno ĝi havas 6 lernohorojn kaj tiel daŭros por unu jaro.

## El Moskvo

**Moskvo.** Esperanta Sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de Medicinistoj daŭrigas sian aktivan laboron. Ĉiudimanĉe kaj ĉiumerkrede de la 19-a ĝis 22-a horo Moskvaj gesamideanoj kunvenadis en la Sekciejo (ul. Gercena, 19) kaj laboris laŭ programo, presita en la rusa kaj Esperanto por ĉiu kvaronjaro en 500 ekz., kiu estas disvastigata inter mul-

taj medicinaj oficejoj en Moskvo kaj aliaj urboj.

**Metodoj de Esperanta disvastigo.**—25.III.62. Estis organizita metodika kunveno por prijuĝi Esperantajn lernolibrojn. Speciala prezidantaro de la kunveno el erudiciaj k-doĵ: kiel kandidato de Medicino E. Salnikov, laŭreato de la ŝtatpremio D-ro F. Korovin, k-do A. Zisman, lingvisto E. Polsemen (Sverdlovsk), sciencisto A. Kuliĉenko (Saratovo), instruisto V. Kolobarov (Jegorjevsk) kaj aliaj. Estis prijuĝitaj ĉirkaŭ 20 esperantaj lernolibroj. Kun bona kaj utila kritiko de nove aperinta “Elementoj de Esperanto” de I. V. Sergejev elpaŝis k-do N. Rytjkov. Li laŭdis la krestomatian kaj vortaran partojn de la libro, kaj akre kritikis la gramatikan parton. Konstatinte la mankojn kaj erarojn, li konkludis, ke I. Sergejev estas ja verkisto sed ne gramatikisto, pro kio okazis la

konfuzo. La parolinto ankaŭ voĉlegis leteron de la Direktoro de CED, kiu esprimis timon, ke per la libreto de Sergejev oni lernos Esperanton erare.

Pri la simpleco de sia Esperanta lernolibro, kunmetita en kelkaj okulvideblaj tabeloj, raportis k-do E. Polsemen.

Pri apartaĵoj de Esperantaj lecionoj (24) de instruisto J. Flerovskij rakontis k-do T. Kulagin.

Pri la facila kaj interesa lernolibro de Esperanto en 36 lecionoj kun vortaro por junularo de instruistino V. N. Seryŝeva raportis D-ro F. Korovin.

Pri originaleco de sia mnemonika vortareto rakontis la aŭtoro k-do A. Zisman.

D-ro L. Kubasov sciigis ĉeestantojn pri la eldono en Blago-

veščensk en 25000 ekz. la Esp-a lernolibro de A. Kerner.

K-do Pavlov el Leningrado komunikis pri granda sukceso de propaganda broŝuro kun mallonga Esp-a gramatiko kaj vortaroj de N. Andrejev, presita en 1957-a en 100000 ekz., ĝi nun estas tute elĉerpita; ankaŭ pri la Esp-a lernolibro de Semenova kaj Teterin, kiu nun estas reviziata, baldaŭ denove aperos.

Ankaŭ estis prijuĝitaj kelkaj aliaj lernolibroj: ekz. Ergolskij-Esperanto kaj Ruĝa Kruco, Edm. Privat — Esp-o en 50 lecionoj, lernolibroj de Rublev, Svistunov, Voleviĉ, Vasilĉenko kaj aliaj. En diskuto partoprenis pli ol 50 gesamideanoj.

**Amika Renkontiĝo.** — 8.IV.62. okazis renkontiĝo kun Ĉeĥoslovaka samideano, reprezentanto de Esperanta Klubo el Prago Jozefo Forman, kiu transdonis varmajn salutojn kaj bondezirojn al Moskvaj gesamideanoj je nomo de Pragaj geesperantistoj. Li interese rakontis pri entuziasmo de Pragaj gesamideanoj, kiuj dum pasinta mondmilito kaj faŝisma reĝimo, spite al ekstrema danĝero, savis grandan bibliotekon de pli ol 5000 Esp-aj libroj kaj periodaĵoj. Ankaŭ li sciigis, ke nun Praga Esp-a Klubo havas 600 membrojn kaj aktive partoprenas en Esp-a agado, ankaŭ energie laboras teatra grupo "Verda Ĉaro", kiu partoprenis dum la jubilea Universala Esp-a Kongreso en Varsovio, kaj pri aktiva laboro de kelkaj junulaj grupoj en uzinaj kluboj kaj laboristaj kulturdomoj ekz. de la vagonfabriko "Tatra".

**Jurnalistoj Vekiĝis.** — 15.IV.62. Tutsovetia Esperanta Ĵurnalista Asocio aranĝis renkonton kun gesamideanoj de Moskvo en Sekciejo. K-do N. Danovskij faris prelegon pri Tutmonda Esp-a Ĵurnalista Asocio (TEĴA), kiu estis fondita dum la 18-a U. K. en Edinburg (Anglio), kie sveda

ĵurnalisto (komunisto - Einar Adamson el Göteborg—iniciatis la kreon de TEĴA. Samtempe en 1926-a dum la kongreso de SAT en Leningrado estis fondita Tutsovetia Esp-a Ĵurnalista Asocio. K-do Danovskij rakontis pri historia disvolviĝo kaj granda laboro de tiu Asocio kaj pri ĝia nuna stato ankaŭ pri nuntempa tasko — krei konvinkajn literaturajn verkojn por konigi pri Esperanto en naciaj lingvoj, kiel same utiligi artikolojn el Esp-aj gazetoj por la nacia gazetaro. Nun oni kalkulas ĉirkaŭ 30 ĵurnalistojn-esperantistojn en Moskvo kaj pli ol 100 ĵurnalistojn en USSR — tio estas granda forto por antaŭenpuŝi Esp-an agadon en nia lando.

La raporton vigle pridiskutis poeto K. Gusev, ing. Zajdman kaj la aktoro N. Rytjkov.

**Lenin-tago kaj Alio.** — 22.IV.62. Estis organizita vespero, dediĉita al la memoro de V. I. Lenin okaze de la 92-a datreveno de lia naskiĝtago. D-ro E. Salnikov, malfermante la vesperon, komunikis, ke la aktoro N. Rytjkov estas konfirmita de Ŝtata Komisiono en la rolo de V. I. Lenin. Nia samideano nun prezentas ĉi honoran rolon en literaturaj koncertoj de Filharmonio.

Prof. S. Ĉahotin rakontis pri historio de Esp-o, substrekinte la superecon de Esp-o kompare kun aliaj provoj krei internacian lingvon. Esperanto venkis dank' al tio, ke ĝi estas pli facila kaj vivipova, belsona, logika kaj komprenebla ilo por ĉiuj homoj, ne nur en Okcidento sed ankaŭ en Oriento. Estis komunikite, ke oni intencas organizi en Kembriĝo (Anglio) Internacian Kongreson de Mikrobiologoj, dediĉitan al la 50 jara jubileo de operacia malfermo de biologia ĉelo, kie oni intencas diskuti la problemon en Esperanto.

D-ro K. Lavrentjev informis la ĉeestantojn pri la okazonta en julio-aŭgusto k.j. la 4-a Ĉebalta Esperanta Tendaro apud Riga

(Latvio), kaj pri letero de k-do Niilo Kavenius el Turku kun invito al la 8-a festivalo de junularo kaj studentoj en Helsinki (Finnlando) en la komenco de aŭgusto k. j.

Teodoro KULAGIN

## La Kvara Tendaro de Baltlandaj Esperantistoj

Jam la kvaran fojon kunveturis esperantistoj-studentoj kaj iliaj gastoj el Estonio, Litovio kaj Latvio al la somera Tendaro, ĉi-jare organizita de la 21-a de julio ĝis la 10-a de aŭgusto en Latvio, apud mezepoka urbo Ĉesis en Drabeŝi. Dum trisemajna laborperiodo la tendaron partoprenis sume pli ol 320 esperantistoj, plejparte el Estonio, Litovio, Latvio, sed estis ankaŭ multe da gastoj el tuta Sovetio. El Moskvo estis aro da konataj esperantistoj, el Odeso junulara delegacio, same el Leningrado, kaj unuopaj reprezentantoj estis el ĉiuj grandaj sovetaj urboj, enkalkulante Siberion. Kiel reprezentanto de amika bulgara popolo en nia tendaro estis s-ano Veselin Georgiev el Plovdiv. Dum du tagoj estis en la tendaro kiel kara gasto nia fama samideano, ambasadoro de Demokratia Respubliko Vjetnam en Moskvo, s-ano Nguyen van Kinh. Li manĝis kaj dormis kune kun ni, parolis al ni pri la plej aktuala temo — la paco.

La intereso al Esperanto en USSR konstante kreskas. Tion pruvas la statistiko de pasintaj baltlandaj Esperanto-tendaroj: unuan tendaron ĉe Riga partoprenis 30 homoj en la jaro 1959, la duan en Estonio en la 1960-a jaro 107, la trian en Litovio pasintjare partoprenis sume 203 homoj, kaj nun la kvaran 320 personoj, krom tio multaj latvaj s-anoj vizitis la tendaron dum sia libera tago, dimanĉe.

Kompare kun la pasintjara tendaro, oni povas noti la kreskon de la lingvoscio kaj la pli multnombrian aŭskultantaron de la



*Partoprenantoj de la Somera Esperanto-Tendaro en Ĉeĥoslovakio.*

prelegoj en dumtendaraj labor-kunvenoj en Somera Universitato kaj en fakrondoj (instruista, literatura, junulara k.a.)

Ĉiuvespere okazis koncertoj kun originalaj programoj, kompilitaj de tendaranoj mem. Plej elstarajn programojn prezentis estonoj kaj ukrainoj.

Okazis tri ekskursoj: la 4-an de aŭgusto negranda grupo, gvidata de s-ano Nguyen van Kinh kaj litova konata esperantisto dro M. Robinzonas, vizitis proksiman al ni turisman tendaron kaj aranĝis tie propagando-prelegon. La 6-an de aŭgusto tuta nia tendaranaro ekskursis en la belega kaj pitoreska Sigulda, kiun oni nomas la "Svislando de Latvio", pro la ĉarmaspektaj montetoj, ĉirkaŭantaj la valon de la plej bela latva rivero Gauja.

Tria ekskurso gvidis nin al mez-epoka urbo Cesis, kie nun restarigita estas iama grava fortikaĵo en Baltlando, konstruita en la 14-a jarcento.

Dum dudek tagoj la tendaro ebligis al ni perfektigi en la lingvokono kaj praktike uzi ĝin kun la amikoj el aliaj lokoj kaj landoj. Venontjare intencas organizi similajn tendarojn kelkaj aliaj pli fortaj Esperantoregionoj en Sovetio kiel Moskvo, Ukrainio k.a. La venontjara baltlanda Esperanto-tendaro estos laŭvice en Estonio. Al ĝi jam nun estas

granda intereso inter esperantistoj, kiuj volas kunhelpi al la amikeco kaj paca kunvivado inter popoloj.

Johannes Palu, Tallinn, Estonio.

### **75-jara Jubileo de Esperanto, en Ĥarkov, USSR.**

La 26-an de julio 1962 en u. Ĥarkov (Sovetukrainio) okazis vespero, dediĉita al la 75-jara jubileo de Esperanto. Riĉe ornamita salono de la Domo de Sciencistoj akceptis pli ol 150 gesperantistojn kaj interesantojn. Dum la vespero la kunvenintoj

aŭskultis la raporton pri la jubileo, la respondojn al iliaj multaj demandoj, la arte plenumitajn kantojn kaj recitaĵojn ukrainalingve, rusalingve kaj esperante.

En la antaŭsalono estis aranĝita granda ekspozicio de libroj, revuoj, ĵurnaloj kaj korespondadoj. Apartan grandan standon okupis la korespondadoj de unu sola esperantisto — k-do Rezničuk, kiu vigle korespondas kun amikoj el 48 landoj.

Iv. BRIL

(la prezidanto de E-rondeto)

### **Somera Esperanto-Tendaro en Ĉeĥoslovakio**

La tendaro estas en la belega valo apud la granda akvorezervejo sur la rivero Dyje ĉe la urbeto Vranov (3 km) kaj vilaĝo Lančov (1 km). Ĝin organizas la esperantista rondeto en Třebíč. Partopreni povas ĉiu, kiu volas lerni Esperanton. Esperanton oni instruas antaŭtagmeze en 4 lecionoj. Posttagmeze okazas banado, sportoj, ludoj kaj ekskursoj. Vespere estas preskaŭ ĉiutage tendara fajro kun amuzoj, ŝercoj, kantoj kaj ludoj. La partopre-

### **Esperanto-Kursoj en la Francaj Lernejoj 1961 — 1962**

<b>Specoj de Lernejoj</b>	<b>Lernejoj</b>	<b>Kursoj</b>	<b>Gelernantoj</b>
Elementaj Lernejoj	8	10	102
Mezlernejoj	18	29	520
Specialaj Lernejoj	7	10	112
Liceoj	22	31	425
Instruist(in)aj Seminarioj	11	16	353
Sume	66	96	1512

Statistiko kompilita de R. Blanc (Lerneja Komisiono de Franca Esperanto-Unuiĝo)

nantoj loĝas en tendoj, malpli granda parto estas en la ligna kabano, kie estas ankaŭ la kuirejo kaj oficejo de la estraro. La loĝado en la tendaro daŭras du semajnojn. Dimanĉe la partoprenantoj alvojaĝas, lunde jam okazas la unua instruado, kiu daŭras ĝis la sekva dimanĉo. Poste estas ankoraŭ instrutagoj ekde lundo ĝis jaŭdo. Vendrede ĉiuj faras ekzamenojn. La diplomoj pri la ekzamenoj estas disdonataj vespere per solena maniero. Sabate la partoprenintoj forvojaĝas.

En la etapo, kiun mi partoprenis kiel instruanto, estis 80 partoprenantoj de diversa aĝo, de ambaŭ seksoj, el plej diversaj urboj kaj komunumoj de nia ŝtato.

Josef Chvosta, ĈSR.

### Libervola Instruado de Esperanto Rekomendata en Grekio

Laŭ cirkulero 204 de la Ministerio de Nacia Edukado kaj Religiaj Aferoj de la Reĝlando de Grekio libervola instruado de Esperanto estas rekomendata, "Konsiderante ke unu tre kontribua rimedo de spirita kontakto de la popoloj kaj pli strikta inter ili interkonatiĝo kaj interfratiĝo, estas, krom aliaj, ankaŭ unu memkomprenebla de ĉiuj internacia lingvo, kiel la jam formiĝinta kaj instruata en multaj landoj Esperanto, kaj rememorigante malnovajn cirkulerojn de niaj antaŭuloj . . . 'pri instruado de la lingvo Esperanto al la studentoj kaj lernantoj dezirantaj ĝin lerni'."

La cirkulero estas sendita al sinjoroj rektoroj de universitatoj de Athine kaj Thesaloniko, E.M. Poitika Lernejo, A.S.E.E. Pantia lernejo, sinjoroj ĝeneralaj inspektoroj de meza kaj elementa instruado, Direktoro de Instruistejo de Meza Instruado, direktoroj de pedagogiaj akademioj.

— Laŭ informo de HEA

# Libroj Eldonitaj de ĈEL.

## Verkoj de Maŭ Zedong

	P.	Formato- cm.		Rb.	£
<b>Pri Praktiko</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.18	0-1-5
			br.	0.09	0-0-8
<b>Pri Popoldemokratia Diktaturo</b>	24	13.2×18.7	bd.	0.18	0-1-5
			br.	0.09	0-0-8
<b>Interparolo kun Usona Ĵurnalistino Anna Louise Strong</b>	18	13.2×18.7	bd.	0.18	0-1-3
			br.	0.08	0-0-6
<b>Raporto al la Dua Plena Sesio de la Sepa Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio</b>	30	13.2×18.7	bd.	0.18	0-1-5
			br.	0.07	0-0-7
<b>Komentarioj pri la Blanka Libro</b>	56	13.2×18.7	bd.	0.20	0-1-7
			br.	0.13	0-1-0
<b>Paroladoj ĉe la Literatura kaj Arta Kunsido en Jan-an</b>	48	13.2×18.7	br.	0.09	0-0-9
<b>La Nuna Situacio kaj Niaj Taskoj</b>	44	13.2×18.7	br.	0.07	0-0-7

## Literaturaj Verkoj kaj Aliaj

<b>Ĉina Antologio (1949-1959)</b>	412	23×15.5	bd.	1.20	0-10-0
<b>Poŝtmarkoj de la Ĉina Popola Res- publiko</b>	88	19×26.3	bd.	0.60	0-8-6
<b>Vivu Leninismo</b>	102	14×20.5	br.	0.16	0-2-0
<b>Floroj kaj Birdoj (8 kolorpresitaj pk.)</b>			br.	0.08	0-1-0
<b>Rakontoj pri Fantom-spitantoj</b>	98	12.3×19	br.	0.33	0-2-7
<b>Laŭdezira Kalkulo de Kennedy</b>	25	13.2×18.7	br.	0.07	0-0-7
<b>La Okcidenta Ĉambro (bildrakonto)</b>	88	13×18	br.	0.19	0-1-6
<b>Mi Volis Viziti Lernejon (bildrakonto)</b>	76	13×18	br.	0.08	0-1-0
<b>Karpetoj Transsaltis la Drakpordon (kolorpresita bildrakonto)</b>	30	10.2×20.5	br.	0.16	0-1-3
<b>Knabino kaj Garolo (kolorpresita bildrakonto)</b>	38	17.2×25.3	br.	0.38	0-3-0
<b>La Kultura Vivo de la Ĉinaj Labo- ristoj kaj Oficistoj (kun 90 fotoj)</b>	72	16.5×18.5	br.	0.25	0-2-0
<b>Pejzaĝoj de Ĉinio (albumo kun 48 fotoj, el ili 13 kolorpresitaj)</b>	50	24×26.5	br.	0.63	0-5-0
<b>Pitoreskajoj de Pekino (12 kolorpre- sitaj pk.)</b>			br.	0.13	0-1-0
<b>Sinjoro Dongguo (bildrakonto adaptita laŭ antikva fablo)</b>	82	19×15			

Mendu ĉe perantoj aŭ la Administracio de EPC:  
P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

# Sur Nia Librobreto

Willy Breinholst: **NI EN SKANDINAVIO** — Kiel montrite de la titolo la libro rakontas pri la vivo de la nordlandaj popoloj. Ĝi estas tradukita de F. Szilágyi kaj Regina Emson laŭ la angla verko "Scandinavians—that's US!" kaj eldonita de Norda Prismo kun ilustraĵoj de Léon van Roy. Prezo: Kr. Sv 2.25 aŭ US\$0.50, mendebila ĉe la eldonejo.

Ekprenante la broŝuron tute ne imponan oni certe tuj imagas al si ian literaturon de vojaĝaj notoj pri tiuj foraj landoj. Mi ne povas diri, ke tiu ĉi imago vin trompas, tamen, kiam vi ĝin eklegas, vi trovas en ĝi ion multe pli. Ĝi ja donas al vi panoramon pri la nacioj, geografiaj trajtoj, la loĝantaroj, la moroj, la karakterizaĵoj de la popoloj en Skandinavio. Sed la maniero de la prezentado estas tute originala. La teksto ne estas teksita el banalaj vortoj sed de ia proza karikaturo, do ĝi formas plene harmonian tuton kun la interesaj ilustraĵoj. Oni apenaŭ povas deteni ridemon ĉe siaj buŝanguloj dum la legado. Tiel oni konatiĝas kun la skandinavianoj per tiu ĉi libreto ne nur pri iliaj vivmanieroj, vivmedioj, ŝatokupoj sed ankaŭ la spiritoj.

Rekomendinda ĉarma verketo plena de humoreco. Kaj en plene konforma traduko el la eminentaj plumoj de la konataj tradukintoj.

H. F.

Roman Dobrzyński: **LA NIGRA KOKINO • MIKO** — Unua broŝuro de la serio "Mia Libreto", ilustrita de Andrzej Mroziński kaj eldonita de Pola Esperanto-Asocio. Ĝi estas en poŝformato, 16 paĝoj. Prezo: Z1 3.50. En ĝi troviĝas du infanaj legaĵoj "La Nigra Kokino" kaj "Miko". Ambaŭ

estas verkitaj per klara kaj simpla lingvo. La rakontetoj estas interesaj kaj la ilustraĵoj belaj laŭ infana gusto. Oni nur miras kial sur la 2-a paĝo troviĝas la anglaj vortoj "printed in Poland". Ili devas esti en Esperanto aŭ en la pola lingvo. Ĉar tiu ĉi broŝuro ja neniom rilatas al la angla lingvo. Versajne tiu ĉi nekomprenebla kutimaĵo troviĝas ankaŭ en aliaj esp-ajoj eldonitaj en Pollando.

H. F.

**NIA HEROA POPOLO**, eldonita de la Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1962. 265 p. 12½ × 19 cm. Tradukita de geesperantistoj de la E-Klubo de Hanojo.

Alia nova libro el Vjetnamio! Ĝi enhavas 5 rakontojn kaj parton de la parolado de Ho Chi Minh, prezidanto de Vjetnamio. Ili rakontas pri la vivo kaj bataloj de gvidantoj kaj batalantoj en la liberiga batalado el sub la jugo de la malbenitaj koloniistoj kaj ties lakeoj.

Dum legado mi pensis, ke multaj subpremitaj popoloj leviĝis, venkis sian malamikon kaj fine iras sur la luma vojo per diversaj manieroj, sed neniu povas tion atingi sen luktoj, kaj al mi mem mi demandis: Kial ili batalis kaj tiel heroe? Kial ili finvenkis kontraŭ armile kaj homnombro superaj malamikoj? La rakontoj en tiu ĉi libro donis al mi respondojn. Legu nur tion, ke la regantaĉoj tiam ŝarĝis la popolon per tiom da impostoj, nome, kapimposto, kampimposto, impostoj por bubaloj, alkoholaĵo, kortobirdaro kaj arbaraj produktoj, kaj diversaj aliaj "la tutan jaron, ili devas fari servuton por la konstruado de vojoj kaj *blokhaŭsoj*, servi senpage al la mandarenoj kaj vilaĝaj aŭtoritatuloj". (p. 194)

Senfinaj sufero, mizero, vivo pli malbona ol la besta. Jen bildo de la sklavigitaj popoloj kaj la kaŭzo de ilia persista batalado ĝis fina venko. Aliflanke mi vidas, ke ju pli kruelaj estas la koloniistoj, des pli bravaj la popolbatalantoj. La malamiko sklavigis la vjetnaman popolon kaj ilin brute torturis, amase mortpafis, eĉ fortranĉis al popolanoj la kapon kaj brakojn por ilin montri ĉe la bazaro. (p. 132) Tamen venkis ne la malamikoj sed la popolo. Ĉar sin unuiginte sub gvidado de la Vjetnama Laborulara Partio ili havas nevenkeblan forton kiu povis frakasi la malamikon.


Pli kortuŝa estas la anekdoto, ke revolucioj mortkondamnitaj eĉ lernis legi en la karcero. Al la demando por kio utilas la lernado kiam oni tuj mortos la respondo estas "...Se vi devas morti, tiu amuziĝo (lernado) neniel malutilas al vi kaj se vi vivas, tio havigas al vi nur profiton" (p. 78). Kia optimismo de la vere heroe popolo!

(Zensto)

Hans Wingen: **WÖRTER DER GEGENWART** (Deutsch-Esperanto Aktualaj Terminaro) — 55 paĝa broŝuro, 11½ × 16 cm., kompilita laŭ materialoj aperintaj en la rubriko "Aktuala Terminareto" de "Germana Esperanto-Revuo".

Kiel la titolo montris, tiu ĉi broŝuro ne estas vortaro faka nek la komuna, sed nur terminoj aktualaj. Ĝi do konsistis el ne nur radikoj sed ankaŭ esprimoj, precipe en la esperantaj tradukoj.

Kompreneble terminaro tia ne povas esti kompleta. Ĉar la aktualaj ĉiam kreskas kaj ŝanĝiĝas. Tamen ĝi havas certe grandan utilon por germane parolantaj esperantistoj.



# Rememoroj pri Julio Baghy

## Korespondi Deziras

Mi konatiĝis kun Julio Baghy en 1919 en urbo Nikolsk — Ussurijsk (Siberio), kiam li loĝis en tiu ĉi urbo, kiel militkaptito. Tiam mi ankaŭ loĝis en Nikolsk — Ussurijsk.

Unufoje, irante sur strato, mi ekvidis malgrandan anoncon, kiu invitas ĉiujn dezirantojn ellerni internacian lingvon Esperanto, viziti Popolan Domon, kie funkcias kursoj de Esperanto. Pli frue, kiam mi lernis en gimnazio, mi aŭdis pri tiu ĉi lingvo, eĉ komencis konatiĝi kun ĝi per lernolibro de Saĥarov.

Mi alvenis en Popolan Domon kaj iĝis lernanto de esperanta kurso, kies gvidanto estis Julio Baghy. Tiel mi konatiĝis kun li.

Estante rusa militkaptito, li povis tute libere eliri el militkaptitejo kaj gvidi la kurson.

Esperanta kurso konsistis, proksimume, el 20 personoj precipe gejunuloj: fraŭloj kaj fraŭlinoj.

Julio Baghy estis bona kaj nekomparebla gvidanto de kurso. Li instruis laŭ rekta metodo kun helpo de lernolibro de Edmond Privat. Post lecionoj mi tre ofte revenadis hejmen kun li kaj irante sur stratoj interparoladis kun li en Esperanto, ĉar li ne sciis la rusan lingvon kaj mi ne sciis la hungaran lingvon. En la komenco memkompreneble, mi ne ĉion komprenis, sed iom post iom mi alkutimiĝis kaj post kelkaj semajnoj mi scipovis tute libere kaj flue paroli en Esperanto.

Julio Baghy estis konvinkita esperantisto, kiu ĉiurilate montris al ni belecon de nia lingvo, ĝian eblecon alproksimigi la homojn de diversaj nacioj.

Krom tio li estis talenta aktoro. Mi memoras, kiel li kelkfoje prezentis al ni knabon, kiu ŝtelas ĉerizojn. Per mimikaj movoj bele elparolante en Esperanto la vortojn de knabo, li prezentis bildon de ŝtelo kaj manĝo de ĉerizoj.

“Li estis ĉiam vigla, kun viva inspiro de verkisto, verve deklamanta, facile ekĝojiganta kaj petole saltanta, simile etan kapron” — tiel ĝuste lin karakterizas unu esperantistino ankaŭ lia lernantino.

Julio Baghy havas amriĉan koron. Mi memoras kiel li en Nikolsk — Ussurijsk donadis diversajn ŝercajn nomojn al junaj gelernantoj: “Neĝulino”, “Anĝelino”, “Diablino”, “Meleagrino” k.t.p. Min li nomis “esperanta filo” kaj mi ĉiam diris al li “esperanta paĉjo”.

Por mi estas granda feliĉo, ke mi en miaj junaj jaroj renkontis tian homon, kiel Julio Baghy, kiu esperantigis min, enamigis en nian belan kaj adoratan lingvon Esperanto. Mi ĉiam kun granda danko memoras pri li.

En sia romano “Viktimoj” al unu personajo li donis mian familian nomon: “Avo Averkiev”. Avo, kiu ĉiam penadas helpi al militkaptitoj.

Lastatempe mi korespondadas kun li. Ricevas de li bonajn leterojn, enhavantajn multajn vortojn pri paco, amo, frateco kaj amikeco de la homoj. Liaj leteroj ĉiam servas al mi, kiel gvidilo en mia vivo.

S. Averkiev, Moskvo.



kolektas pm, kantojn kaj pri sportoj kaj radiotekniko.

kanalizacio, Fangzhibu sushe 18-305, Baiwanzhuang, Pekino, Ĉinio. Respondos nur samfakulojn.

\* **Per Holger Sjodin**, 16 jara junulo, Sodermalmsgatan 16, Sundsvall, Svedio.

\* **Esp. Meksika Asocio**, Madero 8-312, Mexico 1, D, F. Notu supran novan adreson.

\* **Wang Zeng-yu** serĉas kontakton kun ĉiulandaj samfakuloj pri

(Daŭrigo sur p. 294)

- \* **F-ino Todorka Petrova** (18-jara), Veliko Târnovo no. 2, Gabrovo, Bulgario, kun ĉinaj geesp-istoj.
- \* **Zaskalkov B. V.**, Neteĉenskaja 37-1, Ĥarkov, 3, USSR, kun ĉinaj ĝardenistoj kaj arbarkulturistoj.
- \* Partoprenantoj de filozofia seminario ĉe Karbtrusto “Uzlovskugolj” (inĝenieroj kaj oficistoj) komencas detale studi problemojn de socialisma konstruado en popoldemokrataj landoj kaj bezonas interesajn faktojn, priskribojn, bk. kaj fotojn ĉi-rilate. Skribu al: USSR, gorod Uzlovaja Tulskoj oblasti, ulica Gagarina 42-10, inĝ. Lev Fiŝbejn.
- \* Rudolf Hons, Studenec 345, okres Semily, Ĉeĥoslovakio, pri ĉt kaj interŝ. bk.
- \* **Kiril Hlebarov**, Petriĉ, 6. Delĉev-8, Bulgario, interŝ. pm kun esp-temaro, pk. kaj kinorevuojn kun Azio, Afriko kaj Aŭstralio.
- \* **K. Afanasjev**, Taŝkent, 86, Uzbekistan, USSR, kun ĉl. pri ĉt.
- \* **F-ino Keiko Kobayaŝi**, Nakagoo, Sagae si Yamagata ken, Japanio, kun ĉinaj, Sudorient-aziaj kaj aŭstraliaj ges-anoj.
- \* **Oskar Berman**, 49 Tarna Strato, Hadero, Israelo (faka delegito: ĵurnalismo). Notu la supran novan adreson.
- \* **Johano Martin**, 79, av. Joseph Wauters, Saint-Mard, Belgio, precipe kun orientaj landoj (Ĉinio, Japanio, Vietnamio)
- \* **Dro. Tankov** (fizik-kuracisto), USSR, Kaŭkazo, Soĉi, ul. Ostrovskj, 47, kv. 2, pri popolaj fizikaj kuracmetodoj.
- \* **S-ro Walter Nitschke**, Karl-Marx-Str. 51, Burgstadt/Sa. Germanio-DDR, prefere kun Ĉinio, Vietnamio, Indonezio kaj Japanio.
- \* **Stanislao Maj**, Zary/Zagania, Bohaterois Getta 34/2, Pollando,

# Niaj Danko kaj Donaco al Amikoj por la Paco

okaze de la 5-jara datreveno de la reapero de EPĈ.

Karaj legantoj kaj amikoj!

Nia modesta gazeto tuj travivos sian kvinjaran periodon post la reapero en 1957. En la ne tre longa tempo de kvin jaroj, ni sukcesis ion kontribui al la interamikiĝo de la ĉina kaj alilandaj popoloj, al la paco kaj al la esperanta movado. La sukceso apartenas al ni kaj ankaŭ al vi, karaj legantoj kaj intimaj kunlaborantoj. Por danki al via helpado kaj subtenado, ĝoje celebri kun vi la sukceson kaj akceli nian komunan aferon per pligrandigo de la leganto-amikaro, ni decidis:

(1) eldoni multkoloran altnivelan bildoserion (19.5 × 26.5 cm.) de 16 famaj ĉinaj pentraĵoj kun bela koverto kaj ĝin donaci al:

a) ĉiu, kiu sukcesis varbi kvin abonantojn al nia gazeto (pli kvino, pli ekz.);

b) ĉiu, kiu aĉetas niajn E-librojn por minimume 10 \$US en unu fojo;

c) ĉiu aktiva kunlaboranto, kiu ofte utiligas materialojn el nia gazeto aŭ kontribuas al ĝi;

ĉ) ĉiu peranto de niaj eldonaĵoj.

(Proponoj de diverslandaj E-organizoj kaj lokaj E-grupoj pri perado de niaj eldonaĵoj estas bonvenigataj. Krom grandprocentan rabaton, la akceptataj perantoj rajtas ricevi ankaŭ la belan donacon.)

(2) rajtigi al ĉiu, kiu sukcesis varbi por EPĈ minimume 2 jarabonantojn aŭ aĉetas de ni E-aĵojn por minimume 5 \$US, senpage ricevi nian gazeton por unu plena jaro (se oni jam abonis al EPĈ por 1963, li rajtas ricevi la jarkolekton de 1964).

Ni devas vin atentigi, ke la eldonkvanto de la albumo estas limigita. Por certigi al vi la ricevon de ĝi, estas konsilinde eklabori tuj kaj anonci al ni vian sukceson ne malpli frue ol la jarfino de 1962.

**La Administracio de ĈINA ESPERANTO-LIGO**

**La donacaĵo estas jam preta kaj  
vin atendas**

# GRAVA PETO

*al ĉiuj niaj amikoj*

Kredeble ĉiuj niaj amikoj kaj kunlaborantoj memoras, ke nia gazeto tuj travivos plenajn kvin jarojn de sia dua periodo. Ĝia ĉiam pli sana kreskado multe ŝuldas al ĉiuj viaj fervoraj helpoj kaj kunlaboroj. La pli kaj pli vasta aplikado de nia kara internacia lingvo — Esperanto en Ĉinio donas grandan promeson por nia espero. Tamen por atingi plenan sukceson, ni devas ankoraŭ multe klopodi por konvinki la vastan publikon ankoraŭ indifereentan, ke nia lingvo havas vere grandan utilon por interkompreno inter la popoloj kaj por batalo de la paco, ke nia lingvo fariĝas jam vere internacia kaj povas atingi ĉiujn angulojn de la mondo, ke niaj laboroj ne estas dronitaj seneĥe sed male ricevas varmajn akceptojn kaj diskonigojn de la legantoj. Tial ni intencas aranĝi imponan Esperantan Ekspozicion en la kuranta jaro. La ĉefajn materialojn ni atendas de vi, ĉiuj niaj legantoj, amikoj kaj kunlaborantoj. Dezirataj estas diversaj materialoj pri utiligoj de *El Popola Ĉinio* kaj aliaj niaj eldonaĵoj, ekz-e, gazetoj, ĵurnaloj sur kiuj aperis viaj tradukoj aŭ represitaj tekstoj el niaj eldonaĵoj aŭ recenzoj pri ili, fotoj montrantaj legadojn, ekspoziciojn aŭ prelegon pri aŭ laŭ materialoj de niaj gazeto kaj libroj. Eĉ simplaj informoj tiaj multe helpas al la celo. Al ĉiuj, kiuj sendos al ni la deziratajn materialojn ni donacos belan memoraĵon. Ni esperas, ke ĉiuj niaj amikoj ne avaros siajn helpajn manojn kaj laŭeble kaj diversmaniere akiros por ni la bezonatajn materialojn. Ĉio por la ekspozicio adresu al nia Redakcio (P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio) kaj notu sur la koverto "Por ekspozicio".

**La Redakcio de EPĈ.**

# INDEKSO DE EPCĤ 1962

(La titoloj kun “\*” estas informoj el “Kurantaj Aferoj”)

## EKONOMIA KONSTRUADO:

Vizito al Gianming-popolkomunumo	4
Por subteni agrikulturon	6
* Unua te-rikolto en Tibeto	11
Disvolviĝo de malpeza industrio en Ĉinio	55
Akvorezervejo — trezorejo	57
* Akvoutiliga konstruado en Ĉinio	78
Pri la popola komunumo	92
* Unua duetaĝa pasaĝera vagonaro en Ĉinio	115
La kemia industrio de Ŝanhajo	155
Vang Huajju kaj lia fruktĝardeno	156
Sunleviĝo ĉe la stepo	203
* Nova reto de trafiko en Siĉuan-provinco	214
Stranga fruktoĝardeno	268

## KULTURO, SCIENCO:

“Mito” pri fiŝoj	8
* Scienca diskuto en Siĉuan	11
* Pli ol 700,000 ĝuangoj ellernis nove kreitan skriban lingvon	11
* Medicina eduko en Ĉinio	19
* “Verkaro de Pu Songling” kaj la nova eldono de “Notoj pri mirindaĵoj de Liaŭĝaj”	19
* Studo pri la filozofiaj pensoj de Konfucio	43
* Interesaj eksperimentoj pri akvoproduktoj	46
* Mongol-lingvaj libroj eldoniĝis grandkvante	78
* Granda vortaro tibeta-hana	83
* Nova verko de prof. Feng Joŭlan	115
* Libro en diversaj lingvoj eldonitaj en Hingiang	127
* Scienca aktivado en Kantono	127
* Kreskigo de “vivanta fosilio” sukcesis	127
* Kombina kuracado por ostorompo	161
* Sekreto de strangaj geografiaj fenomenoj en Tibeto	193
* Scienco servas por fiŝistoj	214
Matematiko inspirita de tableto	220
Reformo de la skribado de la ĉina lingvo	247
Familio de pentrofarboj	269
* Plena studo en universitatoj	283
* Pliaj 3 volumoj de la Jonglo-enciklopedio retrovitaj	283
* Progreso de ĉina kirurgio por novnaskitoj	283

## LITERATURO:

Liĉi-mielo (prozo)	16
Ĉaso (prozo)	20
La distriktestro de Janmen (poemo)	36
Kanto pri pasero en la kampo	36

Rakontoj pri Afanti	42, 132, 180
* Antikva epopeo	43
Ge Mej (novelo)	69
Interkompreno kaj toleremo (poemo)	71
La piedhava serpento (poemo)	71
Orflava kaprido (fabelo)	89
Mi ekkonis mian mision en la kvindeka jaro	103
Kurararbo (popola rakonto)	123
Nokto (poemo)	126
Mateniĝo sur la paŝtejo (poemo)	126
Elektitaj poemoj de Du Fu	150
* Kunsido de poetoj	154
* Libro-presado per porcelana kompostajo	161
Vortoj de knabo apud lago (novelo)	162
La tektonoj (popola rakonto)	168
Pri la rakontoj de Afanti	180
Konsilo de Zoŭ Gi al la reĝo (antikva anekdoto)	181
* Postlaboraj kolegioj en Ŝanhajo	182
Kaŭzi malagrablajn al si mem (antikva anekdoto)	216
La filo iris al mitingo (novelo)	222
La bovo jam en la tero (popola rakonto)	227
La lanco kaj la ŝildo (poemo)	228
Kio estas pli fidinda? (poemo)	228
Sama konsilo efikas iam malsame (poemo)	228
La helpema kamparano (poemo)	228
Sinjoro Hua Vej	254
Ĉe ponto de rivereto	264
Svato (popola rakonto)	265
Fidela Amo (popola rakonto)	265
Longhara junulino (popola rakonto)	266
Rompita bovlo (popola rakonto)	267
Mia patrio (kanto)	276
En vintra arbaro (poemo)	283
Sovaĝansera Gardanto	283
* Laboristo-verkistoj	283

## ARTOJ:

Statuoskulpta arto de Ĝang-familio	25
“Granda ŝanĝiĝo de la Flava Rivero” (filmo)	34
Faden-marioneta ludo de Kjuangĝoŭ	36
* Mikrogravurado	46
Urbo de fajencaĵoj	80
Babilo pri la historio de presado kaj tinkturado de ŝtofo en Ĉinio	82
Granda disvolviĝo de ĉina nacia muziko	83
Voĉimita arto	87
* Ekspozicio de belartaĵoj de kamparanoj	89
Arto sur alumeta skatolo	91
La artaĵoj de jad-birdisto Ĝang	125
“Belaj floroj” (filmo)	134



* Pli ol ducent ensembloj fonditaj	141
La ŝtonaj skulptaĵoj de Dazuo-gubernio	146
* Diversaj skoloj en artaj lernejoj	158
* Elstaraj filmoj en 1960 kaj 1961	158
Versimila, viveca kaj simpla ( <i>pri neolitaj plastikaĵoj kaj pentraĵoj</i> )	167
Nova fizionomio de la ĉina dancarto	176
"Fidela amo kaj sanga akuzo" ( <i>filmo</i> )	178
Ĉinaj pentritaj filmoj	207
"Ribelo kontraŭ la ĉielo" ( <i>filmo</i> )	210
Ĝang Jongŝou, geniulo de papertonda arto	212
* Ĉinstilaj pentraĵoj prosperas	215
* Kolektado de tamburmuzikaĵoj	215
La magia fluto de Lu Ĉunling	252
La ĉinaj novjaraj salutkartoj	256
Manluo-floro ( <i>filmo</i> )	278

## POPOLA VIVO:

Aĝie Ĝiasa ( <i>legendo en Tibeto</i> )	14
Familio en montvilaĝo	17
Vang Lanjing, la popola asessorino	33
Ĉevalrajdaj sportoj en nova Ĉinio	38
* Studo pri nuntempa mongola lingvo	43
* Grandskala riparado de Potala-palaco	59
* 102 novaj sportaj rekordoj	59
* Agrikulturo kaj brutobredado disvolviĝas en Tibeto	59
La montsido en plenhela sunlumo	65
Al kiu apartenu la honoro?	67
Ponto inter la registaro kaj popolamaso	75
"Serpento-ludisto" rakontas pri si mem	76
* Kampanoj, ĉefaj klientoj de fotejoj	78
En Dalia Aŭtonoma Subprovinco de Baj-nacio	79
Sur vojo kovrita per freŝaj floroj	110
Urbo de floroj kaj muziko	116
La Centra Instituto por Nacioj	118
Du boteloj da vino	120
Kurso pri masaĝo por blinduloj	121
Mateno en universitata urbo	131
* Budhista kunveno por granda preĝado en Tibeto	131
* Katolika soleno de konsekrado de episkopoj okazis en Pekino	141
La unuaj tibetaj geaktoroj de modernaj dramoj	159
* Filma projekcio en Tibeto	161
La kultura parko de Kantono	173
* Nacia turniro de tabloteniso en 1962	182
* Du novaj rekordoj de Biciklado-turniro	215
Tranĉilakrigisto	225
Pensioj por gelaboristoj en Ĉinio	233
Heroaĵo de unu kasistino	235
Vojaĝaj notoj pri budhismaj monaĥejoj en tibetanaĵ distriktoj en la Nordokcidento	250
Ĉe geedziĝa festo de Taj-oj	259
Imperiestro-militkrimulo-nova civitano	261
Mirinda kaverno nove malkovrita	271
Senŝeligo de ostroj	273
* Granda ŝak-turniro de junuloj en Pekino	282

## FUNDAMENTAJ SCIOJ:

* Varmfonto sur la tegmento de la mondo	11
Kunveno de papilioj apud Lancang-rivero	22
La dudek kvar sun-periodoj	30
Ĉina ŝako ( <i>en 6 lekcioj</i> )	40, 90, 130, 182, 234, 280
Muzeo de la ĉina revolucio	60
Angi-ponto	85
* Rara praplanto malkovriĝis	88
* Riĉa rikolto en arkeologio	88
Rondvizito al historiaj lokoj en Interna Mongolio	104
La muzeo de ĉina historio	113
Pri la drakboata konkurso	128
* Arakidsemoj el la tempo de la primitiva socio	131
* Nova vidindaĵo en Gujlin	141
Du Fu, la nacia poeto de Ĉinio	147
Pri ĉina silkaĵo	166
* Dokumentoj de Tajping-ĉielregno	175
Pri Lusin, la fondinto de ĉina moderna literaturo	199
* Ekspozicio de antikvaj moneroj	214
Pekina loĝanto antaŭ kvindek mil jaroj	217
La maŭzoleo de Hiang-fej	218
La ĉasista vivo de ovenkeoj	274
Sepplata ludo	281
* Miljaraj arboj	282

## AMIKECO:

"Sur tero revivigita" ( <i>pri popola agrikulturejo en Kubo</i> )	12
Sanatorioj en la okcidenta montaro de Pekino	24
Ĉinio ( <i>unua parto de la longa poemo de Georgi Dikovski, USSR</i> )	44
Volo ( <i>poemo el Mozambiko</i> )	64
Al ĉina popolo ( <i>poemo de Jurij F. Grekov, USSR</i> )	70
"Ni estas samfamilianoj" ( <i>pri la vojaĝa prezentado en USSR</i> )	84
* Traduka reprodukto de eksterlandaj filmoj	88
* Ensemblo de Orientaj Kantoj kaj Dancoj	89
Dimanĉo de Pekino ( <i>japana amiko pri Ĉinio</i> )	112
* La ĉina popolo amas literaturojn de aziaj kaj afrikaj landoj	133
Ni venis al Brazilo	157
* Fondiĝo de la ĉina instituto pri Azio kaj Afriko	193
Pri la kultura interŝanĝo	205
Kio estas popola Ĉinio? ( <i>poemo de P. Antokolskij, USSR</i> )	208
* Kuba ĉefministro donacis al Ĉinio bovoranojn	214
* Karaso el Afriko hejmas en Ĉinio	214
* Ekspozicio de japanaj belskribaĵoj	215
Majesta kanto de la "Senmorta Birdo"	248

## ESPERANTO K.A.:

Novjara saluto	3
"Esperanto marŝas"	47, 92, 136, 188, 206, 237, 285

"Sur nia librobreto"	48, 97, 139, 191, 192, 240, 289
"Korespondi deziras"	50, 98, 142, 194, 241, 290
Naskiĝinto de la jaro kvardek unua (originala poemo)	74
La danuba insulo "Esperanto"	95
Ĉu Esperanto havas propran skribalfabeton?	96
Al 72-a aprilo (originala poemo)	140
Ekkoninte Esperanton	184

Pri la ortografio de propraj nomoj	186, 284
La problemo de la internacia lingvo kiel ilo de sciencaj interrilatoj kaj sciencaj verkoj en geografio	229
Kia estas la devo de esperanta poeto (originala poemo)	230
Pri la skriba alfabeto de Esperanto	236
Rememoroj pri Julio Baghy	290

(Daŭrgo de p. 285)

\* **Avo Suurmets** (20-jara), Estonio, USSR, Pôlva Rajoon, Mooste s.ag. kun ĉl. precipe kun Ĉinio, Vietnamio, Indonezio, Latin-ameriko kaj Afriko.

\* **Robert Pfennigwerth**, 10a Hirschfelde/Sa., Gorlitzer Strasse 19, Germanio — DDR, interes. fotojn, pk. pm.

\* **Esp-rondeto "Flamo"**, Krivoj Rog-34, Ukrainio, USSR, kun ĉl. kaj interes, pk. pm. esp-librojn ktp.

\* **Esperanto-Klubo**, CS. S.-Pf. 40, Pa'pa (i), Hungario, dez. kor. kaj interes. pm, bk, ktp.

"Informilo" de Internacia Esperanto-Muzeo, jarkotizo 8 inter. resp. kup. Petu provnumeron ĉe Wien I., Hofburg, Aŭstrio.

**Arĝenta Spesmilo 1912** serĉata. Indiku, kiun esp. libron vi deziras interes. Proponojn peras Ota Ginz, Ŝikun Agaŝ 30/8, KIRJAT JAM BET, Izraelo.

\* **Japanaj gejunuloj** dez. kor. kun ĉl. Skribu al s-ro Kataoka Tosihiro, 17 Fuyoryo, Kyomati 1-79, Kawasaki, Japanio.

\* **Dro. Kornel Kussinszky**, Hungario, Pecs, Jokai u. 35.III.46., pri ĉt. precipe pri jurscienco, literaturo, geografio kaj interes. bk. kun aziaj kaj afrikaj s-anoj.

\* **S-ro Jose Povedano**, French 1375, Rosario, Rep. Argentina, pri ĉt. kaj interes. pm. kun landoj aziaj.

# El POPOLA ĈINIO

Dumonata Gazeto eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio  
Adm.: P. O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio

## Enhavo de N-ro 6 (77) 1962

**Bildo sur kovrilo: Orfiŝoj (Suĝoŭ-a brodaĵo)**  
**Reformo de la Skribado de la Ĉina Lingvo**  
**Majesta Kanto de la "Senmorta Birdo"**  
**Vojaĝaj Notoj pri Budhismaj Monaĥejoj en Tibetanaj Distriktoj en la Nord-okcidento**  
**La Magia Fluto de Lu Ĉunling**  
**Sinjoro Hua Vej**  
**La Ĉinaj Novjaraj Salutkartoj**  
**Ĉe Geedziĝa Festo de Taj-oj**  
**Imperiestro—Militkrimulo—Nova Civitano**  
**Ĉe Ponto de Rivereto**  
**Popolaj Rakontoj**  
**Stranga Fruktoĝardeno**  
**Familio de Pentrofarboj**  
**Mirinda Kaverno Nove Malkovrita**  
**Senŝeligo de Ostroj**  
**La Ĉasista Vivo de Ovenkeoj**  
**Mia Patrio (kanto)**  
**"Manluo-Floro" (filmo)**  
**Lukto inter Kanonoj kaj Ĉevaloj (La Ĉina Ŝako)**  
**Sepplata Ludo**  
**En Vintra Arbaro (poemo)**  
**Sovaĝansera Gardanto**  
**Pri la Ortografio de Propraj Nomoj Esperanto Marŝas**  
**Sur Nia Librobreto**  
**Korespondi Deziras**  
**Rememoroj pri Julio Baghy**  
**Bildo sur dorskovrilo—La Kaverno de Ludijan**

## DONACO AKIRINDA!

Bela kalendaro al EPĈ-abonantoj de 1963

12 koloraj ĉinstilaj pentraĵoj de famaj pentristoj kun kalendaraj tabeloj de la 12 monatoj. La papero, altkvalita. Formato, 13 cm. × 18 cm.

La preskvanto, limigita. Nur tiuj kiuj ensendos sian abonon antaŭ la 31-a de januaro, 1963 (laŭ la enpoŝtiga dato) ricevos ĝin kun certeco. Tuj abonu ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Administracio.

La Administracio de  
ĈINA ESPERANTO-LIGO

**Feliĉan Novjaron!**

La Redakcio de "El Popola Ĉinio"



# Orkestro de Junaj Pioniroj

*Prof. Huang Juanli donas lecionon al violonĉelisto de la orkestro.*




*Diligenta ekzerco en frua mateno.*

*Lernado kaj aprezado al sondiskoj.*



*Kapablaj ne nur en prezentado sed ankaŭ en riparo.*



*Lernado de nova muzikverko.*

